

Tazio Carlevaro

# Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045 ?



**Dua reviziita kaj pligrandigita eldono 2000**

**Represo kun enkonduka aldono 2019**

**Hans Dubois**

Tazio Carlevaro: Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045 ?  
1-a eldono 1999; 2-a eldono reviziita kaj pligrandigita.  
ISBN: 88-87282-03-X

PDF-formata represo kun nuntempe aktuala enkonduko: 2019.

*Adreso de la aŭtoro:*

D-ro Tazio Carlevaro  
Viale G. Motta 32  
CH-6500 Bellinzona  
(Svislando)  
tcarlevaro@bluewin.ch

# ENHAVO

ENHAVO .....	3
Enkonduko.....	1
Pripensi estas necese .....	1
La situacio de Esperanto .....	1
Kiel skribi en Esperanto? .....	3
Naskiĝo kaj malapero de la “sankta espero” .....	4
Reago de la esperantistoj .....	8
Kelkaj trajtoj de la movado .....	9
Ĉu Esperanto diras ankoraŭ ion al la mondo?.....	11
La apartaj “mitoj” de la Esperanto-movado.....	11
Mitoj pri la lingvo mem.....	12
Mitoj pri la Esperanto-movado.....	13
Mitoj pri Esperanta kulturo.....	15
Mitoj pri defendo je lingvaj minoritatoj .....	16
Mitoj pri la Esperanta turismo .....	18
Mitoj pri la ekologia misio de la Esperanto-movado.....	18
Mitoj pri transetna identiĝo .....	19
Mito pri la neevitebleco de Esperanto .....	19
Neceso de propagando .....	19
Pri la Esperanto-sociologio .....	22
Empiriaj esploroj pri la Esperanto-movado.....	24
P.G. Forster, GB (1982).....	24
Nikola Rašič, internacia (1988) .....	24
F. Stocker, Germanio (1996).....	24
T. Carlevaro, Svislando (1998).....	25
Metodologio.....	25
Rezultoj.....	25
Konkludoj .....	28
La du politikoj de Esperanto .....	30
Zamenhof pri la utiligebleco .....	30
Prestiĝo-politiko.....	30
Finvenkismo.....	31
“Inter-ni-politiko” .....	33
La uzo en scienco .....	34
Pormomenta konkludo .....	36
La naskiĝo de komuna lingvo en Eŭropo .....	38
La influo de la angla.....	38
La naskiĝo kaj la disvastiĝo de la sociaj novigoj.....	42
Esenco de la “moderno”.....	43
Lingva politiko en Svislando.....	45
Lingva historio .....	45
Kiel efikas la lingvo-politiko en Svislando.....	46
Enlandiĝo de nova lingvo en Svislando .....	48
Ĉu nova intersvisa lingvo?.....	48
Reagoj .....	49

Ĉeesto de la angla en la konscio de la svisoj .....	50
Kial Esperanto fariĝis neutila .....	55
Konkludo .....	57
Ĉu Esperanto atingos la jaron 2045?.....	57
Aldonaĵo (1): Aliĝu al la internacia lingvo .....	59
Neceso reipensi nian starpunkton .....	59
Lingva politiko en la itallingva Svislando .....	59
Fremdlingva situacio en la svisa Konfederacio .....	60
La angla atingis la "kritikan mason" .....	61
Eŭropo kaj lingvo .....	62
Sento pri aparteno .....	62
Bezono de nova strategio .....	62
Aldonaĵo (2): Kvazaŭ "liturgia" recenzo.....	64
Enkonduko .....	64
LF kiel rus-pupa organizaĵo .....	64
Utilitarismo ĉe LF .....	65
La "simptomo" .....	66
Aldonaĵo (3): Kio okazis inter 2000 kaj 2019 .....	68
Kial tiu ĉi libro reaperas kun aldonaĵo, sed sen ĝisdatigo.....	68
La antaŭvidoj al 2045.....	69
Esperantaj projektoj kaj la neceso akiri novajn esperantanojn .....	70
Kelkfoje, la esperantanoj blagas pri nombroj .....	70
Tamen, lernu Esperanton .....	71
Konsultitaj verkoj .....	72

# Enkonduko

## *Pripensi estas necese*

Kiam la prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, Bruno Graf, petis min prelegi pri la estonto de Esperanto en Svislando, mi longe hezitis. Ĉar mia prognozo pri la pluvivo de Esperanto estas, kiel konate, negativa. Foje mi estis aktiva esperantisto, kiu konvinkiĝis, ke *la mondo deziras Esperanton*. Mi opiniis, ke, se iu ne favoras Esperanton, la kaŭzo estas lia nescio pri la lingva demando. Bedaŭrinde montriĝis, ke tio estis malvera. La idealoj de la esperantistoj, nome kaj la lingvo mem, kaj la “interna ideo”, en nia mondo terure komplika, *ne plu trovas lokon por esprimi sin*, ĉar neniu plu aŭskultas nin. Montriĝis, ke la sola vera kaj venka forto de nia mondo ne estas la etika kaj la scienca evoluoj, sed nur la ekonomia disvolviĝo. Etiko kaj scienco, se ili volas pludaŭri, devas iel akiri utilitarisman trajton. Utilitarismo estas tezo, laŭ kiu la individuoj, preter siaj kredoj kaj opinioj, fakte elektas alternativojn, en kiu ili iel kredas, ke ili ricevos avantaĝon (materian aŭ moralan). Ĝenerale, temas pri senpere observeblaj, aŭ proksime ekspektataj avantaĝoj. Branĉo de sociologio studas la rezultojn de la ĝeneraligo de tiu konduto al tuta populacio.

Mi longe pripensis, kiamaniere proponi miajn ideojn, kiuj estas certe ne kutimaj, en formo, kiu laŭpove respogulu kaj miajn opiniojn pri la demando, kaj la metodon, per kiu mi analizis la demandon “Esperanto”, kaj la respekton, kiun mi sentas por idealisma entrepreno pli ol centjara, kiun mi longe ŝatis kaj praktikis.

Estas kurioze, ke en la mondo, nur la esperantistoj ne rimarkis, ke la epoko de la planlingvoj forvaporigis. Ĉar ni ofte ni havas antaŭjuĝojn. Eble pro tio, ke estas malfacile pensi aliel, ol ni kutimis pensi dum jaroj. Tial, por prezenti mian temon, mi devis uzi metodon, kiun *ĝenerale* oni uzas en tiuj ĉi kazoj. Nome, mi devis momente rezigni pri miaj scioj, miaj sentimentoj, miaj deziroj, miaj konvinkoj pri Esperanto, Esperanto-movado kaj esperantistoj. Ilin iel “forgesi”, kaj enprofundiĝi ekskluzive en la kredoj, sentoj, konvinkoj, analizoj kaj konkludoj — ne de la malamikoj de Esperanto, sed de la ne-esperantistoj, kaj de la ne-esperantemuloj. Tion mi faris ekskluzive sur la bazo de la analizo de Esperanto-movademaj esploremuloj (kvankam la analizon fine mi faris ankaŭ sur la bazo de ekster-esperantistaj tezoj, kaj sur la bazo de sciencaj modeloj), kaj sur la bazo de ĵurnal-artikoloj.

Mia prelego prezentiĝis en Berno, kiel promesite, la 6-an de marto 1999. Jam tiam ĝi vekis kaj kontraŭstarojn, kaj aprobojn. Sur la bazo de la rimarkoj ricevitaj, mi pretigis pres-eldonon de mia teksto. Ankaŭ tiu versio vekis ioman atenton: sur la bazo de kelkaj rimarkoj, mi plipoluris mian tekston. Tial, je la komenco de la nova jarmilo, mi proponas duan (kaj definitivan) eldonon. Mi profitis intertempe je la apero de kelkaj gravaj verkoj pri tiu temo.

## *La situacio de Esperanto*

Mi pripensis longe, ĉu fakte eldoni ion tian. Mi kutimas de tempo al tempo halti, kaj demandi min, ĉu miaj viv-celoj estas ĉiam aktualaj, ĉu mi eble reviziu kelkajn el miaj valoroj. Ĉar nenio estas eterna. Ankaŭ ne celoj kaj motivacioj. Jam okazis, ke mi malkovras, ke mi eraris, kaj ke mi mistrafis aŭ blinde palpumis, en la kredo, ke mi sagocerte trafas. Cetere, Esperanto ne estis malgrava momento, almenaŭ ne ĉe mi.

Esperanton instruis al mi ne iu obskura instruisto, sed mia saĝa avo, kiam mi estis 12-jaraĝa. Do Esperanto estas profunde ligita al la kresko de mia karaktero, al multaj eventoj de mia vivo, kaj al multaj aferoj, kiujn mi esperis kaj kredis.

Povas esti, ke en 1957, kiam mi lernis Esperanton, estis klare, al kelkaj fakuloj, ke *la angla jam estis la internacia lingvo*. Sed laŭvere, mi ne rimarkis tion. Ĉar mi vivis en Svislando, kie delonge la instruado de la angla estis relative malgrava (ni devis unue lerni la francan kaj la germanan). Sed en tiu epoko, krome, Esperanto estis tre disvastiĝinta, multe pli ol nun. Mi bone memoras, ke, nur 12-jaraĝa, mi partoprenis al regionaj kunvenoj (Varese, Como, Lugano), kun centoj da partoprenantoj. Nun ekzistas plu neniu. En tiuj urboj kaj vilaĝoj, ne plu ekzistas esperantistoj. Multaj tiamaj svisaj politikistoj, kaj multaj kleruloj tiutempaj, ĉu konis, ĉu sciatis, ĉu aktive favoris Esperanton. Nun Esperanto, kiel politika, socia aŭ kultura temo, en Svisio, estas tute ekstertema.

Ne estas mia kulpo, nek la kulpo de la esperantistoj. Tute simple, siatempe ni kredis, ke nia speciala sentemo, rilate komunikadon kaj kulturon, estas komuna al multaj homoj, kaj ni ne rimarkis, ke, male, ni estas unikuloj. Pro tio, ni konstruis movadon, kiu emis al internaciigo, sed kiu fakte izoliĝis ĉiam pli. Ni ne kapablis altiri homojn, kaj konservi la interesitojn, kaj niaj idealoj, se entute, ne kapablis disvastiĝi.

La angla fariĝis la internacia lingvo. Nia esperantista mesaĝo neniam populariĝis, ĉar ĝi neniam korespondas al la vidpunktoj, al la deziroj, al la scioj kaj al la aspiroj de la granda parto de la populacio. Tiu estas fakto.

La homoj kapablas lerni lingvon, nur se ili antaŭvidas avantaĝon (profiton). Estas certe, ke, *se Esperanto permesus profiton*, multaj homoj lernus ĝin. Kaj per tiu ĝenerala lernado, ĝi atingus *pli altan nivelon de prestiĝo*. Bedaŭrinde la idealoj kaj la planoj de la esperantistoj ne sukcesis. Sed ankaŭ la ĝenerala agado de la esperantistoj preteratentis tiun esencan fakton. Ili konstruis movadon, kaj kredis, ke tio sufiĉas por gravigi Esperanton. Sed nur la principo de empiria utileco ("utilitarismo") validas en sociaj demandoj. Ĉar montriĝis, ke nur tiu principo klarigas, kial okazas evoluo kaj ŝanĝo. Preter la kredoj, la esperoj kaj ofte la iluzioj de la homoj.

Bedaŭrinde, la esperantistoj ofte ne komprenas la terminon "profito" en tiu senco, nome en la ekspektata rezulto de laboro "utilitarisma". Ili tuj pensas pri malluma kapitalismo, pri usoneca influo, ktp. Ili ne vidas, ke objektiva analizo de la "kvanto de utileco de Esperanto" bone klarigas la nunan situacion de ĝia movado.

Estas fakto, ke, el mia 43-jara laborado por Esperanto, mi ekspektis ioman rezulton. Ne la "finan venkon", eble, sed ioman sukceson. Al miaj esperoj mi dediĉis multege da tempo, da pasio, da emocio, da mono. Kiel, cetere, ĉiuj esperantistoj. Estus nekredeble, ke tiu sindediĉo ne havu radikojn en ia ekspekto, ia atendo, ia espero. Neniu homo kapablas dediĉi parton de sia tempo, de sia laboro, de sia esto mem, sen ajna motivo. Nur maŝinoj povas.

Mi do ekspektis ion. Mi ekspektis, ke Esperanto akiros certan minimuman rolon en la internacia komunikado: nome en kulturo (literaturo, lingvoinstruado, filmo, ktp), en scienco (universitata instruado, lernolibroj, faka interŝanĝo en scienco), en internaciaj organizaĵoj (Eŭropaj kaj ekstereŭropaj), en junulara politiko (uzo en diversaj intergentaj kunvenoj). Kaj ke tiu utiligo ne dependu esence de kelkaj entuziasmoj, sed ke ĝi havu faktan kaj klaran rolon - eble ankaŭ malgrandan - sed oficialan. Mi esperis, ke, en Svisio Esperanto havu

ioman rolon en la intergenta komunikado. Kaj en 1957-70 la entuziasmo estis granda, la laboro estis intensa, kaj la diskutoj - ankaŭ en la ĵurnaloj, en la radio, en la politiko - estis viglaj kaj interesaj.

Kio konkretiĝis? Nenio. Tiu estas fakto. Nuntempe mi rimarkas, ke la movado rapide ŝrumpas. Ne nur ne ekzistas uzo en kulturo, scienco, internaciaj organizaĵoj, en junulara politiko, ktp. Sed oni nenie plu parolas pri Esperanto. Certe, ekzistas ankoraŭ esperantistoj, kiuj uzas Esperanton en kultura, scienca, intergenta, kaj junulara kampoj, sed temas pri *Esperantaj uzejoj*. En la oficialaj, fakte ekzistantaj, grandaj kaj influaj uzejoj, nur la angla uziĝas. Dum la lastaj 50 jaroj, en kiu loko, en kiu kampo (domeno), la uzo de Esperanto disvastiĝis, kaj en kiu loko, en kiu domeno, ĝi fariĝis sendependa de la ekzisto de entuziasmuloj? Nenie. Ne nur: eĉ la "entuziasmula" uzo malprogresis.

Ne nur: mi rimarkas, ke la angla apera ĉiam pli ofte en nia ĉiutaga vivo, en la muziko, en la ĵurnaloj, en la scienca uzo. De Usono niaj civitanoj transprenas ĉiam pli rapide kutimojn, aspirojn, ekspektojn, eĉ festojn. Kiam Svislando fariĝos US-ŝtato? Mi rimarkas, ke tiuj konstatoj ĝenas multajn esperantistojn. Iuj inter ili neas, ke estas tiel, aŭ kredas, ke temas pri momenta fenomeno. Aliaj inter ili konsideras tion tre negative, kaj alarmas la mondon, pri iom-post-ioma usoniĝo. Ĝenerale, oni perceptas ĉe ili pli-malpli klare esprimitan kontraŭ-usonan sintenon. Dum la tuta mondo ĉiam pli rapide direktiĝas al kultura usonaniĝo, la esperantistoj ne sekvas la tajdon. Se ili tion farus, ili kompreneble nur malfacile povus paroli pri Esperanto.

Povas esti, ke la tuta diskuto ĉi tie prezentita ne plaĉos al multaj homoj. Povas esti ankaŭ, ke la konkludoj ne trovos la konsenton de aliaj homoj. Sed almenaŭ la prezentitajn faktojn oni devus foje ekkoni. Cetere, en 2045 mi ne povos vidi, ĉu mi pravis aŭ ne, ĉar mi aĝus precize 100 jarojn. Kaj en mia familio, oni ne atingas altan aĝon, bedaŭrinde.

## *Kiel skribi en Esperanto?*

Ĉi tiun studon en 1999 mi skribis per neoficiala skribosistemo. Estintus eble transformi ĝin al teksto tute "zamenhofa". Sed tiutempe ne senprobleme. Mi ne volis tion fari, ĉar se mi publikigus ĉi tiun eseon en la tuttera reto, mi ne povus uzi la zamenhofan sistemon, sed nur la cetere fundamentan "h"-sistemon, aŭ la eksterfundamentan "x"-sistemon. Do mi povus skribi nur ĉu *shanghi*, ĉu *sxangxi*. Kiun el la du mi elektu? Pro diversaj kaŭzoj, tiutempe mi elektis la "x"-sistemon, ĉar ĝi permesas tre facilan kaj rektan transformon al la "h"-sistemo, kaj al la supersigne zamenhofa ortografio<sup>1</sup>.

---

<sup>1</sup> Finfine, por simpligi la legadon, en la jaro 2000, mi reutiligis la Zamenhofan ĉapelhavan sistemon. Unu el la problemoj de la publika prezento de Esperanto en ne-esperantista revuo aŭ libro.

## Naskiĝo kaj malapero de la “sankta espero”

Estas evidente, ke Zamenhof proponis Esperanton por iel helpi en la disvastigo de pacaj rilatoj inter ĉiuj popoloj. Li kredis, ke militoj fontas ĉefe *kaj* de naciismo, *kaj* de religia malsameco. Montriĝis, ke, laŭ li, en tio, rolas ankaŭ lingva malsameco. Pro tio li konstruis specon de universala etika sistemo (*Hilelismo*, kun poste li maljudigis al *Homaranismo*), kiu estas speco de kvintesenco de la reciprokrilata etiko de Okcidento (Chiti-Batelli 1999).

Zamenhof kredis al la tutmonda rolo de sia lingvo. Li konsciis, ke planlingvo estas ja korolaro de lia etika ĉeftezo, sed ke, favore al planlingvo, parolas ankaŭ alispecaj faktoroj, kiuj baziĝas sur la utileco de tia internacia lingvo. Certe li sopire revis, ke Esperanto iĝu foje la komuna helplingvo de la tuta homaro.

La esperantismo estas movado, kiu jam komence celis alpaŝi favore al la enkonduko de internacia lingvo, kaj aparte de Esperanto en tiu rolo. *Ĉu estas la lingvo, kiu kreas la fundamentojn por paca mond-ordo, aŭ ĉu estas paca mond-ordo, kiu kreas la fundamentojn por la enkonduko de komuna helplingvo?* La tuta afero ne estis klara eĉ al Zamenhof mem. Supozeble, interne de la movado, kelkaj akcentis la rolon de la mond-ordo, kelkaj male akcentis la rolon de la helplingvo.

Ĉiuj pioniroj de Esperanto esperis la "*finan venkon*". Ili kredis, ke la celoj de la Esperanto-movado estas tiom evidente bonaj, ke ili fariĝos propraĵo de la homaro. Ili antaŭvidis, ke rapide Esperanto atingos internacian agnoskon. Granda movado startis inter 1903 (kiam moviĝis eĉ la franca *Touring Club*) kaj 1922 (kun intermilita paŭzo). Esperanto ne estas movado revolucia, sed esence reformisma (Leyk 1983). Fakte, ĝi aktivis en limigita socia rondo, ne estas ĝenerale persekutata, ne rilatas centrajn problemojn de la socia organizo, kaj aktivis publike.

Kiam tia movado celas profundan ŝanĝon en la socio, kie ĝi estas reprezentata, ni rimarkas du fazojn.

- En la *unua fazo*, oni observas *agitadon kaj kreskon*. En tiu ĉi fazo, la socia projekto, kies portanto estas la movado, altiras homojn, kiuj provas akurate konceptigi ĝin, ankaŭ por serĉi solvo-rimedojn. Rilate Esperanton, ni rekonas tiun fazon en la aktivado dum la t.n. franca periodo de Esperanto. En tiu epoko, formiĝis la gvidantaro, kaj komenciĝis la instituciigo de la movado, kun propraj ideologio kaj programo.
- La *dua fazo estas duobla*. Ĉar la situacio dependas de tio, ĉu la movado atingis aŭ ne atingis sian celon. Se la celo estas atingata, la movado perdas sian ĉefrolon, kaj ĝi iom post iom kadukiĝas. Se la celo montriĝas neatingebla, la movado krizas, skismiĝante, kaj ĝi riskas malaperi.


Sed ne ĉiuj anoj konsentas kun la forvaporigo de la movado. Eble ĉar ili tiras certan avantaĝon de ĝia ekzisto. Eble ankaŭ nur moralan. Ili do transformas ĝin al movado "normala", kun ĝiaj iamaj celoj, kies atingon oni tamen plusendas al iama estonta tempo, kiam *la cirkonstancoj estos pli favoraj*. Aŭ kiujn oni deklaras "atingitaj", kvankam ne en la tradicie ekspektata maniero. Do, kvazaŭ *metafore* atingitaj. Neniu movado malaperas volonte kaj per propra mano. La celoj eniras specon de empirio, kaj la movado fakte alidirektiĝas.



Ni vidas tion tre klare en la Esperanta movado. Ĝi kreskis iom post iom ekde 1887, sed impete kaj rapide inter 1903 kaj 1922, malgraŭ kelkaj krizoj. Grandan baton por Esperanto reprezentis la fakto, ke pro diversaj kaŭzoj (certe ne pro la mondo-milito) ĝi trovis nenie akcepton kaj faktan uzon. Plej gravis la malakcepto ĉe la Ligo de la Nacioj, ĉe la Komunista Internacio, kaj en la sciencaj medioj. Precize tien, kie Esperanto ŝajnis esti bezonata, ĝi ne sukcesis eniri. Iusence, inter 1918 kaj 1928 la destino de Esperanto kaj de la aliaj planlingvoj trovis sian definitivitan konkludon. La homoj ne deziras ion tian. Eĉ se temas pri ideo interesa, ne eblas feliĉigi la homojn kontraŭ ilia volo.

En la movado, tiam restas la celoj, kiuj estis je la ideala bazo de la fiaskinta aktivado. Ili tiam eniras specon de empireo, kaj la movado fakte alidirektiĝas. Formiĝas kulturo de fermita grupo, kiu esence celas garantii nur la pludaŭron de la movado mem, kaj ne la originan celon. Komence, estas necese trovi la *kaŭzon* de la malsukceso, kaj la klarigon pri la neceso prokrasti la atingon de la celoj. La Esperanto-movado volis plu vivi, malgraŭ la maltrafo (Symoes 1988). Tio eblas, ĉefe se ĉiuj kredas al komuna celo. Fakte, la ekzisto de la Esperanta komunumo pravigas la ekziston de Esperanto. Sen ĝi, ne ekzistus Esperanto. Kaj inverse.

La fazo de la reformisma movado



Certe, la Esperanto-movado estis tiam forta kaj hardita, kaj cetere ĝi konsistis el multaj anoj, kun specialaj kredoj (“interna ideo”, lojaleco al Zamenhof-idearo, netuŝebleco de la lingvo), kaj kun jam relative granda organizo. Ĝi povis do plenkonstrui relative fortan kaj multflankan organizaĵon, kies servoj stimulis la tiamajn esperantistojn. Tio kontribuis al ioma kresko de la movado mem, eĉ post la fakta historia malvenko. Multaj homoj plue lernis ĝin, ĉar tamen la grandeco de la movado, kaj la limoj de la tiama sociaj rimedoj, permesis interesan utiligon de la lingvo (internacia korespondado, vojaĝoj, kongresoj, UEA kaj SAT). Ni atentu pri la apartaĵoj de la epoko: en tiuj jaroj, la bazaj lernejoj ne instruis fremdan lingvon, kaj, cetere, ankaŭ la altlernejoj nur malofte proponis taŭgan fremdlingvo-instruadon. Ni memoru ankaŭ pri la fakto, ke vojaĝi estis grava kaj malofta socia evento.

Male, la Ido-movado estis malpli forta kaj malpli hom-riĉa. Ĝi tuj spertis la krizon de la rifuzo, kiu tuŝis ja Esperanton, sed eĉ pli intense Idon. La idistoj kutimis rezoni “lingvistike”. Ili kredis, ke Esperanton oni ne akceptis pro lingvaj kaŭzoj. Nur pli perfekta projekto povus havi ŝancon internaciigi. Kiam ili rimarkis, ke ankaŭ Idon neniu politika instanco volas, ili forlasis ĝin, ĉar ili opiniis, ke tiu fiasko ŝuldiĝas finfine al la lingvo mem. Ili migris al pli “moderna” lingvo, Occidental (Carlevaro, Hauptenthal 1999). Tio estis, kompreneble, granda eraro. Ni observas tion en la rapida falo de libro-apero ekde 1928-9.

Ido-movado: publikigo de libroj 1928-1932

Aper-jaro	1919	1920	1921	1922	1923	1924	1925	1926	1927	1928	1929	1930	1931
N.	42	33	33	49	53	25	37	41	43	34	13	2	13

Nome, la rifuzo de Esperanto dependis de politikaj demandoj, kaj ne de la kvalito de la lingvo. Do, por ili, ne estis esence aliĝi al alia lingvoprojekto.

Sed la "plejo" de la Esperanto-movado ne produktis pluan progreson, ĉar la dua mondomilito radikale ŝanĝis la medion, en kiu la Esperanto-movado laboris. Aparte, akcelante la disvastigon de la angla lingvo, la lingvolernon en la lernejoj, kaj la turismon. Revenis la demando pri la prceloj: kio do, ne tiom pri la Esperanto-movado, sed pri la lingvo mem? Iusence ni proponas hodiaŭ malnovajn receptojn, kiujn la oficialaj kaj neoficialaj instancoj rifuzis jam inter 1914 kaj 1928. La ekstera publiko scias tion, kaj perceptas, ke Esperanto estas interesa komunika alternativo, kiu "ĝiam floris", sed kiun hodiaŭ oni ne plu "vidas" aktivi. Ĉar ni kapablis puŝi la prcelon al loko, kie ĝi ne plu ĝenas.

Plej granda parto de la esperantistoj konscias pri la gajno de la angla, kaj ke la "prcelo" fariĝis arkivaĵo. Iuj puŝas do la iaman certan oficialigon de Esperanto al onta epoko, kiam "La angla tajdo, same kiel jam okazis al la franca, kaj pli frue al la latina tajdo, estos fine for: jes ja, eble post 200 jaroj". Grave embarasa agnosko: kiu scias, kia estos la mondo post 200 jaroj? Iuj aliaj asertas, ke, vere, ili ne vidas demandon en tio. Ĉar Esperanto atingis ja sian celon, almenaŭ inter la esperantistoj. Kompreneble, ĝi ne estas internacia lingvo, ĉar en tiu rolo troviĝas la angla, sed ĝi estas lingvo *transnacia*. Temas pri metafora plenumo, supozeble. Kiam mankas fakto, helpas nur vorto. Sed neniu scias, kion signifas ĉi tiu vorto. Ĝin oni nur recente inventis. Sed dank al ĝia uzo oni finfine trovis plenrajtan rolon por Esperanto. Ho la! Magia sorĉo de la vortoj. Ne: senenhava adjektivo ne sufiĉas por kaŝi, ke ekzistas vakuo. Tiu vort-uzo paralelas al la tezo, ke ekzistas esperantista "popolo". La ideologio de komunumo Esperantista, kiu kunvenas rite de tempo al tempo, supozeble, estas konsolilo kontraŭ la ĉiutaga izoleco, la nekompreno de la civitanoj kaj la malsukcesoj.

Kelkaj esperantistoj ne kapablis ĝisnun kompreni kelkajn elementajn faktojn, nome ke la tempo marŝas antaŭen. Ili ankoraŭ analizas, kial Esperanton oni politike kaj socie neglektas. Ekzemple Gudskov (1997) ankoraŭ kredas, ke sufiĉas prezenti kaj ekspliki la teruraĵojn (moralajn kaj materiajn), kiuj okazas en la internacia komunikado, por ke la homoj konvertiĝu al Esperanto. Fakte, pli probable Gudskov estas bona ekzemplo de la fakto, ke por trovi motivadon al la laboro poresperanta oni devas konvinkiĝi, ke per sia laboro oni feliĉigas la mondon. "La nepoj vin benos...". Jen kelkaj el la tiutemaj tezoj.

- **Esperanto estas necesa al la monda paco**

Estas facile rimarki, ke temas pri la neverifebla teorio de la benata mond-ordo. Laŭ ĝi, la malamikoj de Esperanto estas ankaŭ malamikoj de la paco. Unue, mi dubas, ke ekzistas "malamikoj" de Esperanto. Plej granda parto de la homaro estas simple indiferenta. Ne nur antaŭ Esperanto, sed ankaŭ antaŭ la problemaro, al kiu ni decidis dediĉi nian tempon kaj energion. Fakto estas, ke ofte la kontraŭo estas vera: lingva interkompreno ne necese signifas reciproke pacan sintenon. Gravaj intergentaj bataloj okazis en populacioj, kiuj parolas la saman lingvon. En Norda Irlando la fundamenta debato estas ne tiom religia, kiom historia, kvankam ambaŭ populacigrupoj parolas la saman lingvon (la anglan). En Bosnio, kaj la

serboj kaj la islamaj bosnianoj parolas la saman lingvon. Kaj la samon ni observas en Ruando kaj Burundio.

- **Multaj malamikoj de la monda lingvo kontraŭas Esperanton, ĉar ili volas plupuŝi sian solvon**

La esperantistoj ofte havas senton pri persekuto, ĉar ili timas, ke oni ne volas/povas kompreni ilin. Ili ofte akuzas ne-esperantistojn pro nelojaleco, aŭ pro politikaj komplotoj. Sed fakte, ili bezonas tiun persekuton, ĉar laŭ kelkaj teorioj, ĝi klarigas la malsukcesojn kaj la malprogresojn.

Bedaŭrinde, ankaŭ la teorio de la malamikoj kaj de la komplotantoj estas nepruvebla. En Eŭropo, la anglan vaste enkondukis niaj registaroj, kompreneble, sed pro tio, ke *ĝin la popolo mem postulas*. Cetere, se la registaroj ne farus tion, ili malhelpus per tio vivŝancojn al siaj civitanoj. Ne ekzistas komplotoj de politikistoj, lingvoinstruistoj kaj agentoj de CIA.

- **Apogo de granda ŝtato aŭ ŝtat-grupo estas necesa por la enkonduko de Esperanto**

Tio estas fakto. Sed bedaŭrinde, tio okazos nur sur la bazo de *forta politika apogo* interne de la populacio, kiu nepre postulas Esperanton. Prem-grupo por Esperanto ekzistas nenie. Kaj ne ekzistos premgrupo, ĝis la utilo de Esperanto ne estos sufiĉe videbla. Ne nur: ekzistas kontraŭstaraj premgrupoj, kiuj estas favoraj al aliaj lingvaj solvoj, kaj, aparte, kiuj volas ĝeneraligi la uzon de la angla i.a. en la scienca mondo. Ilin ne salajras CIA. Ili tion postulas nur por plifaciligi la cirkuladon de sia scienca produktaĵo tra la tuta mondo.

En nia nuna cirkonstanco, ne ekzistas registaro, kiu konsentus feliĉigi sian regataron per Esperanto, nur por plaĉi al la esperantistoj. Ĉefe se la regantoj rimarkas, ke fakte la regataro *tion tute ne deziras*. Certe, unuopaj politikistoj asertas de tempo al tempo, ke ili konsentas kun la ideoj de Esperanto, sed *nur* kun la *ĝeneralaj*. Neniam ili proponos ion ajn, pri kio ili scias, ke la elektontoj strikte malkonsentas.

Ĉar, fakte, bedaŭrinde, la esperantistoj kaj Esperanto ne ĝuas bonan famon. Ilia *image* (publika bildiĝo) estas negativa. Esperanto dum la lastaj jardekoj malaperis el la komunikokonscio de la Eŭropanoj.

## Reago de la esperantistoj

Movado enfermita en propra rondo iom post iom mortas, tiom pli ke ĝia celo estis transirigi Esperanton al ĝeneraligita uzo en la mondo. Tial, por firmigi sian movadon (Ejsmont 1988), sed samtempe ligi ĝin kun la mondo, la esperantistoj komencis partopreni la “eksteran” kulturan vivon, modernigis siajn programojn, edukis siajn gvidantojn, konstruis siajn valorojn, celojn, metodojn, ilojn. Ili komencis projekti idealan mondon, en kiu iamfoje estonte estos loko por Esperanto, kvankam en la nuna momento trovas ĝuon en Esperanto nur la movadanoj, ĉar Esperanto permesas kreon kaj firmigon de interhomaj ligoj. Certe, tiu Esperanta mondeto havas multon pozitivan. Iusence, post pli ol 40-jara esperantisteco, *valoris la penon lerni Esperanton*, ĉar la homaj spertoj estis multaj kaj interesaj. *Sed la demando ne estas principe tiu.*

La risko de tiu entrepreno estas konstrui duaklasan “komunumon”, en kiu oni trovas preskaŭ ĉion, kion oni trovas en la neesperantista mondo, *sed je malpli altaj kvalita kaj kvanta niveloj*. Tia komunumo povas interesi kaj konsoli nur ĝisostajn esperantistojn, kiuj tamen volas almenaŭ iom profiti el laboro farita por lerni Esperanton. Novuloj, male, ne povas longe esti altirataj de io tia. Ili venas, interesiĝas, lernas la lingvon, kaj kiam ili konstatas la faktajn limojn de tia movado, ili baldaŭ malinteresiĝas. Kelkaj el ili, komence, opinias, ke eblas ŝanĝi la situacion per *pli bona organizo*, per *pli bona informado*, per *pli trafa argumentado*. Sed preskaŭ ĉiam kaj preskaŭ ĉie montriĝas, ke tio ne estas efika. La rilato inter forlaso aŭ daŭrigo en Esperantio dependas do de la *utileco de la lingvo*. Tio siavice kreas la bildiĝon, kiun la publiko atribuas al la lingvo kaj al la movado.

Esperantistoj rezignas pri batalema esperantismo, kaj akceptas la nunan veran disvastigĉosituacion de Esperanto, nur post 10-jara esperantisteco. Ili fariĝas “ideologiaj” esperantistoj, kaj ne plu multon esperas pri la rezultoj de propagando, ktp. Ili eble estas *malpli aktivaj, sed pli lojalaj*. Pro tio, ili kaj akceptas la limojn de la esperantistaro, kaj tial ili limigas sian “uzon” de Esperanto al la domeno de la homaj rilatoj, kaj ofte havas tamen ankoraŭ fortan rilaton kun Esperanto kiel lingvo kaj kiel socia celo tamen atinginda. Malgraŭ la multaj seniluziigoj, kaj la malsukceso de iliaj inform-klopodoj.

Estas iom mistere, ke cetere tamen ekzistas pli-ol-dekjaraj-esperantistoj. Kial kelkaj homoj restas en la Esperanto-movado dek jarojn kaj pli longe? Mi kredas, ke mi trovis analogion.

Se vi amuziĝas per *hazardludo*, kaj se vi estas “normala” homo, kiam vi rimarkas, ke jenan vesperon vi restis senmona, vi decidus, ke vi jen-vespere *ĉesigos* la hazardludon. Vi povos rekomenci, kiam vi rehavos monon, kiun vi povos disponigi por tiu celo. Tiu estas la normala sinteno. Supozu nun, ke vi en jena vespero “ne fartis tute bone”, kaj ke vi, malgraŭ la senmoneco, daŭrigis hazardludi. Hodiaŭ vi havas 100-frankan ŝuldon.

Negrave: se vi estas iom “normala” homo, vi ĉesas hazardludi dum kelka tempo, kaj klopodas trovi solvon por iom post iom repagi la ŝuldon. *Sed se* via ŝuldo atingis 10'000 frankojn, vi emos ne haltigi la hazardludon. Ĉar vi *tro* investis en tiu ludo, kaj eĉ se vi ne plu ludos, vi ne plu scias, kiamaniere repagi la mankantan monon. Do iusence vi sentas vin devigata daŭrigi “por ne forĵeti la jam investitan sumon”: iam vi certe gajnos, kaj *tiu gajno kompensas vin* de via nuna malfacila situacio. La sperto instruas, ke baldaŭ via ŝuldo atingos 100'000 frankojn.

La sama situacio koncernas la *borso-hazardantojn*. Ili povas ĉesigi malbonan negocon nur komence. Ĉar poste, kiam la investo (kaj la perdo) jam estis grandega, ili preferas daŭre investi, kvankam perde, en la vana espero, ke “bonŝanco” revenos.

Supozeble, longjaraj esperantistoj estas *tiaj homoj*. Post dek jaroj, ili iusence “tro investis” en Esperanto, por deklari, ke tamen ne konvenis, kaj tial ili ne povas rezigni. Kaj ili daŭrigas en tiu investo, esperante ricevi foje profiton. Kiu ne venos. Kelkaj, plie, agas precize kiel hazardluduloj: ili mensogas pri la venkoj kaj la gajnoj. Ĝenerale, ili artefarite pligrandigas kaj/aŭ plimultigas la venkosituaciojn, kaj “forĝegas” la malvenkojn.

*Ni revenu al la demando pri la utileco de la lingvo*, t.e. al la *servoj*. Zamenhof opiniis, ke lingvo devas esti utila. Lingvo kia Esperanto ne devas resti nur lingvo de la koro, sed ankaŭ lingvo de la praktiko. La lernintoj devas tiri profiton el la peno oferita al la lerno de la lingvo. Kiu profito? Kompreneble, temas pri iu ajn profito (morala, narcisisma, ekonomia, kultura...): ĉiu homo scias mem, kion li deziras. Tio eblas, se ekzistas "servoj" por atingi onian celon.

La servoj kreas utilon al la lernanto, kiu tial akiras pozitivan bildon pri la lingvo kaj pri la movado. Formiĝas do speco de “fideleco” inter la novbakito kaj la movado: ĝi konkretiĝas en la kreo de *lojaleca rilato* inter la novbakito, la movado, kaj la lingvo.

Se la utilo estas malgrava, ĉar la servoj estas limigitaj, la bildiĝo de la lingvo fariĝas malbona (“Esperanto estas eksa, iama, olda, obsoleta, eksmoda”), kaj la novbakito emas forlasi la movadon, ofte kun la sento pri trompiteco.

## ***Kelkaj trajtoj de la movado***

La esperantistoj, rilate sian movadon, estas konservativa populacia grupo. Ili iel sentas, ke ilia movado, ekde 1960, estas fakte Rückzugsbewegung (malŝvel-movado). Movado, kiu servas al preservo kaj al enmuzeigo de la iamaj zamenhofaj esperoj. Parto de la *ideologio de Esperanto* estas fakte socio-psikologia konstruo, kiu celas defendi, klarigi, popularigi, kaj tial savi la nunan funkciadon kaj sinkredon de la movado mem, malgraŭ la malatingo de la zamenhofa pracelo. Ĝuste la malatingo de la pracelo devigas la esperantistojn pripensi pri la nunaj signifo kaj rolo de la Esperanto-movado.

Al la *transetna naturo* de la esperantistaro ni jam aludi. Ne malpli stranga estas la koncepto, laŭ kiu ekzistas ia Esperantista Popolo. Estas evidente, ke la uzo de la termino “popolo”, en tiu kunteksto, estas nura *metaforo*. La Esperanto-movado ne estas popolo, nek mem-elektita, nek diaspora, nek io ajn alia. Ekzistas “Esperanta popolo” kun la sama pravo, ke ekzistas “Futbalo-popolo”, “Bahaa popolo” aŭ “New Age popolo”. Kaj al tiu pseŭda popolo oni ofte atribuas imagitajn ecojn: nur la Esperanta popolo kapablas vidi supernacie, kiel la juda aŭ la armena diasporoj. Cetere, ankaŭ tiuj ĉi du popoloj tute ne kapablas “vidi supernacie”. Ni estas en plena lastjarcenta ideologia “nacikarakterita psikologio”. La plej interesa afero estas, ke la esperantistoj imagas pri si ĝuste tion, kion la eksteruloj ĉe ili *tute ne* vidas: nome, la kapablon vidi akre kaj trafte.

Alia karakterizo estas la fakto, ke kelkaj el la instrumentoj, utiligitaj por atingi la pracelon, *fariĝis celoj en si mem*. Nome, la beletro estis komence pensita nur kiel “ekzemplo” de lingva efikeco (Janton 1988). En plej bona kazo, kiel bazo por konstruo de Esperantlingva Weltliteratur. Nun ne plu: ĝi estas celo en si mem. Sed bedaŭrinde ne ĉiam la rezulto estas



kvante kaj kvalite akceptebla. La sinteno de la esperantistoj, tiurilate, estas kelkfoje erara. Nome, ekzistas ekscesa sanktigo de kelkaj (tamen, certe, kleraj) verkistoj esperantistoj, preter iliaj faktaj literaturaj meritoj. Kaj ekzistas speco de sanktigo de io ajn, aperinta en Esperanto. Mi aŭdis eĉ, ke "la Esperanta traduko fluas pli glate ol la nacilingva originala verko". Tio estas eĉ ebla, sed tio indikas nur la malaltan konon de la koncernato, pri la pritraktita verko.

Tiŝljar (1997) proponis, ke iusence la Esperanta popolo *evoluigu sian propran reprezentan "registaron"*. Eble en decidota loko, unueca aŭ diaspora. Sed la fino de la Dovra soleo<sup>2</sup> devus atentigi nin, ke tio ne eblas. Metaforo ne estas argumento: la Esperanta movado ne estas popolo, kaj cetere tia juĝistaro estas iom naiva afero. Mi vetas, ke multaj konsentos kun ĝi, kondiĉe ke ĝi juĝu laŭ iliaj (antaŭ)-juĝoj. Se la juĝisto esprimos alian juĝon, per kiu rimedo oni provos konvinki la nekonsentulojn, akcepti la juĝon? Krome, se oni subigus min al juĝo, mi dezirus ricevi profesion juĝiston. Mi demandas min, kiu utopiulo inventis tiun strangajon. Supozeble li nenion sciis pri la fundamentaj kverelemo kaj maldisciplino de la esperantistoj.

Tradicio de tiu memelektita "popolo" *estas la uzo de komuna lingvo*. Plua karakterizo de tiu popolo estas la *seriozaj kaj detruigaj disputoj* pri iuj detaloj en la lingvo-uzo: kvazaŭ de tio dependus la ekzisto de la popolo, aŭ de la lingvo mem. Fakte ili kredas, ke foje la racio venkos. Tiam oni tiam adoptos internacie tiun lingvon, kiun ili flegas. Pro tio ili devas ĝin defendi kaj konservi je plej perfekta nivelo, "ĝuste interpretante" ĝian gramatikon, sintakson, grafion, semantikon. Ĉar de tiu "ĝusta" enkonceptigo venos ĉu la akcepto, ĉu la rifuzo de la lingvo mem. Se Esperanto ne estos perfekta, evidente la institucioj prijuĝontaj pri la enkonduko de la Internacia Lingvo ne akceptos ĝin. Iusence, la homoj ĉi-nivelo rezonas precize kiel la idistoj aŭ la Interlingua-istoj. Laŭ ili, ne gravas la socia situacio kaj la politika sinteno. Certe oni akceptos internacian lingvon, sed ja Idon, aŭ respektive Interlingua'n, ĉar ili estas "perfektaj".

Tiajn disputojn ni rimarkas, ĝenerale, en neniuj aŭtente loka aŭ ŝtata lingvanaro. Ili certe ne tuŝus profunde la koron de alilingvanoj. Ne nur: ili tiom kredas pri sia naturo kiel popolo, ke ili parolas Esperanton eĉ inter samlingvanoj. Tio aspektas vere kurioza en la ekstera mondo. Eĉ pli mirige: inter iliaj misvaloroj troviĝas la fakto, ke oni parolu nacilingve en Esperanta medio. Tion oni nomas riproĉe "krokodili".

La Esperanto-popolo havas delonge neniun aktivan rilaton plu kun la fakta situacio lingva en la mondo. Tial *ĝi aspektas fakte nevidebla*: ĉar ĝi ludas neniun rolon en la nuna socio. La mondo irus same bone kaj same malbone *ĉu kun ĉu sen* la Esperanto-movado.

Ĝi estas tiom konservativa, ke ĝi sanktigis ne nur la lingvon (pere de la Fundamento), sed ankaŭ unu el la lingvaj apartaĵoj, kiu speciale malpermesas ĝian publikan aperon, eĉ en la malmultaj lokoj kaj momentoj, kiam tio eblus. Nome la *ortografion*. Aparte, tiu ortografia sistemo malhelpas ĝian uzon eĉ en la plej moderna tutmonda komunikilo: la tuttera reto (WWW). Laŭvere, kelkaj esperantistoj rimarkis tion, kaj ekpropagandis kelkajn ortografiajn reformojn (mi mem uzas unu el ili). Tre bone. Sed ili kredas, ke nur ilia reform-ortografio permesos la oficialigon de Esperanto. Ni estas ĉiam je la nivelo de kelkaj idistoj.

---

<sup>2</sup> Antaŭ ĉ. 30 jaroj aperis en la Esperanto-ĵurnalaro regulaj anoncoj, en kiuj oni propagandis pri almigro al Dovro (UK: Dover), por fondi specon de Esperantlingva kolonio. Ilin subskribis iu "Dovra Soleo". Sed ekzistas pli fruaj provoj konstrui ne nur metaforan Esperantujon. Antaŭ la unua mondmilito, en iu "neŭtrala" parto de Belgio: nome en la vilaĝo *Moresnet*. Koncerne Moresnet, tre grava kaj elĉerpa estas la historia studo de Andreas Künzli en *Plansprachen, Neutral-Moresnet* ([http://www.plansprachen.ch/Jahrhundert\\_des\\_Esperanto\\_MORESNET.pdf](http://www.plansprachen.ch/Jahrhundert_des_Esperanto_MORESNET.pdf)).

## ***Ĉu Esperanto diras ankoraŭ ion al la mondo?***

Indas demandi nin, ĉu Esperanto havas ankoraŭ ion por diri al la mondo, ĉu la Esperanto-movado havas ankoraŭ mision, aŭ celon en nia mondo.

La *falo de la Berlina muro* kreis problemojn al la movado. Ekde la 100a datreveno de la naskiĝo de Esperanto, kreskas krizo en Esperantujo, skribas Korĵenkov. La krizo venas ne de la datreveno, mi aldonas, sed de la fakto, ke la nova politika situacio, lingve, kulture kaj politike, transformis grandan parton de Eŭropo. Iusence, la esperantistoj iom kaŝe ĉiam kredis, ke ekzistas usona lingva imperiismo; ke Esperanto estas la ĝusta ilo por bari ĝian antaŭenmarŝo, ankaŭ dank al la fakto, ke la Soveta Imperio neniam konsentos kun tro granda sialanda disvastiĝo de la angla lingvo. Iusence, tio bone edziĝis kun ia baza esperantista kontraŭ-usonismo, kiun cetere nur malmultaj esperantistoj *publike* agnoskis.

Sed en la eks-sovetiaj landoj, la rolon de la rusa ricevis aŭtomate la angla, kaj la deziro lerni Esperanton subite malaperis. La Esperanta movado perdis sian memfidon, kaj kelkaj malprogresoj montriĝis. La sloganoj ne plu bone funkcias.

La idealisma fono senkoloriĝis, ĉar la *Zeitgeist* (epok-etoso) ne plu estas favora. Fakte, la nuna mondo montris, ke *ĝi tamen atentis pri paco*, pri justeco, pri internacia juro, pri rajtoj homaj kaj bestaj, ktp, multe pli ol antaŭ deko da jaroj. Ankaŭ la esperantistoj havis proponon en tiu direkto, sed la rimedojn, kiujn la esperanto-movado konsideris oportunaj, la mondo rifuzis. Eble pro la fakto, ke la Esperanto-valoraro estas bazita iom tro sur bonvolo, sur kulturo, sur lingvo, sur eduko, sur kredo. Tiu valoraro estas parte tro psikologia, parte tro simpligita por funkcii en la nunaj komplikegaj cirkonstancoj. Sed fakte por la esperantistoj ĝi restas centra.

Propagandcele, la esperantistoj tamen substrekas kaj la idealismecon de la Esperanto-movado, kaj la raciecon de la solvo Esperanto.

Oni povas supozi ke tiu informado ne ricevas la necesan atenton, ĉar ĝi estas ofte nekomprenebla: fakte, la pertinenteco de tiu mesaĝo en la nunaj cirkonstancoj ne ĉiam estas evidenta. Tio kreas problemojn. *Manko de pertinenteco* (aŭ la impresoj ĉe la ekstera publiko, ke mankas pertinenteco kun la hodiaŭa mondpoblemoj) ne plibonigas la prestiĝon de la movado kaj de la lingvo. Ni volus agi sur prestiĝa fono, sed la stereotipoj pri esperantistoj kaj Esperanto estas principe negativaj.

Korĵenkov (1998) skribis interesan libreton pri tiuj temoj, sed se vi legas ĝin atente, vi rapide rimarkas, ke temas pri anesteziilo por esperantistoj. Ĉar montriĝas en ĝi, ke indas dubi, ke valoras la penon plulabori por Esperanto. Tio klare montras, ke la krizo estas multe pli grava ol la aŭtoro aŭdacas agnoski.

## ***La apartaj “mitoj” de la Esperanto-movado***

La Esperanto-movado transformiĝis, de loza batalmovado, al movado, kiu devis ekipi sin por “trapasi dezerton”, t.e. por atendi la estontan venkon, kiun oni imagis en pli fora tempo. Do ĝi devis ellabori *proprajn mitojn*. Mito celas simbole reprezenti ion komunan en ĉiuj anoj de difinita populacio. Ĝi estas speco de komuna gluo je kredo- kaj penso-nivelo. Analoge, rito estas komuna ceremonio, kiu celas kunigi la partoprenantojn, transdonante senton pri aparteneco. Ekzistas multnivelaĵoj kaj mitoj kaj ritoj. Kaj mult-temaj. Ili koncernas, ĝenerale, la historion de la homgrupo, la devenon de la fondintoj de tiu homgrupo, la bildon, kiun la

grupanoj flegas pri si mem, la celojn, kiujn ili deziras atingi, ktp. Kompreneble ili ne koncernas la veran devenon, la *veran* historio, la *verajn* biografiojn, la *verajn* celojn.

Ankaŭ la mitoj, kiel la ritoj, evoluas. Ili dependas de historiaj cirkonstancoj, de specialaj momentoj, de modoj, de ekstergrupaj influoj, de ioma riĉiĝo, aŭ de rapida malriĉiĝo. Kelkaj estas praaj. Kelkaj - pli modernaj. Kelkaj pli atentigas nin al la valoroj. Kelkaj atentigas nin al agado, al *praktikado*, al la fakta vivo (al pragmatiko). Kiuj estas la ĉefaj mitoj en Esperantujo? Certe multaj. Kelkaj estis mirinde ekzamenitaj en la elstara verko de Sikosek (1999). Kun la verkoj de Ulrich Lins, temas pri la supozeble sola fidinda libro pri diversaj aspektoj de la Esperanta ideologio (t.e. mitologio). Aliaj verkoj, i.a. de Gudskov kaj de Korĵenkov, kiel dirite, estas nura remaĉado de mitoj.

Ni rimarkas *plurspecajn mitojn*. Ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri Zamenhof, nome pri lia vivo, pri lia rilato al la lingvo, pri liaj ideoj, pri liaj rilatoj kun la judismo, pri lia sinteno (oferemo, genieco, suferoj, ktp).

Mi sekvas en tio modernan kaj resuman mito-transskribon, nome la *Pragan Manifeston*, ankaŭ se ne komplete. Gravus rimarki, ke Esperanto kaj la Esperanto-movado troviĝas profunde implikitaj reciproke. Sen la lingvo, la movado ne havas kaŭzon por ekzisti; sed, sen la movado, Esperanto, en la nuna situacio, aŭtomate malaperus. Iusence, do, la Esperanto-movado havas la taskon disvastigi Esperanton, kaj Esperanto estas la flago, la mesaĝo kaj la ilo de la Esperanto-movado.

### ***Mitoj pri la lingvo mem***

- **Esperanto ne estas planlingvo, ĉar ĝi transformiĝis al vivanta lingvo.**

Tion siatempe proklamis jam Edmond Privat (1912). La emocia sinteno de la esperantisto por la “sankta afero”, laŭ li, permesis, ke la lingvo “enviviĝu” en la uzo kaj parola kaj literatura. Per tiu “viviĝo” kreiĝis literaturo, kiu plenalore ekzistis jam en 1912! Privat aludas al la *Unua libro*. Kaj kreiĝis komunaj mitoj kaj ritoj. La enhavo de la himno estas mito, kaj ties kantado estas rito. Naturo de la lingvo kaj talentoj de la homoj helpis.

Detlev Blanke (1985) bone klarigis la diferencon inter planlingvoj kaj *duon-planlingvoj*, sed fakte mi timas, ke temas pri diskutablaj distingo. Sed la esperantistoj ne haltis je tio. Ili proklamis sian lingvon “natura”, sed ne nur pro tio, ke oni lernas ĝin, kaj ke oni parolas ĝin kiel iun ajn alian lingvon. Tute ne: ĝi naskiĝis nur ŝajne en la kapo de Zamenhof. Aŭ, alternative: ĉiuj ekzistantaj lingvoj estas same “nenaturaj” kiel Esperanto. La lingvo Esperanto estas la *kerna mito* en la Esperanto movado. On ĝin ekkomparis kun la latina, la germana, la israela, kiuj estus same “artefaritaj” kiel Esperanto. Ĝi estus pli facila ol iu ajn alia lingvo. Sed fakte, ne utilas lerni eĉ facilan lingvon – kiun tamen tro malmultaj homoj parolas. La Latinoj volonte lernis la grekan, kvankam por ili ĝi estis pli malfacila ol la kelta, ĉar ili celis alproprigi la altan kulturon, kiun la Grekoj kreis.

- **Ĝi estus la plej taŭga propedeŭtikilo al lingva lernado (Frank 1994).**

En tiu kampo, Esperanto estis provo, kaj ne fakto nedisputebla, ĉar ne ĉiam la eksperimentoj estis decidige konkludaj. Restas kelkaj duboj: eble lingva propedeŭtiko povas fariĝi *ankaŭ tra aliaj rimedoj*, kaj ne nur tra tiu ĉi lingvo. Eble, ĉiu lernata lingvo estas taŭga propedeŭtikilo. Eble, ne nur lingvo povas utili kiel propedeŭtikilo. Mi estas konvinkita, ke eblas lerni du fremdajn lingvojn en “normala” publika lernejo. Sen bezono de Esperanto.



Certe, oni devas iomete ŝanĝi la didaktikan aparaton (kiu, cetere, dum la lastaj jardekoj miloble boniĝis). Ekzemple, la unua lingvo devas esti eklernata jam lernejo-komence, nome inter la 6-a kaj la 7-a vivojaro. Tra aktiviga metodo, kun vojaĝoj al eksterlando. La lerno de la dua lingvo devas komenci ne post la 10-a vivojaro, eble ankaŭ kontrastige kun la scioj akiritaj en la unua lingvo. En tiu senco, la unue lernata lingvo fariĝas "propedeŭtikilo" por la dua. Ĝenerale, en niaj lernejoj oni instruas la duan fremdan lingvon komencante tro malfrue, kaj dediĉante al ĝi tro malmulte da tempo. Pro tio la rezultoj estas malgrandaj.

Sed eblus ankaŭ fari aliel. Interne de la lerno de la propra lingvo (kiu en ĉiuj lernejoj de Eŭropo estas kerna fako), oni povas enkonduki kelkajn horojn, en kiuj oni "komparas" lingvojn (utiligante la lernatajn, aŭ, en multkultura civilizo, la fakte enfamilie uzatajn), en gramatiko, vortaro, sintakso. Laŭ mia memoro, io tia jam okazas en Svedio.

- **Principe, lingvo kia Esperanto estas aparta ilo por praktiki lingvan demokration.**

Per Esperanto ĉiu havus la samajn komunikajn ŝancojn, kaj en la vivo, kaj en la lerneja studado. La enkonduko de Esperanto kaj ĝia ĝeneraligita uzo reprezentus do la plej altan nivelon de racia kaj demokratia lingva politiko. Sed demokratio povas funkcii ankaŭ alimaniere, ekz-e per reciproka lingvo-lerno, aŭ per demokratia akcepto de lingvo komuna - kiu ne estas Esperanto. Se foje la Eŭroplandanoj decidus, ke la angla estos la komuna konfederacia lingvo, akcepti tion estas ja demokratieca.

Mi opinias, tamen, ke instrui Eon *devige* en iu ajn lernejo estas grava eraro. Tio ne utilas al la gelernantoj, kaj de donas rezultojn al la movado mem. Mi eĉ rimarkis, ke estas eraro instrui Esperanton *nedevige*, sed selekte, anstataŭ alian lingvon. Tiam la lernantoj kun malaltaj kapabloj (aŭ kun motivacio nesufiĉa) elektas Esperanton, "ĉar ĝi estas pli facila ol, ekzemple, la franca". Tiu motivacio estas *duoble danĝera*. Ĝi estas danĝera por Esperanto, ĉar ĝi fariĝas la rifuĝejo por ĉiuj malsukcesuloj. Ĝi estas danĝera por la lernanto mem, kiu lernas ion iel, sed sen konkreta perspektivo utiligi ĝin iam. Do temas pri *neutila lerno-laboro*. En lernejo, klare, oni laboras ankaŭ por atingi bonan lernejo-poenton, sed estas danĝere konstrui instru-sistemon, kiu limiĝas je tio.

### **Mitoj pri la Esperanto-movado**

"Esperanto estas elstara lingvo; kaj ĝia movado estas gvidilo sur kampo lingva, politika kaj demokratia". Mi ne scias, kio estas "gvida" je tutmonda nivelo, sed certe ne la Esperanto-movado. Kompreneble, estus bele, se estus tiel. Sed fakto estas, ke nuntempe, en la tuta mondo, la angla estas gvida kiel helplingvo, kaj la usona vivstilo (aŭ io, kio similas al ĝi) altiras ĉiam pli la junularon.

Oni ofte atentigis min, "ke oni ne povas kontraŭstarigi la anglan kaj Esperanton", ĉar Esperanto estas io alia. Konsentite, jes. Sed kion ni celis, kiel esperantistoj? Kontribui al la pligliato de la interlingva (kultura, turisma, komerca, scienca, ktp) komunikado per Esperanto. Tion atingis ne Esperanto, sed la angla. Do, tamen, ĉu mi ne komparu, tute simple ĉar Esperanto malsukcesis? Laŭ iuj, estas tiel.

Laŭ Korĵenkov (1998), oni ne povas kontraŭstarigi la anglan kaj Esperanton, ĉar ni ja estas en plena "usonismo": la angla aperas ĉie, nome en vendejoj, en polico, en kuraco, en lernejo, en literaturo, en komerco, en stacidomo, en muzeoj.

Ni ekzameni la tezojn de Korĵenkov, kaj ni aldonu kelkajn komentojn.

- Esperanto proponas helpojn lerni aliajn lingvojn.  
Certe, sed ĉiu fremda lingvo, supozeble, estas oportuna bazo por lerni pluan lingvon.
- Esperanto garantias helpojn en specialaj kazoj.  
Se vi scias la angla, tio estas pli facila: en multaj partoj de la tero ne ekzistas esperantistoj.
- Per Esperanto, vi ricevas sendiskriminacian traktadon.  
Tion peras multaj aliaj movadoj, ne nur la esperantista movado.
- La Esperanto-movado proponas modelon de nova mondo.  
Tio estas malrealo. Tio pli similas al deziro, al aspiro, ol al realaĵo.
- Esperanto reprezentas valoran hobion por interesaj aktivadoj.  
Tio veras, sed nur interne de la mondeto esperantista.
- Esperanto peras konatiĝon kun interesaj homoj.  
Cetere, ankaŭ la itala, la greka, la zulu, la angla peras similajn spertojn.
- Esperanto permesas realigon de propraj talentoj en turismo, internacia kulturo.  
La angla multe pli, gigante pli, sed ankaŭ la franca, la germana, la hispana.
- Esperanto garantias uzon en komputilo.

Tion emfazi, Korĵenkov tute ne devintus. Ĉar, kiel argumento, ĝi simpla inventaĵo. Komprenibile ekzistas kelkaj paĝoj en Esperanto, sed kiom pli multe da paĝoj ekzistas en la angla?

*Konklude pri tiu listo.* La fakta uzo de Esperanto *permesas malmulton*, kaj eĉ tiun malmulton, ne bone, ne komplete, ne plene. Nur niĉe, ja.

Ĉiuj homoj, kiuj iom rondiris la mondon, konstatas, ke, se oni scias la anglan, oni povas *ĉion tian ricevi* per la uzo de tiu lingvo, *en granda kvanto, en alta kvalito, kaj ĉie en la mondo*. La esperantistoj konstruis sian propran mondeton, kiu provas iel ekzemplece funkcii. Kun internacia kulturo specialnivela, kiu insistas pri tolero, pri diverseco, pri humanismo, kaj kun propraj komprenoj pri demokrateco. Tiu grupo intencas konstrui per propra decido internacian esperantistan “popolon”: novan, memelektitan, “diasporan” popolon, kun propra himno, propra “registaro”, propra flago, propraj sloganvortoj.

Esperanto ne funkcias kiel fakta internacia helplingvo, sed kiel sekreta lingvo de grupeto, kiu deziras distingiĝi, t.e. konstrui iom post iom specialan konscion pri si. En tiu senco, ekzistas specialaj lokoj, kie kunveni, por tie specife aktivati (fakte: paroli en Esperanto kaj pri Esperanto). Tiu kurioza homgrupo havas siajn sanktulojn, heroojn, martirojn. Ekzistas eĉ profetoj kaj akompanantaj predikantoj. Al tiu celo oni rekrutis eĉ Albert Einstein!

Sed bedaŭrinde, la “ekzempleco” de tiu mondeto estas *relative malriĉa*. Kaj tiu “ekzempleco”, bedaŭrinde, ne estas “ekzempla” por la ekstera mondo, kiu nenion rimarkas el ĝi. Kiam Umberto Eco asertis, ke li volonte vidus Esperanton roli kiel ĝenerala lingvo en aerhavenoj, multaj esperantistoj grumblis, ĉar eĉ Eco “nenion komprenis”. Eco tre bone

komprenis, male, ke la ekspekto de la mondo por internacia lingvo estas ĝuste tio. Bedaŭrinde nun tie paradus la angla, kaj Esperanto ekskludiĝis jam delonge.

Iusence, *la rezigno al la tutmondiĝo*, nome al la propono de Esperanto kiel komuna uzlingvo, kaj la limigo de Esperanto al niĉa “ekzempleca” mondo, reprezentas *Saure-Trauben-Reaktion*: “Ne eblis tion atingi, sed fakte tio ne gravas: ni ne vere celis tion”. Laŭ la Fedra rakonto, la vulpo volis manĝi vinberojn, sed li ne povis iin atingi. Li do asertis rezigne: “Nondum matura est, nolo acerbam sumere” (Ĝi ne jam estas matura, mi ne volas manĝi ĝin malmatura).

### **Mitoj pri Esperanta kulturo**

La “Esperanta popolo” longe pripensis pri si mem. Estis grave ellabori memkomprenon, kiu pravigas sian propran ekziston. Ĉefe post la amara konstato, ke Esperanto ne atingis la rolon, kiun ĝiaj unuaj pioniroj esperis. Havi kaj kultivi nur la lingvon, tio estus tro malmulte, kvankam evidente ne povus ekzisti Esperanto-movado sen la koncerna lingvo. La “Esperanta kulturo” estas la speciala etoso, en kiu la esperantistoj vivas sian esperantistecon. Ankaŭ Tiŝlar (1997) skribas pri la “esperanta” kulturo. Laŭ li, ties esencaj trajtoj estas la jenaj.

- Celo al tutmonda teritorio. Laŭ Lapenna, la identiĝo-nivelo de ĉiu unuopa individuo deiras de la loko, al la nacio, kaj fine al la internacio. Tamen tiu “vertikala” vojo de individuigo hodiaŭ komplikiĝis. La aparteno estas multe pli malsimpla, kaj ofte ankaŭ oblikva (tra la fako, la hobbio, praula origino, ktp). Ni vivas en mult-kultura socio, kie gravas la kulturnivelo, la migradaj tendencoj, la modaj tendencoj, la profesiaj ligoj, ktp.
- Atentigo pri *paco* kaj *amikeco*. Temas pri la kerno de la penso de Zamenhof, laŭ Janton. Ĝi riskas malaperi, se Esperanto disvastiĝus. Akompanas tion ankaŭ *temaro humanisma*: sinofero, sindonemo, la konscio, ke la utilo ne estas al la unuopa esperantisto, sed al la tuta homaro. Laŭ mi, tio certe estas centra en la memkompreno de la esperantistoj. Ĝi tamen ne estas ekskluzive esperantista. Aliaj movadoj, sen Esperanto, tre bone funkcias en tiu kampo. Eĉ pli bone ol la Esperanta movado (*Bahaanoj*, *Médecins sans frontières*, *Terre des hommes*, ktp).
- *Substreko de diverseco*, kaj *faciligo de kunekzistado* (Duc Goninaz 1988). Sed bedaŭrinde tio povas okazi nur interne de la movado: ekstere, la movado mem estas senpova. Piron skribas, ke al monda ordo devas korespondi lingva ordo. Mi komprenas tion, sed mi timas, ke tiu estas kaj restos Piron-a deziro. Ĉar la direkto de nia mondo estas alia. Eble pro tio, ke ni ne sukcesis tuŝi la racion de niaj aŭskultantoj. Aŭ eble, por ili la racio indikas ion alian. Cetere, ne temas nur pri lingva demando. Juro, edukado, pedagogio, teologio okupiĝas pri tiuj ĉi temoj.
- *Edukado al denaskismo*. Ni devas distingi inter pludono de Esperanto kiel familia lingvo, kaj vera denaskeco. Inter la esperantistoj, 25% el la gefiloj (laŭ Forster: 44%) scias Esperanton, sed ne denaske. Denaskeco, do, estas malgranda fenomeno. Sed el tiu familia pludono de Esperanto, kio restas? Denaska dulingveco estas normala kaj ofta situacio: sed laŭ kelkaj Esperantaj ideologoj, la Esperanta “denaskismo” estas iel alia ol la nacilingva. Ĝi estas speciala denaskismo, tipe esperanta. Pri tio parolis ankaŭ Ernő Csizsár (1994), kiu asertas, ke oni devas intence heredigi Esperanton. Certe, montriĝis, ke dulingvismo ne estas io danĝera. Tion pruvas la fakto, ke ĉiu dulingvulo lernas pli facile trian lingvon. Mi esperas, ke ĉiu lingva pludono al la gefiloj okazas, por la bono de la

gefiloj mem, kaj ne por la plezuro de la gepatroj, aŭ de unu el la gepatroj. Mi esperas, ke tio okazas ankaŭ en la Esperanta mondo. Sed ĉu la Esperanta denaskulo estas *enviinda*? Supozeble ne ĉiam, asertas Piron, kiu timas, ke el la kategorio de la denaskuloj naskiĝis multaj kontraŭ-esperantistoj. Marta Wacha (1998) priskribis siajn spertojn kiel denaska parolanto de Esperanto. Ŝi evidentigis sian iaman kaj nunan *embarason* paroli pri lingvo, kiu ne vekas miron aŭ admiron, se oni parolas pri ĝi; kiu ne permesas studi, specialiĝi, gajni monon, havi pli bonan postenon; kiun oni povas uzi nur sporade, ankaŭ en la familio. Eĉ pli: ŝi klopodis kaŝi, ke ŝi scias Esperanton, pro la malbona bildiĝo, kiun ĝi ĝuas inter la "normala" hungara popolo.

### ***Mitoj pri defendo je lingvaj minoritatoj***

Laŭ Janton (1988), la Esperanta kulturo estas kulturo nealtrudiĝa, kaj tial Esperanto *bone peras inter etaj kulturoj*. En tio ni retrovas ankaŭ Duc Goninaz (1988), laŭ kiu Esperanto, iusence, estas specife “interindividua lingvo”. El tiu vidpunkto enkondukiĝas la speciala humanisma valoro de la lingvo. Ni povas rimarki ĉi tie, ke estus malfacile demonstri, ke io tia ne iel rilatas ekz-e la italan, uzatan en memvola kunteksto plurlingva. Cetere, kiam mi estis en Kimrio, mi parolis angle (ĉar mi ne konas la kimran); kiam mia familio estis en Katalunio, mi parolis katalune, ĉar mi konas ĝin, dum miaj filinoj paroli kastilie. Sendamaĝe. La koncernaj homoj bone komprenis, ke punta lingvo estas necesa kaj dezirinda<sup>3</sup>. Cetere, la demando de "etaj" kulturoj kaj lingvoj, ne estas nur lingva, sed ĉefe kultura. En Britio, vivas ankoraŭ lingvaj minoritatoj, kun propraj rajtoj: la kimroj kaj la goideloj. En Turkio, la multnombra kurda popolo estas senrajta. En Italio, la premo de Aŭstrio permesis tre bonan situacion de la aŭstrianoj en Sud-Tirol. Male, la Slovenoj troviĝas en senkompare pli malriĉa situacio. En Francio, nur la franca ekzistas. Hispanio, post la malfacilaj Franko-jaroj, revenis interesa renaskiĝo de la lokaj lingvoj.

La *mito pri la defendo je lingvaj minoritatoj* estas io esence nova, en la Esperanto-movado. Ĝi ne estas origina. Dekomence, Esperanto estis lingvo, kiu ligu inter si la grandajn komuniklingvojn (en la epoko de Zamenhof: la franca, la germana, la angla). Sed ŝajnas, ke la specialaj lingvaj trajtoj de Esperanto (facileco, transkultureco) permesas kontribuon al la defendo de mortantaj kaj de minacataj lingvoj. La perdo de lingvo estus io nemezureble grava.

Bedaŭrinde nin aŭskultas nek Baskoj, nek Romanĉoj, nek Okcitanoj. Male, la historio rakontas al ni, ke la mondo estis foje plena de “malaperontaj” (nun mortintaj) lingvoj. Ni vidu kelkajn ekzemplojn.

- Iam oni parolis kelte en Svislando. Helvetion invadis la Romianoj, kiuj konstruis la unuajn urbojn, kie la latina estis la uzata lingvo. Pli malfrue, nome en la daŭro de la 2-3-a jarcento p.K., la Keltoj perdis sian lojalecon al la kelta, kaj preferis adopti la latinan. Ĉar ĝi estis lingvo prestiĝa. La juro, la administrado, la eduko adoptis la latinan, kaj supozeble ankaŭ la religio (ne nur la kristana!). En la kelta iu povis interkompreniĝi kun siaj vilaĝanoj. En la latina, kun civitanoj de la granda Roma

---

<sup>3</sup> La sola lando, en kiu tiu sinteno estas nepraktikata, estas Germanio, t.e. germanlingva Svislando. Se ekz-e franclingvano petas surstrate informojn en t.n. normgermana, oni preskaŭ tute certe respondos al li svisgeman (kun la malagrabla rezulto, ke li ne komprenas). Bedaŭrinde ne ĉiuj popoloj akceptas lingvan diversecon kaj interkulturecon. Ili volas nenion, eĉ ne Esperanton. Feliĉe, ĉiam pli multe da Germanoj komprenas iom post iom, ke oni devas distingi inter malsamaj niveloj (ankaŭ lingvaj) de komunikado. Tio estas kerna en la moderna civilizo.

imperio. La Tiĉinanoj parolis kelte, kaj ankaŭ la Romandoj. Pli poste invadis la orienton de Helvetio la Alemanoj. Ili estis tre malmultaj, sed fortaj. Ili enkondukis sian regadon tiel, ke la alemana (dialekto de la germana) fariĝis lingvo grava en la administrado kaj en la juro. Ankaŭ la regatoj faris pluan paŝon. Ili forlasis la latinan, kaj adoptis la alemanan. Nur en la Retiaj Alpoj malgranda homgrupo rezistis kontraŭ la ĝermanigo: la Romanĉoj. Supozeble tiu tuta evoluo okazis sen granda premo, kaj sen perforto, almenaŭ rilate la lingvon. La homoj iom post iom forlasis sian lingvon, favore al alia, pli grava kaj pli dezirinda. Ĉu ni vere bedaŭras la ŝanĝojn?

- Multaj ne scias, ke Londono estis latina urbo, kaj ke en Anglio oni parolis ne nur brite, sed ankaŭ latine, ĝis Anglion invadis la Saksoj. Supozeble la Latinoj ne asimiliĝis al la alvenantaj Saksoj. Oni ilin simple ekstermis. La Saksoj estis pli barbaraj ol la Latinoj, kaj la Britoj ne toleris la ĉeeston de la Latinoj, kiujn ili ĉiam konsideris "konkerantoj", malgraŭ la alta civilizo, kiun ili enkondukis en Anglion. Ĉu la nunaj Londonanoj bedaŭras la formorton de la latina?
- Se foje mi alparolus vendistinon en butiko de la svisa urbo La Chaux-de-Fonds, parolante en la franca dialekto de tiu urbo, certe *ŝi ne nur ne komprenus min*, sed eĉ ne rekonos pri kiu lingvo temas. Ŝi certe kredus, ke mi venas de iu stranga kaj malproksima loko. Neniu hodiaŭa ĉodfonano konscias pri tiu radikala lingva ŝanĝo, okazinta antaŭ cent jaroj precize, kaj pro tio neniu bedaŭras plu tiun malaperon.

La Okcitanoj (kaj la Provencanoj) mem ne plu kredis je sia propra lingvo, kaj forlasis ĝin, adoptante la francan. La mito de la perforta francigo de Okcitanio estas malvera. Ĝis 1950, almiĝinto al Okcitanio pli-malpli senescepte devis lerni la okcitanan, se li volis rilati kun la loka popolo. La socia premo estis alta. Ekde 1950, tre rapide, la okcitanaj gepatroj rezignis pludoni sian lingvon al siaj gefiloj. Eble pro la naskiĝo de la televido, eble pro la pli forta deziro egaligi kun parizanoj, eble pro la pli forta enmigrado el Norda Francio. Same okazas kun la Romanĉoj. Ili rezignis ankaŭ komuniki okcitane kun ne-okcitanoj.

Sed la Irlandanoj restas Irlandanoj, malgraŭ la forfalo de la lingvo, dum la Romanĉoj, sen la ekzisto de la romanĉa, malaperos definitive, ĉar ankaŭ kulture ili tro similas al la Svisgermanoj (en religio, kutimoj, muziko, manĝokulturo, ktp). Certe, morto de lingvo estas ĉiam io bedaŭrinda, sed ĝi estas io neevitebla. La parolantoj perdas sian senton de lojaleco rilate sian lingvon, kaj esperas plibonigon de sia sorto per alia lingvo. Ĝi malĝojigas nur la homojn, kiuj spertas tiun fenomenon. En la antikvaj tempoj, la malapero de lingvo bezonis longajn tempo-periodojn. Nuntempe, cent jaroj sufiĉas plene.

Mi mem spektas ĝuste tion. Mi naskiĝis en Tiĉino, kiam ankoraŭ ekzistis tiĉinlingvaj unulingvuloj (ili forgesis la italan, lernitan enlerneje). Mi iom post iom maljuniĝas en Tiĉino, kiam en la urboj kaj eĉ en multaj montvilaĝoj la iama dialekto estas ja ankoraŭ komprenata, sed ne plu parolata. Ĉefe la virinoj ne plu volis aŭdi pri la iama mizero, kiu regis en la lando. Ili volis ĝin forgesi. Por ĝin forgesi, estis necese forgesi ankaŭ la lingvon, kiun tiutempe oni parolis, la lokan dialekton.

Stariĝas demando: ĉu estas *la malapero de la lingvo*, kiu kondukas *al la malapero de la identeco* (tezo de kelkaj lingvaj naciistoj, inkluzive de kelkaj esperantistoj), aŭ ĉu eble la vero estas inversa, nome: la malapero de la identeco povas konduki al la malapero de la lingvo. Do, ne la lingvo estas centra, sed la kultura identeco.



Alzaco estis lando germanlingva, sed politike kaj kulture ligita al Francio. Iom alia ol Francio, fakte, ĉar ĝi akceptis jam frue la judojn, kaj estis duone protestanta. Al Francio, ĝi donis valorajn sciencistojn kaj generalojn. La sento pri identeco de la Alzacanoj komencis ŝanceli en la milito inter Francio kaj Prusio (1870). Alzaco refariĝis franca post la fino de la unua mondomilito (1914-1918). Albert Schweizer, tiam jam en Afriko, fariĝis subite Franco, sen kono de la franca! Bedaŭrinde la teruraĵoj de la dua mondomilito kreis pluajn demandojn al la kultura identeco de la Alzacanoj. Kiuj, supozeble, rezignis pri la "germana" aspekto de la lingvo, adoptante la francan. Hodiaŭ, fakte, preskaŭ ĉie la infanoj parolas, hejme, la francan. En la lernejoj, ne pli ol 5-10% de la infanoj hejme uzas la alzacan dialekton. Tiamaniere malaperas lingvo kaj transformiĝas konscio.

Tiuj rimarkoj atentigas nin pri ebla estonto. Amiko mia, atenta observanto de Norda Irlando, rimarkis, ke ekde 5-6 jaroj en Dublino manifestiĝas kulturaj ŝanĝoj en la junularo. La junuloj, kaj protestantaj, kaj katolikaj, rapide usoniĝas, en pensmaniero, modo, junularaj aktivadoj, ktp. Ili lernas ne plu la malnovajn patriotajn kantojn. Ili lernas la nunajn usonajn kanzonojn. Ili entuziasmiĝas por la samaj modoj, por la samaj kantistoj, por la samaj amas-fenomenoj. Ofte, kune. Por ili, la iama interbatalado estas passé (neinteresa pasintaĵo). Usoniĝo *peras novan identecon*, kaj novan bazon por forgeso de iamaj konfliktoj. Se foje tio okazus ankaŭ en Serbio kaj en Kosovo, se la serba kaj la kosov-albana identecoj malaperus, favore al komuna usoneca identeco, eble en tio kuŝus eblo alfronti konstrue situacion nun seneliran. Eĉ pli: la lingva demando, en tio, ne estas kerna. Nome, usonaniĝo ne signifas uzon familian de la angla, sed nur uzon interhoman. Hejme, vi libere uzas iun ajn lingvon.

### **Mitoj pri la Esperanta turismo**

Rondiri la mondon estas interese kaj grave. Sed per Esperanto oni spertus ion apartan, kiun oni ne spertas per la uzo de la angla. Ĉar Esperanto permesus komunikadon *sur sama nivelo*. Laŭ Janton (1988), la naciajn lingvojn scias nur por la superaj sociaj klasoj ("la riĉuloj"). Esperanto estus por la laboristoj. Laŭ Piron (1994), la demando estas psikologia: la uzo de nacia lingvo *à la longue* (sur longa periodo) estas stresiga. Ĝi reprezentas frustracion por la komunikanto, kaj fonton de malfaciligo, perdon de kulturaj refleksoj, problemojn en la traduko. Cetere, ofte oni devas rezigni je la rekta povo de la vorto.

Sed hodiaŭ ni rimarkas, ke ankaŭ laboristoj, almenaŭ ĉe ni, devas lerni ĉu la germanan ĉu la anglan, por efiki en sia propra laboro. La instruo de fremda lingvo fariĝis demokratia entrepreno.

Plue, estas klare, ke paroli en fremda lingvo povas reprezenti problemon. Sed la uzo de Esperanto ne ĉiam helpas: ekzistas ankaŭ bontagulaj esperantistoj, kaj "eternaj komencantoj". Kelkaj el niaj bontagulaj esperantistoj fajfas pri korekta lingvouzo. Ili parolas fuŝe, kaj tio sufiĉas al ili. Bone: sed tio okazas ankaŭ ĉe multaj german-parolantaj itallingvanoj. Ili ne interesiĝas, ĉu ili bone uzas la deklinaciojn kaj la sintakson. Ili elpafas vortojn, senprobleme.

La fakto estas, ke Esperanto permesas komunikadon nur inter esperantistoj, por ilin interligi kaj integri. Sed la celo de Esperanto (kaj de Zamenhof) ne estis la kreo de iu en si mem fermita movado.

### **Mitoj pri la ekologia misio de la Esperanto-movado**

Ĉar Esperanto estas interkompreniĝa lingvo, ĝi estas ankaŭ *ekologia* ("ŝpariga"). Ĝi funkcias kiel ponto inter kulturoj. Sed ĝi ankaŭ konkrete ŝparigas la mondon per pli rekta aliro al

interkompreniĝo, kaj per pli malmultekosta disvolviĝo de la komunikado. Por Janton, la propono “Esperanto” estas parto de ŝparado, t.e. de ekologio. Studo de fremda lingvo kostas monon, tempon kaj laboron. La studo de Eo estas malpli kosta. La ekstera mondo tamen demandas sin, kial lerni ŝparigan lingvon... kiun praktike neniu uzas. Ĉu ne estus pli ŝparige utiligi lingvon jam disvastiĝintan, kies plua ĝeneraligo kostos malpli multe, kaj kiu tuj proponas komunikan profiton?

### ***Mitoj pri transetna identiĝo***

Zlatko Tišljar substrekas, ke Eŭropo bezonas *identigan lingvon*. Unu sola eŭropa lingvo, kiel liga lingvo, kreskigus la naciismon. Esperanto naskiĝis por efiki sur tutmonda nivelo, sed Tisljar proponas limigi ĝin interne de Eŭropo. Bedaŭrinde, facila observo nin atentigas, ke identiga lingvo ne ekzistas ĉie, kaj eĉ tie, kie ekzistas komuna lingvo, ĝi ne efikas indentige. Ĉar temas pri demando kultura, kaj ne lingva.

Svislando estas bona ekzemplo de la fakto, ke tio ne estas tiel aŭtomata. Ekzistas, certe, iaspeca sento de svisa identeco, kiun peras tamen neniu lingvo. La nunaj Eŭropanoj, nuntempe, aspiras al la angla, aŭ restas indiferentaj. Male, Esperanto estas identiga nur por la esperantistoj. Ekzistas pluraj niveloj de identiĝo: la angla aspektas ĉiam pli kiel la lingvo, per kiu identiĝas la vivo-sukcesuloj, la kultivantoj de la estonto, la modernospertuloj.

### ***Mito pri la neevitebleco de Esperanto***

Sikosek (1999) atentigas nin en sia libro, ke ekzistas kroma mito. Tiu de la neevitebleco de Esperanto. Ivo Lapenna havis klarigon: ekzistas speco de lingva batalo. Neniu lingvo povos gajni tiun batalon. Ĉar la naciismoj estas tro fortaj. Tial devige venos Esperanto, kiun enkondukos la sumo de ĉiuj nevenkeblaj naciismoj, kiuj fariĝos ĝuste pro tio internaciistaj kaj humanistaj. Ni facile rimarkas, ke temas pri la apliko de la hegela logiko: la nego de la negoj. Sed kiu garantias, ke tiu nego de la negoj fakte okazos? Kiu garantias, ke la hegela logiko funkcias? Ĝisnun, ĉiuj provoj, ĝin observi en la mondo, fiaskis. Sed eĉ se tiu antaŭvido estus ĝusta, kiam okazos la adopto de Esperanto? Iuj respondas: eble post 200 jaroj. Sed kiu scias, kia estos la mondo post 200 jaroj? Eble la homoj tiam havos vere voĉtradukilojn porteblajn. "Subite ĉio ŝanĝiĝos", kelkaj esperantistoj asertas. Ne: ĉar dank al la angla, la lingvoproblemo malakriĝas, se entute ĝi ekzistas.

Mi supozas, ke temas esence pri religia vido: post la malbeno de Babelo, devas certe veni rebonigo. La demando estas la jena: multaj opinias, en nia socio, ke en Babelo ne okazis malbeno, kaj ke ĉiuokaze, ĝi ne tuŝis la lingvon.

### ***Neceso de propagando***

Ĉiu lingvo disvastiĝas per natura disradiado. Se ĝi estas utila, depende de la cirkonstancoj, oni lernas ĝin. La latinan oni ne propagandis. Ĝi estis ilo de la registaro kaj de la kulturo. La francan oni ne propagandis. Ĝi estis la iama lingvo de tuteŭropaj kleruloj. La svisgermanan, en Germanio, oni ne propagandas. Ĝi estas la normala komunika lingvo, sen kiu vi ne povas interkompreniĝi. Male, Esperanto vivas nur tra kaj per la misieca aktivado de la esperantistoj. Ĉiu propagando estas duflanka. *Interna* kaj *ekstera*. La *interna propagando* estas fenomeno konata kaj necesa: indas disvastigi mitojn kaj ritojn pri la origino, la kerno, la celoj de Esperanto ankaŭ interne de la Esperanto-movado.

Sed indas paroli pri tio ankaŭ ekster la Esperanto-movado. *Ekstere*, la informado pri Esperanto ne multon atingas. Ankaŭ la homaranismo, en la formulado de la esperantistoj, hodiaŭ ne plu influas multajn homojn. Ĝi aspektas male kiel efika interna glu-ideologio interne de la movado, apud la modeste pragmatika propagando pri praktikado.

Certe, kiel asertas Janton, la “praktikema” doktrino pri la rolo de Esperanto rapide montriĝis jam siatempe, kaj ankoraŭ nun nesufiĉa: tial firmiĝis la aspekto filozofia, morala kaj preskaŭreligia de la "misio de Esperanto".

Informado al-interna kaj al-ekstera okazas ankaŭ per informoj pri “favorantaj personecoj”. La fakto estas, ke tiuj eminentuloj ĝenerale ne favoras Esperanton kiel tian, sed nur la celon, ke estu komuna lingvo, aŭ eĉ nur, ke oni favoru edukon al tolero kaj paco.

Malgraŭ tio, la informado al-ekstera estas necesa por la pluvivo de la movado. Sed jen plua kurioza afero: se mi lernas la francan, oni ne petas aŭ postulas, ke mi aliĝu al la loka grupo, kiu parolas france, aŭ ke mi kunlaboru en la disvastigo de la franca. Tion male vi “devas” fari kiel esperantistoj. La instruo de Esperanto hodiaŭ celas principe al la daŭrigo de la movado, kaj ne al la internaciigo de la lingvo. Ĝenerale, novulo deziras utiligi la lingvon, kaj ne partopreni al misiisma agado.

Tial la akiro de novaj anoj al la Esperanto-movado estas io malfacila kaj kosta. Kiom kostas lernanto de Esperanto, kaj kiom kostas lernanto de la angla? Rilate la lernanton de Esperanto, multe. Kalkulu kiom da mono, da laboro kaj da tempo mi elspezis por Esperanta propagando. En pli ol 40-jara aktivado, mi sukcesis vere esperantistigi nur unu homon. Supozeble, instrui la anglan estas malpli koste ol instrui Esperanton.

La tuta demando pri informado fariĝis tikla, aparte pro la malmultaj rezultoj atingitaj, kaj pro la kvalito de tiu informado mem. Welger (1997) bone priskribis la demandojn de “informado”, t.e. de la varbado de novaj lernantoj, kiuj devos ankaŭ fariĝi novaj esperantistoj. Welger malkonsentas pri multaj punktoj de la hodiaŭa Esperanto-informado, kiuj baziĝas sur la supre prezentitaj mitoj.

- La homoj lernas ion ajn, kondiĉe ke ili opinias, ke tio, kion ili lernas, estas utila.
- La koncepto de utileco estas individua: ĉiu homo scias, kio estas tiumomente bezonas al li, kaj li ne bezonas, ke iu ajn indiku tion al li.
- Utileco estas ankaŭ komuna koncepto al ĉiuj: temas pri valoroj, pri kulturaj atingendaĵoj, pri sociaj idealoj, pri bezonoj faktaj, pri esperoj, pri ekspektoj, kiujn ni “administras” socie.

Por respekti tiujn principojn, Welger proponas ke:

- Vi evitu paroli pri *malŝparado* en la nuna komuniko-sistemo internacia,
- Vi evitu paroli pri la dezirindeco de *dua* lingvo, kaj
- Vi evitu paroli pri *diskrimino* (la homoj ne sentas sin diskriminataj per la angla).



Male, oni argumentu *pozitive* pri la kultura intereso de la Esperanta kolektivo (en lokaj grupoj, per vojaĝoj, en kontaktoj), pri eblo lerni pli facile aliajn lingvojn, pri komuna interesiĝo pri aliaj lingvoj, pri distrado en la Esperanta kolektivo.

Tamen, la tuta afero, finfine, aspektas iom limiga. Ni imagu, ke ni disvastigas la bildon de Esperanto laŭ la formulo "Esperanto estas lingvo interesa, kun speciale simpatia parolantaro tra la mondo". Sed la demando pri la disvastiĝinteco kaj pri la fakta uzo restus. Finfine, Esperanto estas flankofereto iom hobia, kaj finfine sen granda graveco. Sed ĉu tiam estas konvene lerni Esperanton?

Tre interesan verkon publikigis Sikosek en 1999. Li ekzamenis detale kelkajn bazajn mitojn de la Esperanta informado. Kaj li malkovris tre interesajn erarojn, falsigojn, misprezentojn. Jen do grava demando! La "ne-finvenkisma skolo" neas la bazan starpunkton de Zamenhof, sed ne scias oferti ion pli valoran, almenaŭ je nivelo praktika.

Magra afero: tio klarigas, kial tro multaj novbakitoj fakte neniam definitive bakiĝas. Mi male opinias, ke la sola rimedo baki novan esperantiston estas serĉi, ĝis vi trovas homon, kiu "serĉis ĝuste tion". Sed ni troviĝas ĉe la antipodoj de la universaleco, kiun revis Zamenhof. Ĉar temas ofte pri iom strangetaj homoj: cetere eĉ ne multe da ili ekzistas.

Tion pli detale menciis kaj komentis A. Künzli (1999), kiu tamen ankoraŭ kredas, ke ekzistas tamen finfine interesa niĉo por Esperanto. Li pravas, sed tiu niĉo estas tre malgranda, kaj direktiĝas certe ne al ĉiuj.

## Pri la Esperanto-sociologio

Unu el la riskoj de la Esperanta sociologio estas la manko de reala konekto kun la observata fenomeno. Nome, ĝi riskas funkcii kiel pravigilo de la ekzisto - ĉu de la lingvo Esperanto (tra la movado), ĉu de la movado (tra la lingvo). Iusence, ĝi funkcias kvazaŭ praviga *skolastiko*<sup>4</sup>, kiel raciigilo de mitoj.

Laŭ de Smet (1997), oni devas distingi, iom tro naturscience, inter Esperantaj organizo, movado, ideologio, komunumo, kulturo kaj vivo. Laŭ Raŝiĉ (1995), indas distingi inter homoj, kiuj scias Esperanton, kaj homoj, kiuj partoprenas en la Esperanto-movado. En ambaŭ kazoj, Esperanta kulturo estas kultivata nur en fermita rondo, sen rekta partopreno de la ekstera mondo, kiu ignoras tiujn rondojn.

Golden (1996) altiras nian atenton al la *komunumo*, kiu, laŭ li, estas koncepto pli centra ol la koncepto movado. Cetere, ankaŭ la termino *esperantisto* meritas kroman klarigon: nome, la esperantistoj distingiĝas laŭ la parolkapablo, la kultura kompetenteco, la uzo de la lingvo, kaj la deklaro pri sia esperantisteco.

Laŭ Galor (1998), estas klare ke ne nur indas analizi la rolon de la Esperanto-movado apud tiuj de la ceteraj similaspektaj movadoj, sed indas analizi ankaŭ ĝian specifecon. Kaj aparte, li dubas, ke temas pri iaspeca etno, aŭ pri iaspeca popolo.

Oni parolas ja ofte pri "sociologio" de Esperanto, sed fakte temas pri la sinkompreno de grupo, kiu esprimas juĝojn pri valoroj kaj pri faktoj koncernantaj sin mem. Sed ne temas pri sociologio. Temas pri *ideologio*. Laŭ Galor, eĉ UEA naskiĝis "raŭmismo", sed ambaŭ sintenoj (*raŭmismo* kaj *pracelismo*)<sup>5</sup>, rilate la movadon, estas pravaj, almenaŭ iugrade.

Silfer (1998) parolas pri grupa elekto, pri memkonsciiĝo, pri memkontentiĝo per Esperanto, kaj tiukoncerne li detale analizas la ideologion de tiu movado - aŭ almenaŭ, de la grupo, kiun li gvidas. Temas pri eseo kultur-politika, sen rilato kun sociologio.

Malpli detalaj estas la konceptoj de Brozovski (1998), kiu vidas, en la poresperanta agado, lokon, kie kolekti personajn spertojn, por doni helpon al la mondo, en la kadro de idealismaj celoj, kaj en amo al egaleco. Usui (1998) evidentigas, ke tamen la angla venkis, kaj ke ĉio tio eblas ankaŭ per la angla. Ĉu do kabei? Eble, laŭ li, restas io nerezisteble unika: la "ekvilibriga rolo de Esperanto", speco de fantoma digo kontraŭ la moderna angleca lingvo-tajdo. La esperantistoj ofte asertas, ke ili ne estas anglo-fobiaj. Sed mi opinias, ke tiu ne estas la tuta vero.

Golden (1996) opinias, ke vere temas pri problemo, kaj skribas, ke ni sciuz, kio esperantismo estas, nur se ni pridemandus la forlasintojn, nome tiujn, kiuj restis dum certa tempo en la

---

<sup>4</sup> *Skolastiko* estas skolo de la mezepoka filozofio, kiu i.a. asertis, ke la filozofio estas intelekta ilo por pravigi teologiajn konceptojn.

<sup>5</sup> "Raŭmismo" estas tezo prezentita en Raŭmo, laŭ kiu la Esperanto-movado havas valoron por si mem, sen atendi la venontan internaciigon oficialan de la lingvo. "Finvenkismo", aŭ "Pracelismo" estas tezoj, kiuj opinias, ke sian veran valoron Esperanto kaj la movado akiros, kiam la lingvo finfine agnoskiĝos kiel oficiale "internacia".

Esperanto-movado, tie produktis ion, sed kiuj poste forlasis ĝin. Bedaŭrinde neniu sekvis ĉi tiun science vere interesan sugeston.

Por la nuna momento, laŭ Wacha (1997), ne estas eble sin konfidi nur al raŭmismo: ĉar nur “piramideca” movado povas anigi novulojn. Kaj por ilin akiri, estas necesa granda varbada energio. Ankaŭ Wacha rimarkas, ke la homaj breĉoj en la movado fariĝis grandaj, dum la lastaj jaroj.

# Empiriaj esploroj pri la Esperanto-movado

La Esperanto-movado ne estas tio, kion ĝi asertas pri si mem, sed tio, kion ni eltrovas, studinte ĝin per scienca aparataro.

Laŭ Janton (1988), la *esperantismo estas nur movado*. Nenio alia. Ĝi funkcias sur kelkaj specifaj fundamentoj, nome sur unu lingvo, sur sociaj kunrilatoj, sur parte komuna ideologio. Mi supozas, ke li pravas. Sed ekzistas kelkaj esploroj pri la sociologia konsisto de la esperantistaro.

## *P.G. Forster, GB (1982)*

La Esperanto-movado en Britio estis esplorata de P.G. Forster en 1968, sed lia libro aperis nur en 1982. Laŭ Forster, temas pri devia grupo kompare kun la brita populacio. Ĝi aspektas iom *cranky* (strangeta), kvankam oni ne povas ĝin nomi “malsana”. En ĝi troviĝas kun pli granda ofteco minoritatajn tendencojn (vegetaranojn, politikajn “progresemulojn”). Ĝia konsisto cetere emas stagni. Tiu aparta esperanta populacio konsistas el homoj multlingvaj, kun adekvata pozicio en la socio (ĉefe etburĝoj), relative maljunaj, minoritatecaj, kun emo al religia nekonformismo, kaj “idealismaj” opinioj kaj sintenoj (*value oriented*).

Forster (1982) evidentigas la nestabilecon de la movado. La junuloj rapide formalaperas, la maljunaĝo forportas aliajn anojn. Ofte la aniĝo stagnas, kaj tial la movado ne nur ne kreskas, sed eĉ malprogresa.

Forster asertas, ke la orientiĝo de la esperantistoj varias laŭ la aĝo. Por la junuloj, plej gravas la praktika aspekto de la movado (t.e. ili substrekas la *instrumentan uzon* de la lingvo). Por la maljunuloj, pli gravas la esprimman uzon de la lingvon (*idealisma sinteno* rilate la lingvon).

## *Nikola Raŝiĉ, internacia (1988)*

N. Raŝiĉ konsideris analize specimeno de esperantanoj partoprenintaj al la Universala Kongreso en Augsburg (1985), kaj grupon venanta de Italio kaj de Katalunio. Kiom reprezenta tiu specimeno estas, mi ne scias. Montriĝis, ke temas pri tro-aĝa grupo, kun alta etna konscio (oni parolis pri si kiel pri “valonoj” kaj eĉ “bernoj”), religie nekonformisma, devene el mez- kaj et-burĝa medioj, kun bona eduko, politike modere progresema, reformisme nekonforma (vegetaranoj). Temas pri longjaraj esperantistoj, kun relative bona lingva nivelo. La familio partoprenas al esperantismo, almenaŭ parte. Ili ne multe legas.

## *F. Stocker, Germanio (1996)*

F. Stocker ekzamenis la konsiston de Deutscher Esperanto-Bund (DEB). Li malkovris, ke la strukturo de la Esperanto-movado similas al tiu de la Bürgerbewegungen<sup>6</sup>. Laŭ Stocker, fakulo pri tiu demando, la Esperanto-movado estas socia fenomeno, kiu okazas en difinita socia medio.

---

<sup>6</sup> *Civitan-grupoj*, ĝenerale okupiĝantaj pri unusola temo. Ili klopodas influi la populacion, la politikistojn kaj la gravulojn de regiono aŭ de ŝtato.

*Aĝe*, temas pri relative aĝiĝinta grupo, kvankam ne mankas gejunuloj. Al 7 viroj korespondas 3 virinoj. Ni rimarkas altan nivelon de lernado enlerneja. *Profesie*, temas pri pensiuloj, pri kaj apartenantoj al dependaj profesioj. *Religie* aperas ĉie nekonformismo, sed se ili estas religiaj, ili praktikas sian religion. Ili scias plurajn *lingvojn*, pli ol, meze, en Germanio (ĉefe la anglan, sed ankaŭ la francan). Krome, ili estas *lingvo-lernemaj*.

*Ili scias bone Esperanton*, ĉefe se ili lernis ĝin jam antaŭlonge. Ili estas delonge esperantistoj (“novaj” esperantistoj emas forfuĝi). Ili ofte uzas Esperanton. Ili lernis ĝin pro idealismo kaj pro lingva intereso (nome: ili ŝatas la lingvon kaj la idearon de Esperanto). 25% parolas pri praktikaj avantaĝoj. 80% estas iusence “universalistoj”, dum nur 4% favoras la solvon “inter ni”<sup>7</sup>. Ekzistas speco de tradicio familia: al Esperanto apartenas gepatroj, kaj (iom malplimulte) gefiloj. Ili ne aĉetas librojn, krom 25%, kiu forte aĉetas.

*Etika sinteno*: ni rimarkas tradiciajn laboristojn, kristanojn kaj anojn de t.n. “novaj sociaj movadoj”, kiuj apogas solidarecon, socian justecon kaj egalŝancecon. La socia sinteno estas reformista (i.a. kun vegetarismo). La politika engaĝiĝo estas forta: favora al Eŭropo.

*Resume*: viro 49-aĝa, abitura, nun dungito, evangelia, kiu parolas pli ol 3 fremdlingvojn, lernis Esperanton pro idealisma sinteno kaj pro lingva intereso. Karakterizaj valoroj estas: socia emancipiĝemo, pozitiveco rilate eksterlandanojn kaj rilate Eŭropan Komunumon.

## **T. Carlevaro, Svislando (1998)**

### **Metodologio**

Inter 1994 kaj 1996 ni sendis 311 anonimajn demandilojn (en esperanto, franca, germana, itala) al kolektitaj adresoj de svisaj esperantistoj: 163 en germanlingva, 90 en franclingva kaj 58 en itallingva Svislando, kiujn ni pritaksis ankaŭ sur la bazo de la statistikaj donitaĵoj koncernantaj Svislandon mem. Tiu studo estas fakte tre riĉa, kaj ni troviĝas nur ĉe la komenco de ĝia prilaborado.

Nia specimeno enhavas do la tuton de la esperantistoj en Svislando, kun la escepto de la nerespondintoj, kaj de tiuj, kiuj sendis neutiligeblan respondilon. Nia specimeno estas do minimume signifa rilate ligitecon al la Esperanto-movado, kaj al la idealoj, kiujn ĝi subtenas. Respondis 145 homoj. Ne ĉiuj respondoj estis 100%-e utiligeblaj.

### **Rezultoj**

#### Fundamenta demografio

*Sekso*: Plej interesa afero estas la pli alta ĉeesto de viroj (52%) rilate virinojn (48%), kun cetero procentoj sufiĉe proksimaj, kvankam ni scias, ke en Svislando, ĉefe en la aĝo-periodo post 40 jaroj, la ĉeesto de virinoj estas pli granda. Certe, tamen, la svisa Esperanto-movado ne estas ekskluzive vira.

*Naskiĝojaro*: 61 homoj, t.e. 43,6%, estas parto de la grupo de emerituloj (kies aĝo komenciĝas, en Svislando, inter 62 kaj 65 jaroj). Fakte, la emerituloj estas iom pli (79, t.e.

---

<sup>7</sup> La t.n. raŭmistoj, do, estas relative malmultaj. Ili *ne* reprezentas la ĝeneralan sintenon de la esperantistoj.

56,4%), emeritiĝintaj supozeble pro san-kaŭzoj. Ni rimarkas do, ke la svisa Esperanto-movado estas iom tro maljuniĝanta, kompare kun la rilataj procentoj de la svisa populacio.

*Laste frekventita lerneja nivelo:* Ĉe 145 respondintoj, ni malkovras, ke la esperantistoj konstituigas grupon sufiĉe kleran: 49 (33,9%) havas diplomon de baza aŭ profesia lernejo, sed 96 (66,1%) frekventis superan lernejon aŭ universitaton. Tio superas la meznivelon svisan. Do malklera esperantisto estas malofta varo.

*Laste efektivigita profesio:* El 182 respondoj, ni rimarkas 23 dommastrinojn (12,6%), 71 dungitojn (kun aŭ sen diplomo: 39,0%). Kuracistoj, profesoroj kaj advokatoj estas 25 (13,7%). Ankaŭ ĉi tie aperas klereco, sed ankaŭ certa oldeco.

*Domicilo:* Evidente Esperanto estas afero de homoj, kiuj loĝas en etaj aŭ mezaj urboj (67%). Nur 26% vivas en grandurboj. Sed la dimensio de la "urboj" en Svislando estas alia ol en Italio kaj en Germanio: komunumo kun 10'000 loĝantoj jam rajtas nomi sin "urbo", kaj Zuriko, la plej granda urbo de Svislando, apenaŭ atingas 400'000 loĝantojn.

### Kromaj informoj

*Interesoj:* El 157 respondintoj, ni rimarkas 5,3 interesiĝopunktojn je esperantisto. 99 indikoj koncernas - kompreneble - lingvojn. Mankas natursciencoj (ekologio atingas nur 44 menciojn). Sekvas: muziko (75 mencioj), literaturo (72), religio (56), historio (54), ktp. Interese: ne troviĝas tiom da kolektistoj, kiel kelkaj opinias.

*Politikaj kaj sociaj konvinkoj:* La plej granda parto de la respondintoj (134, 85,5%) havas klarajn konvinkojn, kiujn multaj (121: 70,0%) esprimas ankaŭ voĉdone. La esperantistoj do diverĝas ege de la meznivela sviso: kiu ne multe okupiĝas pri politiko, kaj tro ofte rifuzas voĉdoni. Temas pri ekzemplecaj civitanoj.

*Gepatra lingvo:* Evidentiĝis, ke en Svislando la esperantistoj estas ĉu german-, ĉu franc-, ĉu itallingvaj. Mankas romanĉlingvaj esperantistoj. Parto de la esperantistoj estas dulingva. Ankaŭ en la normala populacio, supozeble pro la alta estas la nivelo de migrado inter la diversaj lingvoregionoj. Ŝajnas, ke la dulingveco koncernas ĉefe la "minoritatajn" populaciojn de Svislando (franc- kaj itallingvanoj), kiuj cetere estas superreprezentataj en Esperantujo, kompare kun la germanlingvanoj. La plej granda parto de la dulingvuloj, fakte, parolas du lingvojn "svisajn" (germanan, francan, italan). Plej grava estas la dulingveco franca / germana (11 personoj), kiu estas io evidenta en Svislando, kie la Svisgermanoj estas plimulto. Nur 10% parolas ankaŭ "nesvisan" lingvon. Esperanto kaj la hispana ludas male ioman rolon inter la dulingvuloj, kies unu lingvo ne estas "svisa".

Troviĝas ankaŭ unulingvuloj de "nesvisa" lingvo, nome la pola, kaj eĉ Esperanto.

Gepatraj lingvoj "svisaj" (koncernante unu- kaj dulingvulojn)

Lingvo	N.	%
Germana	65	
kun la dulingvuloj	83	49,0
Franca	42	
kun la dulingvuloj	45	27,0
Itala	22	
kun la dulingvuloj	24	14,0
Aliaj lingvoj	16	10,0

*Ĝenerale enprofesie uzata lingvo:* El 130 respondintoj, ni konstatas, ke pli ol la duono de la esperantistoj utiligas unu solan lingvon en sia profesio. Kaj el tiuj, kiuj utiligas du aŭ pliajn lingvojn, pli ol la duono utiligas fakte nur du.

Globale, oni menciis 142 fojojn 10 lingvojn. La germana estas la plej utiligata (38,0% mencioj). Tio estas neekspektate malmulta, ĉar fakte la germana estas multe pli disvastiĝinta ol nur tiom. La resto koncernas la francan (25,6%), la italan (14,5%), la anglan (10,3%). Post la angla, oni mencias ankaŭ Esperanton. La angla, lingvo "nesvisa", estas do grava eĉ por svisaj esperantistoj (ĝenerale 15% el ĉiuj svisoj devas utiligi la anglan en sia laboro). Kvankam malpli multe ol devas tion fari meznivela laboranta Sviso, eble ĉar la specimeno de la esperantistoj enhavas tre multe da emeritoj, pli ol meze en la svisa populacio.

*Lernitaj lingvoj:* La esperantistoj interesiĝas pri lingvoj. Ili certe lernis pli da lingvoj, ol la meznivela Sviso faris (sen kalkuli kompreneble la gepatran kaj Esperanton). Fakte, nur 44,7% el la respondintoj scias nur la du "fremd"-lingvojn, kiujn la lernejo proponas. 55,3% konas tri aŭ pliajn. Supozeble, la esperantistoj estas lingvema homgrupo.

*Esperantistiĝo:* Iĝi kaj resti esperantisto estas afero, kiu postulas tempon kaj okazon. 58,5% el la esperantistoj lernis Esperanton de post 1970. Pli "maljunaj" esperantistoj estas pli maloftaj. Eble ili parte jam mortis. Ni miris, rimarkante, ke granda parto de la esperantistoj fakte lernis la lingvon dum la lastaj 2-3 jaroj. Sed forlaso de la movado okazas ĝuste dum tiuj unuaj jaroj. Ĝi estas tikla problemo, ankaŭ en Svislando.

Iĝi esperantisto estas afero de junuloj. Sed ni konas kazojn de 70- kaj 80-jaruloj, kiuj bone lernis la lingvon. Sed restas aktivaj en la movado ĉefe tiuj, kiuj lernis la lingvon junaĝe.

Aĝo, en kiu oni lernis Esperanton

Aĝo	N.	%
Inter 0 kaj 39 jaroj	107	72,8
Inter 40 kaj 84 jaroj	40	27,2

La interesiĝo pri Esperanto povas koncerni *la tutan familion*. 52% el la edzoj de esperantisto scias Esperanton. Kaj 25% el la filaro. Esperanto povas fariĝi iaspeca famili-hereda tradicio.

*Sci-nivelejo de Esperanto:* Nia enketo tuŝis la "malmolan kernon" de la svisa Esperanto-movado. Sed ĉu tiu kerno scias bone Esperanton? Ni demandis unue ĝeneralan pritakson. Evidente la respondoj estas subjektivaj, kaj pro tio ni petis kromajn informojn pri la kapabloj aŭskulti, legi, skribi kaj paroli Esperanton. Fine, ni petis, kiun version de la demandilo la respondanto utiligis (ĉu germanan, franca, italan aŭ Esperantan).



Esperanto estas pli facila en pasiva uzo (legi, poste aŭde kompreni). Aktiva uzo (skribi, paroli) estas pli komplika. Oni povas supozi, ke tio veras por ĉiuj lingvoj. Krome, tio povas dependi ankaŭ de la uzo, kiun oni faras per Esperanto. Nome, la esperantistoj uzas ĝin ĉefe lego-cele.

*Ĝenerala scio-nivelo de Esperanto (mem-pritakso), N=157:*

<b>Nivelo</b>	<b>N.</b>	<b>%</b>
Malalta	44	28,0
Meza	58	36,9
Bona	55	35,1

Estas grave atentigi la leganton, ke 50,3% de la pridemanditaj homoj estis kontentaj pri sia lingvoscio, kvankam multaj konsideris ĝin ne-altkvalita. Eble ni proksimas al la grupo de "ĝisrevidistoj" kaj "bontaguloj".

*Aktivado en Esperantujo:* Dum la jaro antaŭ la enketo, 88 pridemanditoj aĉetis minimume unu libron, kaj 100 abonis minimume unu Esperanto-periodaĵon. Jes, esperantistoj estas veraj kleruloj.

El 157 respondintoj, 106 (67,5%) estis anoj de loka grupo, 89 (56,7%) aliĝis ankaŭ al Svisa Esperanto-Societo (aŭ al alia nacia asocio, kiel la svisa IFEF-sekcio), dum nur 82 (52,2%) estis anoj de UEA aŭ de SAT. La grupa vivo ŝajnas do esenca por la pluvivo de la lingvo kaj por la lojaleco de la esperantistoj rilate la movadon.

### **Konkludoj**

Ni rimarkas, ke la donitaĵoj rilatantaj la svisan Esperanto-movadon ne aparte diverĝas de tiuj, kiuj koncernas la britan kaj la germanan movadojn. La svisaj esperantistoj estas pli poliglota ol la germanaj samideanoj, sed tiu trajto karakterizas ankaŭ la svisojn generale, kompare kun la germana loĝantaro.

La svisa Esperanto-movado konsistas el homoj eks-junaj. Tio tamen korespondas al ĉiuj kulturaj movadoj, kaj supozeble la Esperanto-movado estis ĉiam iom tia. Partoprenas al ĝi kaj viroj kaj virinoj. Ofte geedzoj partoprenas kune, sed heredigo familia estas pli malofta.

Fideleco (lojaleco) al la lingvo kaj al la movado dependas de la jaraĝo, en kiu oni lernas Esperanton. Plejparto lernis antaŭ sia 40-a aĝojaro. Aktivado ofte korespondas al agado en loka grupo, kie oni ligas sociajn kaj personajn rilatojn profundajn kaj daŭrajn. Iusence, la svisa Esperanto-movado korespondas al speco de eta partio, kies anoj vivas en mezgrandaj urboj, konsistas el kleraj homoj, kun multaj kulturaj intereso, aparte rilate lingvojn. Temas pri civitanoj bone informitaj kaj socie aktivaj.

Ekzistas esperantistoj, kiuj partoprenas al la vivo de la movado, kiuj aliĝas al la Esperanta idearo, sed kiuj ne bone konas lingvon. Ili konsideras sin "esperantistoj", kaj supozeble ili estas ankaŭ konsiderataj tiaj, far de la ceteraj lokaj esperantistoj. Indus trovi solvojn por ilin plej utile integri en la movadon.

Laŭ sia demografia konsisto, la Esperanto-movado similas al partio aŭ al prem-grupo, kaj ne al "popolo", kiel asertas kelkaj aŭtoroj. Zamenhof proponis Esperanton, kiel lingvo kun



kultura kaj etika animo. Eble ni hodiaŭ troviĝas antaŭ kultura kaj etika movado, kun lingvo, kiu estas kerna rilate la ceterajn valorojn.

# La du politikoj de Esperanto

## *Zamenhof pri la utiligebleco*

Zamenhof sciis, ke prestiĝon donas disvastiĝo, kaj ties rezulto, la *utiligebleco*. Se Esperanto havus tion, la homoj estus tute nature alkondukataj lerni ĝin. Tial li tute celkonforme proponis, ke la lerno de Esperanto okazu, kiam unu miliono da homoj estos promesintaj tion fari. Krome li proponis, ke Esperanto estu uzata *nur* prove. Definitiva selekto okazos pli malfrue. Sed plej evidente Esperanto ne estis nur lingvo, sed *idealo*. Tial multaj homoj ne atendis la atingon de la milionpromesoj, kaj tial ili lernis tuj Esperanton. Bedaŭrinde, finfine, la miliono da lernantoj ne sekvis, kaj la ĝeneraligita akcepto de Esperanto ankaŭ ne okazis.

Sed estas malfacile al multaj agnoski, ke neniuj el la esperoj de Zamenhof kaj de la esperantistoj efektiviĝis. Estas tiam prefere, kiel ofte okazas, kovri la veron per io pli aminda. “Ĉesu diri ‘Se Esperanto venkos...’, ĉar Esperanto jam venkis, ĉar ĝi vivas”. Privat aludis en tio al la neceso aktive propagande kaj aktive uzi la lingvon, kaj ke tiuj du aktivadoj havas komunan rilaton. Sed estas preterdube, ke Zamenhof esperis ion konkretan pri la rolo de sia lingvo en la perado amasnivela inter la diversaj nacioj. Ne nur inter humanistaj geesperantistoj.

## *Prestiĝo-politiko*

Ĝi estas la politiko de *agitado* por la plivastigo de Esperanto. Ĝi havas longan tradicion. Ĝi estas speco de armilo uzita dum la unuaj jaroj de Esperanto (ĉefe dum la franca periodo), por “aktivigi” la homojn kaj favorigi la situacion de Esperanto. Pli poste, la agitado fariĝis ie kaj tie pli singarda, pli individueca, pli diplomacia. Bedaŭrinde, ĝi ne montris multajn rezultojn.

Ni memoru la jaron 1954: en Montevideo, UEA sukcesis akceptigi ĉe Unesko, ke Esperanto estas kulture kaj lingvo-politike interesa ilo. Kaj ke la ĝenerala sekretario de Unesko sekvas ĝian evoluon. Tio bone efikis interne de la movado, ĉar ĝi vekis grandiozan entuziasmon, sed *nenion efikis ekstere*.

Kiam montriĝis klare, ke la atingoj de 1954 alportis neniun ŝanĝon, oni provis novan, pli ampleksan agadon. En 1966 grandega publika subskribo-kampanjo entirkestiĝis ĉe Unesko. Oni kolektis plurajn milionojn da subskriboj. Sed la subskribo-folioj ankoraŭ ŝimas ie en Parizo. Tiu misrezulto havis tre depriman influon sur la esperantistoj, kiuj fine komprenis, ke tiu prestiĝo-politiko ne tradukiĝas al rezulto favora al Esperanto.

Lapenna estis tre atentema pri la demando de informado, ĉar ĝi estis centra momento de lia prestiĝo-politiko. Ni memoru pri la de li favorata *Principaro de Frostavallen*, en kiu li indikis, ke oni devas eviti vortojn specife esperantajn, kiel *helpa*, *artefarita*, *verda*. Ke oni ne devis paroli pri aliaj lingvoprojektoj, ke indas eviti lingvajn erarojn en la gepatra lingvo, kaj aspekti iom tro propagandeca, aŭ eĉ sektema. Li celis enkonduki Esperanton en la “altan” uzon. Tio altigus ĝian prestiĝon, kaj, per tio, estus pli facile ricevi oficialan agnoskon. Li fiaskis (Forster 1982). Tio signifas, ke kiel ajn delikate kaj konvinke oni parolas pri Esperanto, la “normala” popolo, tamen, ne volas subteni ĝian enkondukon. Sekve de tio, ankaŭ la registaroj rifuzas tion fari.

Esperanto havas prestiĝon ĉe la esperantistoj, sed ne spertas tion ekster la movado. Tio ne plaĉas al la Esperanto-gvidantoj. Tial ili entreprenas agadojn aŭ skribas tekstojn, ne tiom por altigi la prestiĝon aŭ la altirforton de la lingvo ekster Esperantujo, sed por vipi kaj flegi la memkonscion de la esperantistoj. Ofte ili aspektas kvazaŭ ili estus la solaj, kiuj pensas kaj projektas korekte kaj adekvate pri tiu ĉi demando. Tiu sinteno evidente incitas la aliajn kunhomojn.

Fakte, prestiĝon ĝuas entreprenoj aŭ movadoj, kiuj profitigas la partoprenantojn, kaj kiuj garantias socian antaŭeniron. Ĉiu homo komprenas tion. Kiam mi parolas pri “profito”, mi ne parolas pri *mono*. Mi parolas pri io, kion la koncernato konsideras “valoro”. Temas evidente pri io *kaj* privata (ĉar ĉiu individuo mem decidas, kio estas valoro por li), *kaj* socia (ĉar ekzistas ankaŭ “publikaj” skaloj de valoroj). La angla havas valoron, t.e. merkaton kaj aplikon. Neniu konsentus elspezi monon por ĝin forigi el la lerneja programo, favore al solvo neniam kaj nenie bone elprovita sur giganta skalo.

Pro tio, malgraŭ la tagaloga, en Filipino oni ne elpuŝis la anglan de la lernejoj; pro tio, en Hindio, la hindia ne forpuŝis la anglan, kaj pro tio, en Senegalo, la ŭolofa ne forpuŝis la uzon de la franca en la lernejoj. Ne temas pri imperiismo, sed pri io multe pli simpla kaj senpera: la intereso utiligi efikan komunikilon.

Forster (1982) rimarkigas, ke la transformo de la frua, batalema Esperanto-movado, al movado por la komunumo esperantista, signifis ankaŭ perdon de prestiĝo. Ne pro la transformiĝo mem, sed pro la enfermiĝo, kaj pro la manko de fakta influo en la funkciado de la mondo. Jam en 1936 stariĝis tiu demando. Sed la tiama vasteco de la movado ne igis tiun problemon tikla. Hodiaŭ ree montriĝas demando, kiun oni ne povis solvi jam antaŭ la dua mondomilito.

Tio ne signifas, ke la termino "Esperanto" komplete perdiĝis. Male, multaj stereotipoj disvastiĝis. Kelkaj estas pozitivaj: la termino “Esperanto” fariĝis sinonimo de “komuna”, “universala”. Kelkaj estas negativaj: Esperanto kiel *Frankenstein*-entrepreno. En ambaŭ kazoj, ofte, malaperas la lingva karakterizo de Esperanto.

Indiko grava pri la perdo de la prestiĝo estas la demando “Ĉu Esperanto ekzistas ankoraŭ? *Foje oni aŭdis pri ĝi, sed delonge mi nenion plu aŭdis*”. Sed la kulmino de la prestiĝo-perdo estas la fakto, ke ĉiam pli ofte la homoj *ne plu scias indiki*, kion *fakte* signifas la nomo “Esperanto”.

Prestiĝo-politiko postulas, ke vi pagigu la kursojn de Esperanto. Sed en la realo, se vi pagigas ilin, neniu plu partoprenos. Tiu estas unu el la multaj dilemoj de la nuna situacio de la lingvo. Kiu estas speco de granda donaco farita al la homaro, kiu tamen ne scias, kion fari per ĝi.

## ***Finvenkismo***

“Finvenkismo” estas tezo pri la rolo de Esperanto en la moderna mondo. Esperanto celas agnoskiĝi kiel internacia helplingvo. Ĝi estas samtempe ankaŭ Zamenhofa sinteno, kaj esenca parto de la prestiĝa politiko. Tamen, ne mankas tiaj esperoj ankaŭ en la homoj, kiuj delectas sin en la sino de la Esperanto-mondo, en la senco de Raŭmo. Se Esperanto havus prestiĝon, milionoj lernus ĝin, kaj tiam ĝi fariĝus per natura vojo *la* internacia lingvo. Finvenkismo estas kredo, espero, eble revo (Tiŝljar 1997). Cetere, ekzistas du finvenkistaj skoloj, ambaŭ iusence “miraklecaj”. Ĉar ambaŭ postulas, ke foje venos la granda momento,

en kiu la lingva dilemo solviĝos, kaj en kiu, finfine, la esperoj de miloj da esperantistoj fariĝos realo. La unua nomiĝas *desuprismo*.

Laŭ tiu ĉi skolo, la Esperanto-movado, per siaj *idealismaj, praktikemaj kaj lingvaj* argumentoj, konvinkos la ŝtatestrojn (kaj la parlamentojn) enkonduki Esperanton. En tiu espero, multaj esperantistoj longe kaj intense laboris en kelkaj parlamentoj eŭropaj (ekz-e en Italio) kaj en la Eŭroplandaj instancoj, por tion atingi. Neniu atingis ion konkretan. Ekz-e, en la Universitato Trento (Italio) oni atingis, ke oni povas tie instrui interlingvistikon. Sed, kompreneble, nenio fariĝis.

La dua skolo nomiĝas *desuba movadismo*, kiun ĉefe SAT gvidis. Nome, la popolo tiel intense amos Esperanton, ke ĝi postulos ĉe la registaro, ke oni enkonduku ĝin. Ankaŭ Franz Jonas rekomendis tion al la esperantistoj. Eĉ pli: laŭ Adamo Lanti, desubismo estos tiel intensa, ke iom post iom la tuta mondo lernos - kaj uzos - ekskluzive Esperanton.

Bedaŭrinde, por ion atingi, en ambaŭ kazoj, ni devus disponi pri forta kaj impona movado. Nia Esperanto-movado estas, male, malgranda: ĝi ne atingas la nivelon, por praktiki efikan lobiismon (lobio devas reprezenti minimume 5%-on de populacio).

Finvenkisma tezo celas *konstrui* la prestiĝon de la lingvo. Ĉar nur la prestiĝo permesas finan venkon. Se prestiĝo mankas, iuj revas, *ke oni povas ĝin inventi*. La fakto estas, ke la publika bildiĝo de Esperanto estas, parte, arte konstruita. Intuicie, multaj esperantistoj komprenas, ke Esperanto, por atingi interesatojn, devas esti utila. Sed, fakte, por ĝin aspektigi "utila" en la utilitarisma senco de tiu ĉi vorto, oni devas iom inflacie paroli pri tio, eble ankaŭ ekster la vero prezenti la domenojn, kie ĝi estas utila.

Foje mi legis en Esperanto artikolon de A. De Giorgi. Li pretendas, ke "iom mensogi", en la senco de "troigi", estas tute bona afero ekz-e en intervjuo, aŭ okaze de prelego pri Esperanto. Oni povas ekzemple aserti, ke ekzistas 50 milionoj da esperantistoj, ke kelkaj gravaj homoj estis esperantistoj, ktp. Pri tiu demando detale diskutis Z. Sikosek (1999).

Ankaŭ mi longe pripensis la aferon, kaj ankaŭ mi opinias, ke li malpravas. Pro du kaŭzoj. Unualoke, ĵurnalistoj ne estas, ĝenerale, stultuloj. Se vere en la mondo ekzistus 50 milionoj da esperantistoj, tio signifus, ke ili estus 5-foje pli nombraj ol la Danoj. Sed ja la Danojn, kvankam malofte, oni vidas. En televido, surstrate, entrajne, suraŭte. Nenio tia ekzistas en rilato kun Esperanto. Supozeble, ĵurnalistoj tuj flarus la trompon.

Dualoke, *oni ne povas longtempe trompi novbakiton*. Almenaŭ, ne pli longe ol dum 6 monatoj. Li tuj konsciiĝas pri la fakta situacio, nome pri la konsisto de la esperantistaro. Sed ekzistas dupecaj novbakitoj. Homoj, kiuj ĉiam serĉis ion malvastan, disigitan de la vera konkurencema mondo, kaj ekzistas homoj, kiuj sincere serĉis ion, kio garantiu la grandigon de iliaj ebloj. La unuaj ne bezonas mensogon, ĉar ĝuste la etan movadon ili serĉis. La duaj foriros ĉiuokaze post 1-2 jaroj. Sen kolero, se oni avertis ilin. Kun kolero, se oni ne faris tion.

*Kial mensogi?* Mi supozas, ke ĉiu homo ŝatas vastigi la kampon, en kiu li prilaboras siajn interesojn, ĉar tio alportas al li profiton: pli alta disvastiĝo signifas pli grandan kvanton da riceveblaj servoj (t.e. pli alta utileco), kaj de tio venas prestiĝo. Ankaŭ poŝtmarkkolektanto ŝatas, ke lia klubo grandiĝu. Sed oni devas de tempo al tempo vidi iajn pozitivajn rezultojn de la entreprenita agado. Tio ne okazas kun Esperanto. Mi mem retrovis antaŭ kelkaj tagoj la unuajn numerojn de *Tiĉina Informilo* (1961-1993). Tiam malgranda kunveneto en Bellinzona

arigis ĝis 100 personojn, el regionoj, kie nun ne plu ekzistas esperantistoj (Novara, Verbania, Como, Sondrio, Varese...). Ne nur oni ne vidas la rezultojn de la laboro, sed oni ja vidas malkreskon. La laboro montriĝis senfrukta. Ĉu mensogo simple anstataŭas nevenintajn fruktojn? “Se mia laboro havintus sukceson, la esperantistaro atingus 50 milionojn da homoj...”. Certe, sed tio estas *Wunschdenken* (*wishful thinking*)<sup>8</sup>.

### “Inter-ni-politiko”

*Raŭmismo* estas tezo, kiu favoras specon de identiĝo kun la kerno de la komunaj valoroj de ĉiuj esperantistoj, kiuj volas ilin vivosperti, senkonsidere pri la malatingo de la prceloj. Mi nenion pluan skribos pri raŭmismo, ĉar, se mi miscitas pri ĝi eĉ unusolan komon, oni asertos ke mi “komprenis nenion pri la tuta demando”. Antaŭ la nebuleco de ĉio tio, mi demandas min, ĉu temas pri io religieca.

Tiŝljar (1997) opinias, tamen, ke sen propagando, sen informado, sen parta sed intensa aktivado “finvenkisma”, raŭmismo kondamnis Esperanton al rapida malapero.

Bedaŭrinde la “inter-ni-politiko” havas limojn: tiujn de la Esperanto-movado. La esperantistoj kreis niĉon psikologian kaj socian, kie multo (ne ĉio) estas ebla, sed je malalta nivelo kompare kun la ekstera mondo, ĉiam neprofesiece, ofte mise. Mondo de diletantoj, sed samtempe de elitistoj. Kun fakaj Esperantaj asocioj, kiuj ofte nur paŭzas pli grandajn, kun nevideblaj, do iel fantomaj Esperantaj librovendejoj, kun Esperantaj revuoj neaĉeteblaj en normala kiosko, nehaveblaj tra abono en librejo, kun Esperantaj kongresoj, kiuj preskaŭ neniam lasas surlokajn spurojn. Sed ni renkontas la kutimajn problemojn de la Esperanta movado: nome, ĝi estas nevidebla antaŭ la publiko.

Ĝuste tion ni nomas *Rückzugsgebiet* (malkresko-niĉo): kiam la latina lingvo perdis ĉiun signifon en la moderna mondo, nome kiam la Romkatolika Eklezio forigis ĝin el la kulto, kaj aplikis ĉiam pli intense la italan kaj la anglan en sia interna komunikado, falis la nombro de la lernantoj de tiu lingvo. Tiam la instruistoj decidis konstrui specon de latinlingva Esperantujo, kun propraj periodaĵoj, babil-kongresoj, libroj, moderna renaskiĝo de la latinlingva literaturo, radio-elsendoj, ktp. La uzo de lingvo, en iuj momentoj, ne ĉiam estas signo de bona farto. Ekzemple, neniam en Tiĉino aperis tiom multe da vortaroj, lernolibroj, poemlibroj, ktp, pri nia dialekto. Kaj tamen, ĝi estas mortanta. En Esperanto, lastatempe aperis kelkaj mirindaj vortaroj: de Broccatelli, de Minnaja, de Krause, kaj baldaŭ aperos la ĝisfunde renovigita PIV.

Skribas Tiŝljar (1997): “La esperantistoj konvinkiĝas, ke ili estas popolo, ĉar ili tion bezonas”. Li aldonas, ke ili “prosperas en socialistaj landoj, ĉar tie oni estas malpli *materialistaj*”. Min neniam konvinkis tiun strangan ideologian kontraŭstarigon inter “materialismo” kaj “idealismo”. “Materialisto” pensus nur pri mongajno, dum “idealisto” strebus al la valoroj. Laŭ mia koncepto, tie kuŝas tipa dualista eraro. La morala kaj la praktika vivoproduktado estas strikte kunligitaj. Oni ne povas distingi klare inter ambaŭ. Kaj fakte, ankaŭ moralaj valoroj povas produkti riĉon. Kaj, inverse, riĉo povas helpi al moralaj valoroj. Ĉiutaga konstato atentigas nin, ke moralaj valoroj sen konkreta ligo kun la realo, kaj sen influo sur la faktoj, estas vana prediko, kaj ne vere viv-gvidaj instancoj.

---

<sup>8</sup> *La pensée optative*: speco de magia uzo de la penso, per kio, iu konsideras vera aŭ ekzistanta ion, simple ĉar al li estus bone, se estus tiel.

## La uzo en scienco

Pro profesia kaŭzo, mi longe laboris, kaj ankoraŭ laboras, en sciencaj medioj, kaj per sciencaj rimedoj. Scienco estas io esenca en la nuna socio, kaj mi estas konvinkita, ke nur la landoj, kiuj havas fortan kaj intensan sciencajn esploron, instruon kaj produktadon, sukcesos konkuri en la venonta jarmilo.

La uzo de Esperanto en la scienco troviĝas inter la menciitaj politikoj, nome inter finvenkismo kaj raŭmismo. Finvenkismo atendas uzon en la scienco, kiam la fina venko estos okazinta. Raŭmismo utiligas Esperanton en sciencaj medioj jam nun. "Uzo en la scienco" estas, kompreneble, troigo. Ekzistas modestaspekta kaj modestenhava bulteno, ofte malfacile legebla, kiun eldonas ISAE, kiu iel apartenas al la sfero "Inter-ni-politiko". Oni povas toleri ĉion, inter geesperantistoj. Prestiĝa afero, tiukampe, estus la traduko al Esperanto de *The Scientific American*. Kaj ĝi estus, krome, ankaŭ utila. Sed ve, la merkato en Esperanto, kaj la fortoj de la eta movado, ne permesas tion.

Mi multon atendis de AIS (*Akademio Internacia de Sciencoj*). Ĉar ĝin fondis homo, (H. Frank), kiu bone konas la sciencan mondon kaj la sciencan laboron, kun celo kunigi la sciencistojn, kaj krei sciencan poluson esperantlingvan ankaŭ ekster Esperantujo. Tre interesa celo de AIS estis la reordigo, per interna "agnosko", de divers-universitataj sed samnomaj diplomoj. Nome: ĉu psikologo estas titolo samvalida kaj samenhava ĉie? Tute certe ne. AIS celis konstrui faskon da kriterioj, kiuj permesus distingi inter la diversaj titoloj kaj la diversaj lernejoj. Krome, AIS antaŭvidis ankaŭ internan agnoskon de titoloj, kiujn peras rekte AIS, tra aparte detala kariero, en formo de speciala interna titol-hierarkio, atingenda kiel normale oni atingas tiujn titolojn en landaj universitatoj. Evidente tio postulis agnoskon fare de multaj kaj gravaj landaj universitatoj, fare de instru-departementoj de gravaj landoj, kaj tra la pligrandiĝo de la fakaro. Mi iom dubas, ke tio okazis.

Kio, male, okazis, estis la jeno: la universitatoj, en ĉiuj landoj de Eŭropo, konfrontitaj ĝuste kun la demando de la malsameco de titoloj laŭvorte samaj, malfermis specialajn landajn kontrol-oficejojn. Jes, ni ofte estis pioniroj, kaj la mondo transprenis niajn ideojn. Sed ne la lingvon.

Bormann (1995) montras la gravecon de *faklingvo*, kiu reprezentas defion. Iusence, ĝi estas io prestiĝa, sed, por la Esperanto-movado, finfine, ankaŭ neutila. Ĝi permesas fakan diskuton inter du homoj en faka lingvo, kvankam, supozeble, ili same bone povus fari tion en la angla. Ankaŭ por Romanĉoj, la faka lingvo estas ofte superflua. Ili lernas sian profesion en la germana, kaj utiligas germanajn fakvortojn. Nur se ekzistus liceo kaj faklernejo uzantaj ekskluzive la romanĉan, oni povus trankvile labori pri la faka terminologio en tiu lingvo. Kunordigi la laboron pri la faklingvoj estas malfacile, laŭ Bormann, ĉar multaj specialistoj ne scias, aŭ ne interesiĝas, aŭ facile kverelas. Cetere, laŭ mi, tio estas normala, kiam oni faras laboron, kiu estas nur "prestiĝa": se oni farus laboron profitodonan, nome se estus honorarioj, oni pli organike kunlaborus.

Teknikaj vortaroj estas prestiĝo-atingo, sed ili ne servas al la utiligo de Esperanto en la scienco. Popularigo de la lingvo okazus, se ekzistus fakoj studeblaj per Esperanto, se ekzistus lerno-libroj universitat-nivelaj, se aperus vere gravaj fakrevuoj, se oni povus viziti specialiĝo-kursojn, se entreprenoj prezentus novigajn materialojn kaj instruilojn en Esperanto, se la

foiroj uzus ĝin, se la universitatoj instruus Esperanton, kaj, ĉefe, se ili instruus en Esperanto. Nome, Esperanto, en scienco, estus lingvo interesa, se en ĝi aperus inter 30 kaj 50%-oj de la sciencaj verkoj. Nur per tio lingvo fariĝas utila, kaj tial lerninda.



## Pormomenta konkludo

La prestiĝo-politiko de Lapenna fiaskis, ĉar ĝi mistrafis la esencon de la problemo. Oni ne povas aĉeti aŭ inventi prestiĝon, aŭ akiri ĝin tra netaŭgaj padoj.

Prestiĝo venas de la servo kaj de la utilo de lingvo, kaj de la fakto, ke la homoj scias tion, kaj ke ili deziras partopreni en la utiligo de tiuj servoj. Por propra kresko kultura kaj socia, eventuale por propra gajno.

*Unua tikla demando* estas la jena: “Kiom da esperantistoj ekzistas?” La respondoj varias inter tro vastaj limoj.

### *Kiom da Esperantistoj ekzistas en la mondo?*

**20 milionoj**

**5 milionoj**

**500'000**

**50'000 homoj?**

Fakto estas, ke ekzistas tre malmultaj esperantistoj en kelkaj lokoj de la mondo. Kaj ke estas malfacile trovi ilin. Eĉ kiam vi trovis ilin, vi povas nur paroli kun ili, kaj tie finiĝas la tuta demando.

Se estus tiom da milionoj da esperantistoj, estus avantaĝo por mi, eldonisto. Mi povus trankvile eldoni verkojn, kaj ilin vendi tra normalaj librovendejoj. Sed tute ne. Poezia verko vendas maksimume 40 ekzemplerojn; se vi vendas 200 ekzemplerojn, tio jam estas granda sukceso. Kaj neniam tra normalaj librovendejoj, sed nur tra specialaj, malfacile atingeblaj, neoficialaj provizejoj.

Multaj emas respondi per demando: “Kiu scias? Ĉu konatas, kiom da latinlernintoj ekzistas en la mondo?”. Sed respondi per demando estas ĉi-kaze indiko de nescio, t.e. de malforto. Ĉar estus vere facile indiki la lokon kaj la nombron, se entute ili estus indikeblaj.

Sed fakte, *kiom da homoj aktivis en Esperantujo?* Sikosek alfrontas tiun demandon kun detala pritrakto. Oni povas kalkuli pri maksimume la duoblo de la anoj de UEA, t.e. ne pli ol 40'000. Ne multaj. Ne eblas inkludi la eklernintojn, nome tiujn, kiuj frekventis kurson, aŭ aĉetis lernolibron, ĉar ofte ili rememoras, pri Esperanto, nur la nomon. Cetere, se ili ne aktiviĝis, tio signifas, ke ili ne rekonas sin en la movado. Ankaŭ laŭ mi, la iom kompetentaj esperantistoj pene atingas 30-50'000 personojn. Kaj ili estas pli-malpli stabilaj ekde 10 jaroj. Tio signifas, ke proporcie ili malmultiĝas. Ĉar la monda populacio kreskas rapide, dum la nombro de la esperantistoj stagnas. Tiu estas grava demando: fakte, la esperantistaro fariĝas ĉiutage pli nevidebla.

*Dua tikla demando* estas: “Kie troviĝas plej multe da esperantistoj?” Diable, certe ne en Svislando. En Svislando, la kompetentaj esperantistoj estas malpli ol 200. La esperantistoj indikas la lokon, kie troviĝas plej multe da esperantistoj, ĉiam en pli foraj kaj neatingeblaj landoj (pli frue en komunistaj landoj, poste en Japanio, eĉ en Sudameriko, kaj nun en Ĉinio...). Bedaŭrinde, se vi iras surloken, vi facile renkontos seniluziigon.



Esperanto fariĝis iaspeca "lingvo de la koro", t.e. lingvo, kiun oni flegas, malgraŭ la fakto, ke ĝi ne disvastiĝas. Kion fari per ia "lingvo de la koro"? Restas nur la privata sfero, kaj, en la privata sfero, la letterskribado, kaj, okaze de kunvenoj, la interparolo.

*La kulto de la interparolo* en la Esperanto-movado estas io aparte grava kaj interesa. En *Le Monde* aperis aludo pri tio, kaj tio kaŭzis grandan malkontenton ĉe la esperantistoj. Sed eksterulo, kiu tion bone vidas kaj perceptas, principe ne neas la valoron de tio. Nur la reduktiĝo de la Esperanta aktivado al tio estas io danĝera.

Sed "lingvo de la koro" fariĝas tia, ĉar ĝi malaperis el la publika uzo. Tio memorigas min pri kurioza sperto, kiun mi faris antaŭ 30 jaroj en suda Francio. Mi malkovris, ke ekzistas kluboj, kie oni parolas la okcitanan, respektive la provencan. Bone, sed "sana", vere uzata, kaj, tial, ekzistanta lingvo, ne bezonas tion. Ne ekzistas kluboj en Zuriko, kie oni flegas la svisgermanan. Ĉar ĝi vivas per siaj propraj fortoj, kaj tial ĝi aperas publike kaj sentime.

Male, *mortanta lingvo*, lingvo kies socia vivo fariĝis praktike nevidebla, kiu ne plu utilas, kiun oni parolas nur por flegi nostalgian senton, tiu lingvo ja bezonas klubon.

Kial ĉio tio? Chiti-Batelli (1998, 1999) asertis, ke mankis entute politiko de Esperanto. La Esperanto-movado vivis en "neŭtralisma" etoso, kaj ne kapablis sin ligi kun kreiva politika forto, nome, laŭ li, kun la *veraj* eŭropaj federalistoj. Mi parte malkonsentas kun tio. Unuopaj, kaj ankaŭ gvidaj esperantistoj, fakte ligiĝis jam antaŭ 30 jaroj al la "vera" Eŭropa movado, i.a. kun Altiero Spinelli. Krome ekzistis, dum jardekoj, forta ligo inter partoj de la Esperanto-movado kaj la komunista (aŭ socialista, aŭ anarkiista) movadoj. *Sed ĉiam temis pri unuflanka ligiĝo*. La esperantistoj, unuope aŭ grupe, ligis sin, sed ne inverse. Neniu politika movado, nek federalismo, nek anarkiismo, nek komunismo, fakte priatentis la Esperanto-movadon. La "aprobaj" estas simplaj ĝentilaĵoj, aŭ agnosko de komuna etika kaj kultura bazoj.

# La naskiĝo de komuna lingvo en Eŭropo

## *La influo de la angla*

La angla ĉiam estis tre grava lingvo, sed, ĝis la dua mondomilito, ĝi estis hegemonia nur en la ceteraj ampleksejaj partoj de la mondo, kiuj troviĝis sub la usona, kaj aparte sub la angla regado. Speciale Usono estis ceteraj granda kaj riĉa lando. La granda kresko de la angla, kaj ĝia atingo de ĉiam pli granda ne-denaska parolantaro, kaj ĝia disvastiĝo hegemonia al landoj kaj terpecoj, kie ĝi pli frue estis nur sporade aŭdebla, estas fenomeno relative recenta.

Fine de la pasinta jarcento, gravis en Eŭropo, kaj en la tuta okcidenta mondo, tri lingvoj: la *franca*, la *angla* kaj la *germana*. Zamenhof celis peri inter tiuj tri grandaj lingvoj, pere de kroma, internacia kaj “neŭtrala” lingvo.

La maltrafo de Esperanto bone korespondas, tempe, je la fiasko de la du ceteraj lingvoj de Eŭropo, kies rolo fariĝas ĉiutage pli regiona. Sed finfine, kun la escepto de la franca, nur Esperanto havis pretendojn al tutmondiĝo - kaj eĉ ankoraŭ kelkajn tiajn havas. Plej granda parto de la neŝtata kaj ne eŭrop-unia komunikado en Eŭropo okazas en la angla. Praktike nenio grava okazas pere de Esperanto.

Ankaŭ la disvastiĝo de la franca lingvo suferis pro tiu fakto. Ĝi estas instruata kiel unua fremdlingvo nur en la landoj de la francparolanta Komuno (*Communauté francophone*), kie, ceteraj, kiel duan lingvon, oni ĉie instruas ankaŭ la anglan. En la resto de la mondo, la franca malaperis. Nur en kelkaj landoj, ĝi restis kiel dua- aŭ tria-momente lernata fremdlingvo. Do, fakte, nesciata.

Mi ne scias, ĉu la anglan antaŭenpuŝas reakciuloj kaj imperiistoj. Povas eĉ esti, ke jes. Certas, ke postulas kaj antaŭenpuŝas la anglan jenaj fortoj:

- Ĝenerale, ni rimarkas la popolan volon. La eŭropaj gepatroj postulas, ke iliaj infanoj, en la lernejoj, lernu la anglan kiel unuan fremdlingvon.
- La *lingvomerkato*, kiu liberiĝis post la falo de la Berlina muro, puŝas al la disvastiĝo de tiu komunikpova lingvo. La rusa estas eksa, kaj ĉiukaze ĝi neniam estis laŭmoda. La angla havas la ĉarmon de la nove trovita libero, kaj de la progreso.
- La *sciencia evoluo* kaj la *influo de la tekniko* puŝas al la uzo de unueca lingvo. Se vi volas partopreni en la scienca vivo, vi nepre devas bone scii la anglan (parole kaj skribe, ne nur lege kaj aŭde).
- La *ekonomio*, kiu liberiĝis ekde 1989 mondnivele, liberigis ankaŭ la “lingvajn valorojn”. La angla estas la fakta interlingvo en la kampo ekonomia. La homoj rimarkis, ke, se iu lernas la ĝustan lingvon, tiu pli facile karieras ol iu alia. Kiu dekretas la ĝustecon de la lingvo? Evidente, la merkato, t.e. la kunaj fortoj de ĉiuj aĉetantoj kaj de ĉiuj vendantoj.
- La altiĝo de *American way of life* (t.e. la kultura influo) estas puŝa forto favora al la angla. Ĉu prave aŭ malprave, en la senco, ke multaj anglemuloj ne konas precize pri kio temas.

Sed tia vivmaniero estas ja prestiĝa. Kaj ne misa: montriĝis, ke en Nordirlando la junularo parte usoniĝis. Tiu usonigita parto de la junularo ne plu interesiĝas pri la lokaj bataloj, kaj rifuzas akcepti la iamajn "valorojn" de malkonkordo kaj malamo. Cetere, ĉie, kie usoniĝo manifestiĝas, naskiĝas komunaj (kaj supernaciaj) valoroj, interesoj, sportoj, modeloj, vortoj.

En Eŭropo, kun iom pli da detaleco, ni observas la jenon. Militfine, malaperis la graveco de la franca (Vassere 1999): en la sudo de Eŭropo, ĝi estas pluinstruata, sed kiel dua lingvo (post la angla). En la nordo de Eŭropo, ĝi estas nur sporade instruata, sed nur kiel dua lingvo (en konkuro kun la germana). Ĝenerale, la lernejo ne kapablas bone instrui la duan fremdan lingvon, ĉar ĝi ne kapablas disponigi taŭgajn rimedojn.

Post la dua mondomilito, Germanio, dum certa tempo, eĉ malaperis el la geografiaj mapoj. Ĝia lingvo subite kaj komplete malaperis el la internacia uzo. Eŭropon kulture rekonstruis rusoj kaj anglalingvanoj. Dum unu-du jardekoj restis spuroj de la scienca uzo de la germana: mi memoras spritaĵon el ja 60-aj jaroj. Usona kaj rusa satelito renkontiĝas en la spaco. Unu alparolas la alian: "Sprechen Sie deutsch<sup>9</sup>?" Sed, kompreneble, tio ne povis daŭri longe. Ankaŭ en la aeronautiko, oni baldaŭ ekparolis ekskluzive angle.

La rusoj enkondukis la rusan en la satelitajn landojn, sed la rusa vivmaniero ĉie estis io absolute nedezirata. Je tio fiaskis la instruado de la rusa en la lernejoj. Male, la usona vivmaniero (civilizo) estis tre prestiĝa kaj dezirata. Tial ĝia lingvo fariĝis tre dezirata.

La postmilita rekonstruo de Germanio permesis rapidajn ŝanĝojn en la loka lerneja lingvo-politiko. En Italio kaj en Hispanio, la evoluo estis *intence* malrapida. Por ne alarmi la homojn, kaj por tamen ŝpari hom- kaj mon-rimedojn, nur iom post iom oni enkondukis la anglan kiel unuan fremdan lingvon en la landajn lernejojn. En la sesdekaj jaroj, preskaŭ ĉiuj lernantoj elektis la francan. Poste, la influo de la angla altiĝis, kaj la demando por ĝi multiĝis. La strategio de la ŝtata oferto en la landaj lernejoj estis ĝuste respondi adekvate al la kresko de la demando. La angla fariĝis dominanta. Nuntempe la franca estas preskaŭ ĉie la duamomente instruata fremda lingvo. Pro tio ĝi fariĝis ne plu vaste utiligata.

La Berlina "muro", kaj entute la politika divido interne de Eŭropo, helpis Esperanton, ĉar ĝi kreis la iluzion, ke, malantaŭ la muro, la lingvo estas estimata kaj aplikata: eble eĉ estis iom tiel. La ekzisto de divido ŝajnis esti barilo al la angla: "preter la muro" oni ne deziras havi usonecan interlingvon. Bedaŭrinde, la uzo de Esperanto fariĝis parto de tiu forgesenda periodo, kaj tial la lingvo malaperis kiel neĝo je l' suno. Anstataŭe, la angla penetris novajn teritoriojn, kie la homoj atendis ĝuste nur ĝin.

La esperantistoj asertas, ke tiu lingva mond-ordo fakte estas *maljusta* kaj *malpraktika*. La normalaj civitanoj, male, ne konsentas, ke temas pri maljusteco. Cetere, la nuna komunika mond-sistemo ne estas malpraktika. La angla funkcias bone: ĝi estas efika, pova, kaj ĝi "kostas" malpli, ol se oni volus enkonduki Esperanton kiel novaĵon. Ĉar por ĉi-lastaj ekzistas nur ĉu malnova, ĉu nesufiĉa instru-materialo (mi aludas al instruistoj kaj al lernolibroj).

Ne ekzistas, do, demando pri "lingva imperiismo" kaj pri "lingvomortigo" (Yamasaki 1999), almenaŭ kiel fenomeno ĝenerala. Nur la esperantistoj kredas, ke tiuj temoj estas gravaj. Se entute, "lingvomortigo" estas fakte simpla "lingva sinmortigo": dezirata, revata, petata,

---

<sup>9</sup> "Ĉu vi parolas la germanan?"

favorata, ŝatata. Nenio perforta okazas aŭ okazis. Temas pri elekto, kiun faris la Romanĉoj, la Tiĉinanoj, la Okcitanoj. La Katalunoj decidis aliel. Se la identeco de homgrupo estas forta, ĝi povas pretervivi ankaŭ malfacilajn cirkonstancojn. Se la identeco de homgrupo estas malforta, eĉ dorlotata lingvo, kiel la romanĉa, ne ricevos apogon ĉe ĝiaj parolantoj, kaj malaperos.

Ofte mi demandas min, kiu estas etnocentra. Ĉu vere nur la Usonanoj, aŭ ĉu ankaŭ niaj eŭropaj esperantistoj? En Usono ekzistas etnocentrismo, kaj kompreneble ankaŭ senkultureco, sed ne pli ol en Francio kaj en Italio. Abundas, male, altkvalitaj lernejoj, kaj la kapablo utiligi kreive sciencon. Tion la Eŭropanoj rajtas envii tute prave.

*Multo el la Esperanto-mondo efektiviĝas: internacia lingvo, internacia kulturo, monda komunikado, interŝanĝo de homoj, frua instruado de lingvoj, justeco, tolero, internacia humanismo, ktp. Nur la lingvo komplete forvaporigis. Nome, Esperanto ne plu apartenas, serioze, al la "konkuro".*

Sen Esperanto funkcias *Amnesty International*, *Médecins sans frontières*, *Terre des Hommes*, *Caritas International*, *World Wildlife Found*, kaj eĉ IPA (*Internacia Polica Asocio*: fondita de W. Marich) kaj ILF (*Internacia Framasona Ligo*). Kurioza afero: la du solaj internaciaj fakasocioj fonditaj de esperantistoj per Esperanto, kiuj sukcesis, nuntempe ankoraŭ funkcias nur dank al la angla! Kompreneble mi ne aludas ĉi tie al la interŝtataj organizaĵoj, kiel UNO, Unesko, EU, ktp, kiuj ankaŭ funkcias ĉefe tra la angla.

Montriĝis, ke la homoj ne interesiĝas pri la jenaj aspektoj, kiuj aperas esencaj al la esperantistoj. Ili volas rezultojn, tuj, kaj, por ilin havi, ili kapablas akcepti kelkajn malagrablajn. Cetere, *le mieux est l'ennemi du bien*<sup>10</sup>. Ni asertis, ke neniu plu pledas kontraŭ lingva imperiismo aŭ kontraŭ io tia, almenaŭ rilate la anglan; se entute, temas pri subjektiva sento. Ofte argumentoj, kiuj al ni ŝajnas plej trafaj, fakte ne efikas ĉe eksteresperantujanoj, ĉar ili ne suĉis nian saman ideologian lakton.

- *Facileco / malfacileco* de lingvo estas konceptoj relativaj. Ekzistas multaj malfacilaj lingvoj (t.e. lingvoj malregulaj, aŭ kun aparte komplika gramatiko aŭ fonologio). Sed tio ne malhelpis al la araba, al la germana, al la franca, al la rusa, al la latina, al la helena, al la ĉina: ili ne estis bariloj por ilia disvastiĝo.
- Ĉiu lingvo estas enlerneje *propedeŭtika*. La kapablo de la Romanĉoj kaj de la Itallingvanoj en Svislando, lerni lingvojn, venas esence de la kutimo dulingvi jam hejme: dialekte kaj altlingve; sed ĝi venas ankaŭ de la neceso lerni fremdajn lingvojn.
- Pli bonas *konata* kaj *pova* situacio, ol pli bona, sed ne elprovita. Esperanto povas aspekti kvazaŭ danĝera veto, ĉar ĝi estas ĝenerale nekonata, kaj tute certe senpova, en la nuna situacio. Ĉiu homo, finfine, estas tre konservativa en siaj faktaj elektoj.

Naskiĝis giganta tutmonda lingva libera merkato (Fössmeier 1997): komuniko kaj kulturo iĝis interŝanĝeblaj varoj, takseblaj sur merkato. Ilia valoro dependas de la merkato, kaj la komunika valoro determinas ilian utilon por la povo, por la kulturo, por la informado. Kaj, krome, la komunika valoro dependas de la kredo de la homoj. En tiu merkato, ekzistas, kompreneble, niĉoj: ankaŭ lingvaj niĉoj. Nuntempe, la lingvo plej prestiĝa en la mondo estas

---

<sup>10</sup> "La plejbono estas malamiko de la bono".

la angla (Petralli 1998). Ĝi radikale influas niajn eŭropajn lingvojn per novaj vortoj de novaj konceptoj, ĉu ili necesas, ĉu ne.

Ni rimarkas amason da vortoj, apartenantaj al la komunuza lingvo, aŭ al la scienca aŭ iel specialigita lingvo, kiu invadas niajn lingvojn. La franca kaj la hispana kapablas krei interesajn lokajn variaĵojn, ofte tra ŝablonoj. La germana kaj la itala ne kapablas evoluigi taŭgan sintenon. La itala, ĉiam riĉa el novaj vortoj, iom post iom malriĉigas el siaj propraj kreaĵoj (Cortelazzo 1999).

Skribas de Swann (1998):

*“The culture prestige adhering to English language exports is commensurate with the position of the language and the culture in the global network of cultural exchange. Such prestige is not only a function of the worldwide distribution of culture, but also of the global military, political and economic hegemony of America - and formerly of England”.*

La nuna penetro de la angla en Eŭropo (kaj multe pli en Afriko kaj Azio) estas io speciala. Ĝi estas multe pli intensa ol la iama penetro de la franca en Eŭropo. Ĉar la francan parolis nur kleruloj, kaj la francan adoptis plene nur rusaj nobeloj. En tuta Eŭropo nombre superis la sciencaj ĵurnaloj publikigataj en Francio, sed, en la diversaj landoj, oni eldonis propralingvajn periodaĵojn. *Nun ne plu*: la sciencaj periodaĵoj aperas ĉiulande grandparte en la angla. La angla penetris ĉiun momenton de la vivo de ĉiuj. Iusence, la nuna situacio lingve similas al la alveno de la latina en la keltaj landoj. Ĝi estas, fakte, movado amasa, kaj ne elita, kiu tuŝas ĉiujn aĝojn, kaj moviĝas en la amaskomunikiloj.

Ni vidu tion en kemia fako (W. Liebscher, 1998: la donitaĵoj estas el 1994):

Sciencaj periodaĵoj en kemia fako, laŭ la lingvo, en kiu ili aperas, kaj laŭ la lando, en kiu oni publikigas ilin (1994)

Lingvo	Procentaĵo	Aperlando	Procentaĵo
Anglalingvaj	79,3	USA	27,4
Ruslingvaj	7,6	Japanio	13,2
Japanlingvaj	4,7	Germanio	7,4
Ĉinlingvaj	3,2	Britio	?
Germanlingvaj	2,3	Rusio	6,5
Alilingvaj	6		

Interesa fenomeno estas la jena: post malmultaj jaroj, la anglan parolos pli da nedenaskanoj, ol da denaskaj anglalingvanoj. La angla do fariĝos tiam la plej disvastiĝinta ponto-lingvo, kun ankaŭ propra ampleksa denaska parolantaro. Jam nun aperas ĉiam pli ofte verkistoj en Hindio, en Pakistano, en Afriko, kiuj verkas angle, kvankam ili ne estas origine anglalingve. Komence, tiu fenomeno estis sporada (i.a. Josef Conrad). Nun, unu el tiuj verkistoj (Soyinka) atingis la Nobelpremion pri literaturo.

La iompostioma kresko de la uzo de la angla en specialaj medioj, en avangardaj fakoj, efikis kiel lavango. Iom post iom oni atingis la kritikan mason, preter kiu la angligo de la scienca komuniko en niaj landoj okazas de si mem, per propra forto, kaj iĝas nehaltigebla.

Unu el la dogmoj de la lingvo-instruistoj kaj de la esperantistoj baraktas kaj ŝancelas. "Ni instru al la infanoj la lingvojn de la najbaroj, kaj unu komunan lingvon al ĉiu". Nuntempe,

en multaj lernejoj oni rifuzus lerni la lingvon de la najbaroj: kial Nordgermanoj devus lerni la danan? La dana estas utila nur por paroli kun la Danoj. Prefere oni instruu la anglan, per kiu oni povas paroli kun la tuta mondo, inkluzive de la Danoj (kiuj, cetere, tre bone scias la anglan).

Alia dogmo (tipe esperantista) tremas: "Se ni ĉiuj lernos la anglan, la anglalingvanoj ne plu bezonos lerni fremdan lingvon, kaj tio kreus malagrablan avantaĝon al ili". Ankaŭ mi estas konvinkita, ke la premo al la lernado de fremda lingvo, en anglalingvaj landoj, ege malintensiĝos. Kial diable lerni fremdan lingvon, kiam, ĉiu-kaze, kaj ĉie en la mondo, oni komprenas min, kiam mi parolas mian gepatran lingvon? Tute prave, sed certe ekzistas ankoraŭ kelkaj anglalingvanoj, kiuj lernos fremdajn lingvojn, depende de la emo, de la situacio, de la bezonoj, de la ekspektoj, ktp. Aliflanke, la ne-anglaj popoloj tute ne zorgas pri tiu "privilegio", aŭ "avantaĝo". Eble ĝi ekzistas, sed tion rimarkas kaj tion bedaŭras nur la esperantistoj.

## *La naskiĝo kaj la disvastiĝo de la sociaj novigoj*

La rolo de la urboj kiel nodoj en la komunika reto estas grava. Pro tio ili estis ĉiam la kerno de la ŝanĝoj, t.e. de la sociaj, kulturaj kaj teknikaj novigoj. Eĉ la modo naskiĝas en la urboj, kaj ne en la vilaĝoj. Pro tio, ili estas ankaŭ la centroj de la riĉo. La urbo estas iusence la patrino de la novaĝoj, sed ankaŭ la loko de la transformiĝo.

*Kristanismo* naskiĝis en la urboj, kaj ĝi migris nur iom post iom al la kamparo. Ankaŭ protestantismo naskiĝis kaj disvastiĝis en la urboj; nur poste, kaj ne ĉiam, ĝi disvastiĝis ankaŭ en la kamparoj. Tial la disvastiĝo de la protestanta eklezio, en kelkaj germanaj landoj, aspektas kvazaŭ leopardeca: la urboj estas evangeliaj, dum la kamparo restis esence katolika. La banksistemo, la instru-institucioj, la moderna registara sistemo, ĉio naskiĝis en la urboj. Kaj, ĝenerale, la urboj formas reton, dank al la ekzistantaj komunikvojoj. Siatempe, temis pri riveroj, lagoj, stratoj, markoloj, marbordoj, montpasejoj.

En la urboj naskiĝas la lingvoj, kaj, en ili, la lingvoj (dialektoj) formortas. De urbo disvastiĝas lingvaj novaĝoj, kaj, eventuale, ankaŭ la plej prestiĝa lingvo, kiu migras de la urbo mem al la apudaj urboj. Nur poste, iom post iom, la novaĝo migras ankaŭ al la kamparo. Nuntempe la "urbo", kiel centro de novaĝo-disvastiĝo, ne estas plu nur konkreta urbo. "Urbo" estas la teknike, science kaj socie "moderna" mondo. Kaj, kompreneble, la komunikvojoj inter la "urboj" estas iom aliaj ol la iamaj. Hodiaŭ oni ne plu disvastigas nur tuŝeblajn produktojn, sed ankaŭ specialan produkton, kiu nomiĝas informo. Ankaŭ en la antikvaj tempoj okazis tio, sed nun ni bone konscias pri tiu fenomeno, kiu fariĝis karakteriza en nia epoko.

Komunka reto estas la tuta scienca mondo (revuoj, kongresoj, universitatoj), la komerca mondo (foiroj, rilatoj), la aera mondo (trafiko), la financa mondo (bankoj), kaj la tuttera teksaĵo (TTT: WWW). *Tiu moderna reto havas unu solan lingvon. La anglan. Oni jam trovis rimedon, por garantii la "lingvan ĝentilecon" en TTT: ĉiu teksto neanglalingva estu akompanata de anglalingva traduko (Vassere 1999).*

La angla jam estas la lingvo de la inter-urba reto. Ĝi do fariĝas, iom post iom, ankaŭ la lingvo de la urboj mem, aŭ, prefere, de tiu virtuala urbo, kiu konstruiĝas ĉirkaŭ la cirkulado de la informoj.



Sed urboj (la faktaj kaj la virtualaj) estas komplikaj, kaj ili havas multajn nivelojn. Ni devas distingi inter tiuj niveloj, ĉar alie unu observaĵo povas bari nian vidon al alinivela observaĵo. En Zuriko eblas vivi sen scii la germanan (ekz-e parolante nur la italan). La itala estas centra lingvo en la konstruado kaj en la restoraciado. La hispanoj kaj la portugaloj, kiuj venis pli poste, lernis la italan. Sed ĝi estas lingvo sen prestiĝo, kaj, se iu volas vere integriĝi kaj supreniri en la zurika socio, tiu devas lerni la lokan lingvon. La sola insulo, kie fakte kaj merite regas la itala lingvo, estas la lernejo de porblindulaj hundoj en Bazelo. La dreslingvo estas la itala, kiun oni selektis surbaze de ĝia vokala riĉeco (Campagnuolo 1999). Kurioze: kiam mi estis infano, mi estis konvinkita, ke la hundoj lernas pli facile la germanan (*Sitz! Platz! Komm!*).

Sed en Zuriko, same kiel en Ĝenevo, Parizo, Romo, Vieno, ktp, ankaŭ eblas vivi sen scio de la loka lingvo, kaj nur pere de la angla. Integriĝo, tiam, ne estas celo, kaj cetere la prestiĝo de la angla ne puŝas onin al lingvo-ŝanĝo. Dum la ekskluziva uzo de la itala indikas malaltan socian nivelon, la ekskluziva uzo de la angla indikas tre altan nivelon. Sed, kompreneble, tio indikas ankaŭ tendencon, emon kaj modon.

Tiu ne estas tute nova aperaĵo. En Liono, en la 4-a jarcento post Kristo, eblis vivi, sciante nur la keltan. Estas konate, ke la meson oni legis ankaŭ kelte. Sed integriĝo kaj supreniro socia postulis la scion de la latina. Normala estis dulingveco. Sed la vere prestiĝa lingvo estis la latina. Klerulo povis vivi en Liono, sciante nur la latinan. Ĝi havis tiom fortan prestiĝon, ke en tiuj jardekoj eĉ la keltaj princoj decidis sendi siajn filojn al Liono, por ke ili frekventu latinlingvajn lernejojn. En miksitaj geedziĝoj, estis klare, ke la nova familio adoptis la pli prestiĝan latinan, kaj ne la lokan. Kiam la ĝermanoj invadis Keltion, la pli malforta kelta malaperis pli-malpli rapide.

Tio ne signifas, ke en la "moderna" mondo oni parolos nur la anglan. La malapero de niaj lingvoj (itala, franca, germana, ktp) ne okazos baldaŭ. Certe ne en 2045! Sed ili fariĝos loke prestiĝaj, sed duagradaj en la moderne efika komunikado. Estas facile imagi, ke oni daŭre lernos la francan, la hispanan, la italan, eble ankaŭ la germanan, . Eble pro emo, eble pro deziro pli bone profiti de ferioj, eble pro bezono (migrado al la koncerna lando), eble pro kaprico. Sed certe nur la angla garantios la bazan interkompreneblecon en la moderna mondo.

## ***Esenco de la "moderno"***

La "moderno" estas iaspeca *Zeitgeist* (la etoso de certa epoko). Iuj nomas ĝin "postmoderno", atribuante la modernecon al la iluminisma kaj pozitivisma epokoj, la epokoj de la "progreso". Ĝi estas kompleksa manifestaĵo, malsama laŭ la landoj, laŭ la populaciaj grupoj (laŭ aĝo, sekso, nivelo de eduko, ktp), kaj laŭ socia sinteno.

- La vivmaniero eksimilas ĉie: ĝi estas komparebla kaj konata. Similas la konoj, la ideoj, la atendoj, la modeloj, la sociaj kondutoj, la etikaj konceptoj. Ekster tiu baza simileco, mankas radikalaj alternativoj. Mankas "kompleta alieco", eventuale netradukebla. En la antikvaj tempoj, la irana, la ĉina, la amerikaj kaj la eŭropa civilizoj estis radikale nekompareblaj inter si, kaj ili ne kapablis komuniki reciproke (aŭ tre malmulte). Nun ili komunikas multe pli facile.
- Sed interne de tiu esence simila kadro, la detaloj kaj la diverĝoj estas tiel multaj, ke povas iusence kreiĝi aŭ resti apartaj kvazaŭ-kulturoj, pli malpli disigitaj de la ĉefkulturo, kiujn

oni nomas “subkulturoj”. Cetere, inter la “subkulturoj” ekzistas baza interkomunikebleco, tra la fundamento komuna. Tiuj subkulturoj, hodiaŭ, ne ĉiam estas lokaj aŭ etnaj, sed homnivelaj. Ili povas konekzisti en unusola urbo. Hodiaŭ ne plu ekzistas unu vero, malsama laŭ la loko kaj laŭ la epoko, sed multaj veroj, kiuj konekzistas. Se ne komplete: tiuj malsamaj opinioj pri la vero troviĝas sur bazo komuna. Ekzemple, dum la pasintaj jarmiloj, la rilato inter ŝtato (aŭ reganto) kaj la populacio administrata, estis interna afero de la lando mem. Hodiaŭ montriĝas, ke la rilatoj inter la populacio kaj la reganto povas esti multspecaj, sed ili ne devas tro malsimili disde normala etike valora rilato inter individuoj. Kion cetere jam Edmond Privat sopiris. Tial, sur la bazo de evoluanta etika sento, kiu, ekz-e, malkovris, ke lando ne estas io komplete sendependa: masakroj, krimoj, diskriminoj, ktp. fariĝas io ĉiam pli facile punebla. Ĝuste de tiu nova sento venas la t.n. "rajto je interveno", kiun la modernaj politikaj krimuloj kaj buĉistoj profunde malamas.

- La vivsituacio iĝis tiom komplika, ke naskiĝas specialistoj pri komplikeco. En tiu kulturo, ni rimarkas emon al simpligo de komplikaj demandoj. Ofte la demandoj estas konsiderataj sinkronie (en la nuna konsisto), kaj ne diakronie (laŭ la tempa evoluo). La historio ne estas plu identiĝe centra. Jarcentlongaj disputoj, kiaj ekzistas inter Serboj kaj Kosovanoj, kaj inter katolikaj kaj protestantaj Nordirlandanoj, fariĝas ĉiutage pli nekompreneblaj kaj etike netolereblaj, ĝuste ĉar ili baziĝas ekskluzive sur la tempa dimensio.
- Novaĵo, kies efiko ne estas ankoraŭ tute klara, estas la socia premo al scio kaj al komuniko amasa, mult-kanala kaj rapidega.
- Grava estas la vasta apliko de la tekniko kaj de la scienco, kiuj ĉion penetras (komercon, laboron, ĉiutagan vivon). Samtempe, mirigas onin la rezisto kaj eĉ “moderniĝo” de la magio. La homo, esence, ne fariĝis maŝino, kaj rezonas ankoraŭ kiel antaŭ 50 mil jaroj.
- Premo al prestiĝo kaj al konsumo puŝas onin al individuismo kaj al surmerkato de ĉio, ankaŭ de la valoroj. Ni reasertu la jenon: ne ekzistas plu unu sola vero, sed multaj.
- La ideologioj paliĝas, la certecoj fariĝas malpli fortaj: ĝi estas epoko relative kruda, en kiu oni atribuas esencan gravecon al la koncepto "utileco", konsiderata tamen en ne-rigida vidpunkto.



# Lingva politiko en Svislando

## *Lingva historio*

Svislando ĉiam konfrontiĝis kun lingvaj demandoj, kiujn ĝi devis solvi, kiel eble plej racie, por permesi intern-svisan komunikadon.

Ĝis 1798 en la alemanaj kantonoj regis la (svis-)germana; en la romandaj kantonoj regis la franca, kaj en la itallingvaj kolonioj regis la itala. En la malmultaj tutsvisaj kunvenoj, oni parolis la francan kaj la germanan; eventuale oni utiligis tradukistojn. Sed la nobelaro, la riĉa burĝaro kaj la militistoj, devis havi principe bonajn konojn de la franca, ankaŭ pro la elmigrado al Francio, kiel soldatoj. La falo de la Malnova Svislando devigis al raciigo kaj oficialigo de la situacio.

Post la franca invado, inter 1799 kaj 1803, formiĝis nova, ne-vivipova Svislando. Ĝi estis lando malpaca, kaj komplete unuecigita, kvazaŭ Francio. Ĝia ĉefurbo estis Aaraŭo. La franca kaj la germana estis la oficialaj lingvoj.

Napoleono komprenis, ke tiel unuecigita lando ne povus vivi sen daŭra kverelado. En 1803, li kreis la novan Svisan Konfederacion, kun liberala konstitucio. La nova ŝtato postvivis 1815, kvankam la konstitucio mem devis aliĝi al konservativa leĝbazo. En la konstitucio de 1848 (liberala kaj samtempe konfederacia) menciigis la germana, la franca kaj la itala lingvoj. La franca estis la lingvo plej uzata en la internaj konfederaciaj kontaktoj, ĉar ĝi estis ankaŭ la lingvo de la internacia diplomatio. La germana estas ĉiuokaze necesa. Neniu menciis la romanĉan (la romanĉoj mem forgesis ĝin). Supozeble pro tio, ke la regantaj kulturaj lingvoj de la tri-popola ligo (nuntempe: Grizono) estis fakte nur du: la alemana kaj la itala.

En 1874, la nova federacia konstitucio mencias la germanan, la francan kaj la italan. La romanĉa estas ree forgesita ĝis antaŭ la dua mondo-milito: tiam, en 1938, oni riparitis tiun forgeson per la inkluzivigo de tiu lingvo el la konstitucio. Tio estis intencita por kontraŭbatali la hegemoniajn pretendojn de Hitler kaj ĉefe de Mussolini, kiu proklamis, ke la romanĉa estas unu el la dialektoj de la itala. Ne nur: dum la hitlera epoko komenciĝis la evoluo de la svisgermana, kies uzo fariĝis obsede ĉiea, en Alemanio, t.e. en la germanlingvaj kantonoj de Svislando, ankaŭ en cirkonstancoj, kiam ĝenerale oni uzas la pli "altan" stilon. Tion oni faris por spiti la faŝistan Germanion, sed bedaŭrinde tio restis ankaŭ post la fino de la dua mondo-milito.

Indas ĉi tie mencii, ke en Svislando, laŭjure, la germana, la franca kaj la itala estas *samnivelaj* kaj *samdignaj* lingvoj. Neniu lingvo estas "pli egala" ol la ceteraj, ankaŭ ne en la praktiko. Nur la romanĉa iusence estas "minoritata" lingvo. Kompreneble, la Germanlingvanoj reprezentas la 70% el la Svisoj. Sed indas ankaŭ agnoski, ke oni ne rajtas paroli pri "svisgermana" naciismo, aŭ pri komplekso de supereco. Fakte, la Svisgermanoj, oficiale, enkonstituciigis la germanan, sed ili mem nur skribas tiun lingvon. Parole, ili (tro) ofte uzas ĝin nur mise, ĉar la neoficiala, sed ĉie parolata lingvo en Alemanio, estas dialekto nomata Schwyzertüütsch. Iusence, la svisaj Alemano havas mentalecon de minoritato. Por Romandoj, Romanĉoj kaj Italsvisoj tio certe reprezentis grandan kunvivan avantaĝon.

Ĝis 1950 estis klare: en Alemanio (t.e. en la germanparolantaj kantonoj) la unua fremda lingvo instruata en la lernejoj estas la franca. En Romandio (t.e. en la francparolantaj kantonoj) la unua fremda lingvo instruata en la lernejoj estas la germana. En la itallingva Kantono Tiĉino, la unua fremda lingvo estas la franca, kaj la dua estas la germana. En la franc- kaj germanlingvaj kantonoj, ie kaj tie, oni instruis ankaŭ duan fremdan lingvon: laŭelekte, la *italan* aŭ la *anglan*.

Inter 1950 kaj 1990 kreskis la aktiva kunlaboro inter la kantonaj Instru-departementoj (kiuj havas la plenan rajton pri leĝofarado en la instrua kampo), kaj la Konfederacio. Sed, samtempe, kreskis ankaŭ ĉiuspecaj rilatoj kun eksterlando. La lernejoj interŝanĝoj plibonigis la lingvajn kaj kulturajn konojn. Cetere, la lernejoj instru-teknikoj pliboniĝis radikale. Oni intensive celis kunordigon en la instruo de la unua kaj de la dua fremda lingvo en la lernejoj. Sed jam de du-tri jardekoj, la germana malaperis el la internacia scenejo, la franca grave reduktiĝis, kaj ekmontriĝis nova lingvo, la angla. En plurlingva lando, tio, evidente, kaŭzas problemojn.

## ***Kiel efikas la lingvo-politiko en Svislando***

Oficiala politiko ĉiam estis, promocii la svisan plurlingvismon. La angla, laŭ la oficialaj instancoj, estis ja instruata aŭ instruenda, sed nur kiel praktika "ilo". La celo estis disvastigi la konon de la internsvisaj lingvoj. Interne de kelkaj limoj: reciproka instruo ekzistas inter franca kaj germana. La itala estas relative malmulte prikonsiderata. La romanĉa aperas nenie (fakte, nur en la Zurika, la Friburga kaj la Ĝeneva universitatoj).

Montriĝis, ke la demando estas komplika, ĉar ĝi koncernas la lingvan instruon en la elementaj kaj mezaj lernejoj, en la profesiaj lernejoj, en la universitatnivela lernejoj.

Plue, montriĝis, ke la angla aperas multe pli ofte, ol oni imagis. Ĝi troviĝas en la universitataj kursoj ne nur kiel instruata lingvo, sed ankaŭ kiel instruila lingvo. FNRS<sup>11</sup> uzas la anglan, kaj ekzistas gravaj privataj universitatoj usonaj en Svislando, kiuj ankaŭ uzas la anglan.

Dum longa tempo, oni klopodis bari la vojon al la instruado angla, sed tio ne povis daŭri. Pli poste, oni ekdistingis inter "oficiala decido" (ĉiam tradiciema), kaj la fakta praktiko, ĝenerale alia. Tio signifas, ke oni predikis, ke oni restas ĉe la malnova intenco instrui la francan kaj la germanan, kaj eventuale la italan, sed ke oni tamen aldonos kroman lingvon, la anglan. Fakte montriĝis ĉiam pli fortaj premoj al fortikigo de la instruo de la angla, al la forigo de la itala, kaj al la redukto de la alia "svisa" lingvo.

Oni proponis la uzon de la tri/kvar naciaj lingvoj en la fervojoj (FFS/SBB/CFF), kaj ĉe la Svisa Telefonkompanio. La rezulton oni ja spertas ĉiutage, kaj ĝi estas tute alia ol oni tion anoncis: en la fervojaj strekoj, inter Berno kaj Zuriko, vi aŭdas nur la germanan kaj la anglan; inter Lucerno kaj Chiasso, vi aŭdas nur la germanan kaj la italan (ofte ankaŭ la anglan). Fakte, la emo indikas unulingvecon, per la angla. La svisa telefonkompanio nun nomiĝas Swisscom. Kaj mi demandas min, kiam ni parolos pri *Swiss Mail* kaj pri *Swiss Railways*. Tio kondukas al uzo de angla vorto, kiu anstataŭas tri (ofte kvar) malsamajn nomojn en la "svisaj" lingvoj. La svisa poŝtosistemo nomiĝas, en Romandio: *La Poste*; en itallingva Svislando: *La Posta*; en Alemanio: *Die Post*. Sed ĝis kiam?

---

<sup>11</sup> *Fond national de la recherche scientifique*: Nacia fonduso pri scienca esploro. Granda tutsvisa fonduso, kiu okupiĝas pri subvenciado de esploroj en la scienca kampo.

Verdire, la lingva demando neniam estis kerna kaj centra en Svislando. Ni spertis militojn pro religio, ni spertis militojn inter urboj kaj kamparoj. Sed lingvajn militojn ni neniam spertis.

# Enlandiĝo de nova lingvo en Svislando

## Ĉu nova intersvisa lingvo?

Iusence, ĝis 1950, la neoficiale komuna lingvo de Svislando estis la *franca*, ĉar ĝi estis unu el la svisaj lingvoj, kaj ĉar ĝin lernis ĉiu nefranclingvano en Svislando. Tio ne reprezentis problemon por Alemano kaj Italsvisoj. Krome, la franca estis grava lingvo kun tutmonda aplikado.

Sed ekde deko da jaroj, iom post iom, ni rimarkas, ke ekzistas en Svislando nova komuna lingvo, kiu migris al ĝi sekve de forta premo en la ekonomika vivo, sekve de la evoluo teknika kaj scienca, kaj sekve de la disvastiĝo de la nuntempa amas-kulturo. Temas pri la angla.

La *aspiro lerni la anglan* dependas de la cirkla efikeco inter onia ekspekto pri la socia utileco, la profito de la lerno-laboro, kaj la fakta rezulto, kiun oni atingas. Se onia laboro lerni la anglan bone utilas al oni, oni profitas per ĝi, kaj oni tion propagandos, defendos, deziros. Ankaŭ por la idoj, por ke ankaŭ oniaj gefiloj, tion povu profiti. Multaj komunumoj de Svislando (i.a., en Tiĉino: Viganello) kapablis organizi eksterlernejajn kursojn por infanoj, por ke ili povu lerni la anglan, eĉ se ĝis nun la oficiala lerneja programo nenion antaŭvidas en frua aĝo. Kun la entuziasma apogo de la lingve konsciaj gepatroj.

Sed, kompreneble, tiuj eksperimentoj estigis grandan premon al la lernejoj aŭtoritatoj, kiuj troviĝis inter du necesoj: garantii la reciprokan konon de la "svisaj" lingvoj, kaj garantii la aliron al la tutmonda lingvo, la angla.

Kion ni povas antaŭdiri el tiu cirklo? Kelkaj kantonj enkondukos, kiel unuan fremdlingvon en la lernejoj, la anglan. Tion faris jam Zuriko kaj Zugo. Ĝenevo tion atendas. Zuriko, cetere, kun interesa aldoniĝo, nome informadiko. Kompreneble, temas pri "eksperimentoj". Sed certe ili sukcesos, ĉar tion esperas kaj la aŭtoritatoj, kaj la gepatroj, kaj la gelernantoj. Mireille Grosjean malpravas, kiam ŝi asertas, ke rilate tiujn decidojn, temis pri "fulmotondro". Tute ne: la tendenco estis klare anoncata i.a. de Alberto Cotti (vidu poste).

Kelkaj kantonj (Urio, Grizono) mistrakis, enkondukante la italan kiel unuan fremdan lingvon por ne-itallingvaj lernantoj. Fakte, en Grizono (trilingva kantono), eblas elekti inter la lerno de la itala kaj la lerno la romanĉa (en la germanlingvaj lernejoj), sed preskaŭ ĉiuj komunumoj<sup>12</sup> ne-itallingvaj elektis la italan. La dua fremda lingvo en la lernejoj restos la franca, almenaŭ laŭ deklaro de la registaro, antaŭ du jaroj. Sed Grizono, antaŭ kelkaj tagoj, decidis, ke oni forigos la francan komplete. Kiel duan "fremdan" lingvon en la lernejoj germanlingvaj kaj itallingvaj, en tiu kantono, oni lernos la anglan!

En la resto de Svislando, la unua fremda lingvo restos ĉu la franca, ĉu la germana, depende de la kantono. La dua lingvo estos la angla.

---

<sup>12</sup> Tipe svisa afero: en tiu ĉi Kantono, la demandon pri la enlerneja lingvo-lerno decidis la loka komunumo!

La instruo de la itala preskaŭ ĉie malaperos, kaj tiu de la franca lingvo en Alemano en Germanio grave reduktiĝos, same kiel tiu de la germana en Romandio, se oni sekvos la ekzemplon de Grizono. Praktike, oni entombigas la almenaŭ teoriantan lernon de la franca aŭ de la germana, ĉie en Svislando. *La vera komune kaj ĉie lernata lingvo estos la angla!*

En Tiĉino estos racia nur la enkonduko de la angla kiel unua fremda lingvo en la lernejoj, kaj la instruo de la germana kaj/aŭ de la franca nur je dua momento, depende de la bezonoj. Estus eraro enkonduki la germanan kiel unuan enlernejan fremdan lingvon. Se jam oni ŝanĝas, oni almenaŭ ŝanĝu ĝustadirekte.

Certe, la kresko de nova "en-svisa" lingvo ŝancelige kaj radikale aliigas la lingvajn rilatojn inter la svisoj. Tion ne kaŭzas la angla en Germanio kaj en Italio, kie ĝisnun (krom en kelkaj firmaoj, kaj en kelkaj familioj) la uzo de la landa lingvo bone rezistas. Tio klarigas la zorgon de la Svisoj. Sed eble tiu zorgo estas troa, kaj ĝi tuŝas nur tiun generacion, kiu kutimis kredi al la neceso de la lerno de la "svisaj" lingvoj. La nunaj pli junaj generacioj trovas tute normale, ke inter svisoj oni parolu angle. Kaj, certe, la kresko de uzo de la angla en la tuta mondo "helpos" ankaŭ nin. Jen kiel.

La *Alemanoj* povos libere paroli kun la Romandoj en la angla (kiun ili ŝatas, kaj kiun ili lernas pli facile ol la francan); la samon povos fari la *Romandoj*, kiuj ankaŭ lernas pli facile la anglan ol la germanan. La *Tiĉinanoj* rekte uzos la anglan, kaj nur kelkaj "perdos sian tempon" kun la lernado de la germana kaj de la franca (tamen almenaŭ unu el la du restos necesa). La *Romanĉoj* ne plu dependos de la Alemanoj. La Alemanoj mem povos trankvile kultivi sian svisgermanan dialekton. Kun la Germanoj de Germanio ili povos paroli angle.

Certe, temas pri procezo, kiu, nun, nur komenciĝas. Sed la moderna estas ĝuste karakterizata far de rapidaj kaj radikalaj ŝanĝoj. Imagu, ke antaŭ nur du jaroj la Instru-departemento de la Kantono Grizono ekskludis la eblon, ke oni forigos la francan kiel duan fremdan lingvon.

## *Reagoj*

Estas evidente, ke la nuna evoluo en Svislando, kaj aparte en Tiĉino, kaŭzis ioman bruon kaj malĝojon. Tion ni analizos pli sube. En Svislando, grumbas tradiciuloj kaj esperantistoj. Sed, egale: la gepatroj postulas, ke la lernejoj favoru la anglan. Kaj ni vivas en demokratio, kie la registaro ne rajtas longe malobservi postulon de la elektantaro.

Neniel servas la protestoj de la *Esperanto-Gesellschaft Zürich (Kleine Schritte... 1999)* laŭ kiu la angla ne estas lingvo internacia, kvankam la Societo mem ne neas la pragmatikan uzon de tiu lingvo<sup>13</sup>. Al la ĵurnalisto Durisch (1998) estas klare: "La studo de la angla servas al niaj infanoj, kaj ili tre bone scias tion. Inter diverslingvanoj, ili parolas angle. Kaj la lernejoj lernceloj de la franca, respektive de la germana, ne atingiĝas". Ankaŭ Demierre (1999) observas, ke estas pli facile trovi oficiston, kiu scias ĉu la francan/anglan ĉu la germanan/anglan, ol iun, kiu bone scias la du ĉefajn naciajn lingvojn. Carlo Manzoni, grava tiĉina ĵurnalisto (1998) malaprove parolas pri la "Zurika eksperimento", el kio, laŭ li, venos nur malmulto. Laŭ mi, li ne kapablas rimarki la radikalan ŝanĝon, kaj la verajn kaŭzojn, kiuj troviĝas malantaŭ ĝi. La itala sociologo Alberoni (1998) plendas pro la ekskluziveco de la angla, kaj asertas, ke oni devus reekinstrui, krom la anglan, ankaŭ aliajn lingvojn (li aludas al

---

<sup>13</sup> Laŭ la prezidanto de EGZ, Esperanto kreskas en Zuriko. Sed la demando estas fakte alia. Kiom pli rapide kreskas la angla? Kiom (mal)alta en Zuriko estas la lernemo rilate Esperanton?

Italio, sed li bedaŭrinde mencias Svislandon kiel ekzemplon). Mia kolego Steiner (1998) atentigas, en *Schweizerische Ärztezeitung*, ke la “eksperimento” de la “Zurika edukministro Buschor estas granda eraro”, sed samtempe li atentigas, ke en la *Federacio de la svisaj kuracistoj* (FMH) iu specialiĝ-asocio jam demandis siajn anojn, kion ili opinias, pri la eventuala ekskluziva uzo de la angla lingvo, kiel societa komunikilo.

Inter la malgajnantoj troviĝas, la reprezentantoj de la tradicia lingvo-politiko de Svislando. Neniu el ili volas agnoski la situacion. La tiĉina historiisto Gilardoni (1998) kredas, ke el la ĝeneraligo de la angla povas veni perdo de oportunecoj por la itala en Svislando - aŭ eble eĉ inverse! *N'importe quoi*<sup>14</sup>: eĉ specialisto nenion plu kapablas korekte analizi kaj prognozi.

## Ĉeesto de la angla en la konscio de la svisoj

Iom post iom, sen ekstera premo, per simpla konstato de la situacio, kreskas nova lingvo-konscio en Svislando. Eble, la angla, kiu jam funkcias kiel internacia lingvo en la tuta mondo, povas esti utiligata kiel komuna komuniklingvo en Svislando mem. La angla do meritas lernon pro duobla funkcio, kaj enlanda, kaj eksterlanda. Finfine, tio korespondas al simila sperto, farebla interne de Eŭroplando.

*Kial la bernaj gimnazioj deziras lerni la anglan, laŭ enketo farita 1982-3 en la bernaj lernejoj (Dürmüller, 1989):*

Pro ĝia tutmonda disvastiĝo	97,4%
Pro ĝia enkomerca utiligo	65,4%
Pro ĝia uzo en turismo	60,2%
Pro ĝia faciligo de labor(loko)	55,1%
Pro ĝia uzo en scienco	51,3%
Pro ĝia uzo en amuzado	25,6%
Por lerni pri Usono	17,9%
Por lerni anglan kaj la usonan literaturon	12,9%
Por lerni pri Anglio	10,3%

*La homoj ekspektas ion de sia lingvolernado.* Ni rimarkas, ke la valoroj, kiuj troviĝas je la bazo de la lingvolernado, ĉe niaj pli junaj samlandanoj, estas tute aliaj, ol tiuj, kiujn esperis la esperantistoj. Ili lernas la anglan pro praktikaj kaŭzoj: vasta uzo, utilo, faciligo de laboro, ktp. Literaturo kaj kulturo rolas malmulton en tio. Sed ili estas la veraj radikoj de la motivado al la lerno de la angla, kaj al ĝia iompostioma disvastiĝo.

La Svisoj revas pri komuna lingvo. Tion pravas jena populacia pridemandado (Dürmüller, 1989). Oni disdonis demandaron al reprezenta specimeno de svisaj german-, franc-, kaj itallingvaj gejunuloj. Oni pridemandis, kiun lingvon ili favoras en uzo internacia. La respondo estis indika: plej multaj indikas la anglan al tiu rolo (escepte en la itallingva Tiĉino).

Ni rimarkas, ke niaj svisaj civitanoj *facile antaŭvidas* la oficialigon de la jam nuna rolo de la *angla* en nia lando: 65.3% de la germanlingvanoj, 65,7% de la franclingvanoj, kaj 48,5% de la itallingvanoj aŭspicias la anglan kiel komunikan lingvon.

<sup>14</sup> “Ion ajn oni rakontas”.



La gejunuloj ne nur ion asertas, sed ankaŭ faras. En multaj lernejoj ili devas elekti inter la itala kaj la angla, sed kompreneble ili elektas la anglan. Cetere, la bildiĝo de la angla estas la jena: “nova, moderna, unika, dezirinda, supera, imitinda”. Male, plurlingveco iĝis iom eksmoda, kiel cetere ankaŭ Esperanto: “malnova, kosta, malfacila, neutila, fiaskinta”.


Jen alia pridemandado, kiu inkludas la rekrutojn, kiuj alfrontas la t.n. "pedagogiajn" ekzamenojn, komence de la rekruta periodo.

Montriĝas, ke la angla ĝuas grandan kultivon, malgraŭ la fakto, ke nenie, almenaŭ ĝis nun, ĝi estis instruata kiel unua fremda lingvo.

Ni rimarkas ĉi tie, ke niaj rekrutoj scias ĝenerale pli bone la anglan ol la “fremdan” svisan lingvon, kvankam la angla estas nur la duamomente instruata lingvo!

Respondo de junuloj, al la demando, kiun lingvon ili favoras en internaciauzo.

D-Form estas la demandaro en germana lingvo, al alemanaj junuloj.  
 F-Form estas la demandaro en franca lingvo, al romandaj junuloj.  
 I-Form estas la demandaro en itala lingvo, al itallingvaj junuloj



Por pli bone kompreni tiun grafikajon:

- P-Germ signifas “Prefero al la germana lingvo”.
- P-Fran signifas “Prefero al la franca lingvo”.
- P-Ital signifas “Prefero al la itala lingvo”.
- P-Angl signifas “Prefero al la angla lingvo”.

Lingvoj: procentaĵo de rekrutoj, kiuj deklaras kompreni, paroli, legi aŭ skribi (almenaŭ bone) la germanan, la francan, la italan aŭ la anglan, krom nature sian originan lingvon.

Procentaĵoj por ĉiu el la kvar aspektoj (kompreni, paroli, legi, skribi) kaj mezvaloro de tiuj kvar (Dürmüller 1989):

### Rekrutoj parolantaj

deklarascii	la germanan			la francan			la italan		
	francan	italan	anglan	germanan	italan	anglan	Germanan	francan	anglan
Kompreni	33,6	9,0	35,6	30,7	12,2	29,0	33,5	68,2	18,8
paroli	27,6	5,6	32,0	22,4	7,5	24,1	27,1	58,2	14,2
legi	31,4	6,0	32,5	26,2	10,0	28,5	32,9	60,7	18,3
skribi	25	4,1	28,7	28,7	4,3	24,0	25,9	50,0	15,9
<b>mezvaloro</b>	<b>29,4</b>	<b>6,2</b>	<b>32,2</b>	<b>25,5</b>	<b>8,5</b>	<b>26,4</b>	<b>29,9</b>	<b>59,3</b>	<b>16,8</b>

Tio signifas, ke nuntempe, en germanlingvaj lernejoj, la scio de la angla praktike atingas tiun de la franca, kvankam la anglan oni lernis malpli longe, en la kurikulumo lerneja.

La supra tabelo de la lingvaj konoj de la svisaj rekrutoj evidente rilatas nur virjunulojn (ĉar ĝi venas de la rekrut-ekzamenoj en 1987). Sed analogaj tabeloj, kiujn Dürmüller (laŭ Roger Girido et al., 1987) prezentas, montras, ke tiu tendenco estas ĝenerala, kaj ke ĝi koncernas la tutan junularon. Nuntempa esploro atestus, ke tiu tendenco intertempe plifortiĝis.

Hodiaŭ, la anglan ni trovas ĉie, ĉefe en la junulara mondo, sed ankaŭ en la mondo profesia kaj “normala” de la kvardekjaruloj.

Aparte, laŭ la specialisto pri socio-lingvistiko en la Universitato Bern, Dürmüller, en 1988, 20% de la parolo de radio-animatoj estas anglaĵo. Ankaŭ 45% de la grafitoj surmuraj (nun certe pli multe), kaj amaso da aliaj cirkonstancoj, en kiuj la angla iĝas videbla: kanzonoj, kinfilmoj, muziko, komercado, informadiko, produktoj, uzo en scienco, uzo publika ĉe la svisaj fervojoj, ĉe la poŝto, en ekonomio, tekniko, medicino. Iusence, la angla faciligas la komunikadon interne de Svislando jam nun.

La angla delonge aperas ĉie. En TV- kaj film-reklamoj, en dulingvaj filmoj en la televido, e la titoloj de la filmoj, en la internaciaj kongresoj en Svislando, informadikon, en la uzo en universitatoj, en la uzo interne de grandaj firmaoj, en la nomoj de vendejoj, ĵurnaloj, entreprenoj, TV-elsendoj, kaj eĉ en la surstrata reklamo.

Pri Esperanto *neniu* plu parolas, ankaŭ pro tio, ke neniuj scias pri ĝi. Bruno Graf (1999) aludas al eksperimento, okazinta dum la Ago-tago 1998 en Bazelo, Berno, Ĝenevo, Laŭzano, Lucerno kaj Wil. 700 homoj estis survoje intervjuitaj.

Favoras Esperanton 60%, sed favoras la anglan ĉefe gejunuloj. 30% malfavoras Esperanton. Krome, la gejunuloj absolute nenion scias pri Esperanto. Sed sen la apogo de la junularo, Esperanto malaperos. Cetere, la nuna junularo fariĝos la reganta popolo de la venontaj tempoj.

### Enketo dum la Ago-Tago 1998:

Scias, kio estas Esperanto - meze:  
junuloj                      mezaĝuloj                      maljunuloj  
17%                                      52%                                      55%

De kiu parto blovas la vento, pravas la jena enketo en Tiĉino. La angla ĉe ni estas instruata en la dua lerno-ciklo, kiel tria fremda lingvo, sed oni antaŭvidas anticipi ĝin (kaj supozeble ankaŭ transporti ĝin de la tria al la dua rango). *Ĉu jes aŭ ĉu ne?* Kia estas la opinio? Meze:

jes                      ne                      ne scias  
52,8%                      35,5%                      11,7%

Fakte, laŭ la aĝo, plej konsentas precize la gejunuloj! Bedaŭrinde, ni "malgajnis".

Ĉiuj tiuj demandoj evidente kreas problemojn, kaj en la kantonoj, kiuj elektis la italan kiel unuan fremdan lingvon, kaj en Tiĉino, kiu hezitas forigi la francan kiel unuan lingvon, ĉar ni ne scias, ĉu enkonduki la germanan kiel unuan, aŭ rekte la anglan. Se ni enkondukus unue la anglan, eblus poste elekti inter la germana kaj la franca. Se la germana estus la unua lingvo, tiam la franca preskaŭ komplete malaperus el la listo de la lerneblaj lingvoj. Nur la angla povas funkcii kiel komuna lingvo de la Svisoj.

En 1995 okazis publika diskuto pri la instruado de fremdlingvoj en Tiĉino. Multaj proponis kaj substrekis la malnovan politikon, sed la reprezentantoj de *Union Bank of Switzerland* (UBS), sinjoroj Delcò kaj Cotti, esprimis sin atentige.

Laŭ ili, por tiĉinanoj, unuapripense, indus ja lerni unue la germanan. Sed tiu ĉi lingvo perdas ĉiam pli sian internacian radiadon. Tial preferindas instrui unue la anglan. Laŭ la jena skemo (tutsvisa):

en Tiĉino:                      Angla + Germana                      (+ eventuale Franca)  
en Romandio:                      Angla + Germana  
en Alemanio:                      Angla + Franca

Tio radikale ŝanĝus la fremdlingvan panoramon de Tiĉino. Sed ni rimarkas jam nun tiun tendencon. Estu ekzemplo koncernanta OMCT (profesia asocio de la kuracistoj de Tiĉino). Laboras en Tiĉino, kompreneble, tiĉinaj (t.e. itallingvaj) kuracistoj. Sed laboras ankaŭ kelkaj enmigrintaj ne-tiĉinaj kuracistoj (el Alemanio kaj Romandio), kiuj do ne parolas la italan kiel unuan lingvon, kaj laboras ĉe ni ankaŭ pluraj eksterlandaj kuracistoj (ĉefe el Italio, Grekio, iama Jugoslavio). Kiam ni organizas fakan kurson por kuracistoj, ni devas elekti la lingvon uzotan, ĉefe se la kursgvidanto ne scias la italan (kiu restas la komuna lingvo de la tiĉinaj kuracistoj). La situacion vi rimarkas sube.

### Kuracistoj laborantaj en Ticino

Lingvokonoj

Tiĉinaj kuracistoj:	<b>itala</b> + franca + germana	(multaj: ankaŭ <b>angla</b> )
el Romandio:	franca + <b>itala</b> + <b>angla</b>	(malmultaj: ankaŭ germana)
el Alemanio:	germana + <b>itala</b> + <b>angla</b>	(malmultaj: ankaŭ franca)
el Italio	<b>itala</b> + <b>angla</b>	(neniam germana, malmultaj: franca)

Kiel vi rimarkas, post la itala, la plej komuna lingvo estas jam nun la angla. Sed la origine tiĉinaj kuracistoj estas ankoraŭ tre multaj, kaj ne eblas trudi la anglan nun. En la venonta generacio, la elekto ne plu estos inter la itala, la franca, kaj la germana, sed nur inter la itala kaj la angla.

En Tiĉino, sed ankaŭ aliloke en Svislando, naskiĝis diskuto pri la senco de eventuala lingvopolitika ŝanĝo, t.e. pri la senco de la daŭra kresko de la angla. Fakte, la rolo de la itala en la svisaj lernejoj estas grave endanĝerigata. Entute, la konoj de la lingvoj en Svislando radikale aliiĝos dum la venontaj jaroj.

Iuj kredas, ke la “pragmatika” uzo de la angla ne endanĝerigos la “verajn” valorojn, kiuj estas “svisaj” (nome konfederaciaj, kaj ligitaj, en Tiĉino, ĉefe al la franca lingvo: laŭ la poeto Pusterla, 1998). La novemuloj atakis tion, kaj klare indikas, ke la ŝanĝo estos radikala (Baggi 1998, Campana 1998). Iuj mokis, ke ne temas pri la ŝekspira angla, sed pri la angla de Bill Gates (Guidicelli 1998)! Sed fakte la angla lingvo, kiu gajnis, estas ja la lingvo de Bill Gates! Gajnis ne la londona, sed la novjorka kaj la losanĝelesa lingvo.

En Italio ekzistas fama bildstria periodaĵo, nomata *Linus*. Ĝi aperis je la unua fojo en 1961. La centro de la tiama “internacia kulturo”, por la tiama linusanoj, estis Parizo. Iom post iom, ankaŭ dank al la eventoj dum la 60-aj jaroj, la centro migris de Parizo al Usono, nome kaj al Kalifornio, kaj al Novjorko. La angla lingvo aperis ankaŭ en la revuo, unue silentpaŝe. La franca malaperis, same, iompostiome. Nun, la franca kulturo en la paĝoj de *Linus* ne plu ekzistas. Ekzistas nur la angla kulturo. Kion ni povas legi pri Francio venas tra Novjorko. Tiu estas la radikala perspektivo-ŝanĝo, kiun multaj tiĉinaj kleruloj timas. Sed ĝi estas neevitebla.

La ministro de la tiĉina Departemento pri Instruado, Giuseppe Buffi, deklaris sin seniluziiĝinta pri la konfederacia solidareco, sekve de la apero de la t.n. Lüdi-raporto, en 1998. Tiu federacia raporto, fakte, proponis pligrandigi la spacon disponigendan al la angla, en la lerneja fakaro. Tiu raporto fakte troviĝas mezvoje inter la nuna (“tradicia”) situacio, kaj la situacio, kiun la raporto Cotti-Delcò (UBS) proponis. Nun tamen la Departemento laboras por limigi la francan, kaj por antaŭenigi la germanan kaj la anglan. Kaj mi bone konas la praktikon: la francan oni iom post iom forigos (Tognola 1998), favore al la germana kaj al la angla. La itala estos grave reduktita ĉie en Svislando (Jelmini 1998), eble je la nivelo de la hispana (Caratti 1998).

Ĉirkaŭ la tutsvisa lingvo-didaktika kaj plurlingva periodaĵo *Babylonia*, formiĝis grupo, kiu volas kontraŭstarigi tiun ĉi evoluon. Ĝi lanĉis “Manifeston por la lingvoj”, kiu favoras la plurlingvan lernadon, tradician en nia lando. Ĝi vekis certan interesiĝon ĉe la kleruloj, sed la ĝenerala opinio estas, ke ĝi ne multe utilos (Tognola 1998), ĉar ĝi faras valoran, sed bedaŭrinde retrogardan batalon.

Eble la disvastiĝo de la angla tro antaŭeniris, kaj ĝi jam tuŝis la koron kaj la cerbon de niaj civitanoj. Nun la tajdo alkondukas la transformiĝon de niaj lernejoj fako.

## Kial Esperanto fariĝis neutila

Esperanto fariĝis neutila en la monda praktiko, ĉar ĝia komunika potencialo estas preskaŭ nula (de Swaan 1998). Fakte, neniu malhelpas, ke oni utiligu Esperanton. La lingvo - ĉiu lingvo - estas kolektiva bieno. Iusence, Esperanto estas ja “natura lingvo”, kaj la naturaj lingvoj estas alireblaj al ĉiuj. Lingvo povas principe kontentigi ĉiun ajn komunikbezonojn. Se lingvo vivas, aŭ se ĝi mortas, tio ne estas lingvistika demando, sed nur sociologia.

Mi aliĝis al la Esperanto-movado en epoko, kiam ĝi estis speco de funkcianta internacia lingvo por *blinduloj*. Multaj blindulaj bibliotekoj ŝatis ricevi brajlajn tekstojn en Esperanto, kaj pli poste ili ŝatis ricevi kasedojn en Esperanto. Nun tiu aparta rolo ne plu ekzistas (Grassini 1999). Naskiĝis lego-maŝinoj, kaj programoj, kiuj rekte ĉu skribas parolataĵojn, kvazaŭ sekretariino, aŭ legas elektronike skribitajn tekstojn. Ekzistas interesaj instru-teknikoj por efike instrui fremdajn lingvojn ankaŭ al la blinduloj. Kaj, kompreneble, ĉio tio malgrandigas la intereson por Esperanto.

Tiu estas nur unu el la multaj malprogresoj de la lingvo. Esperanton oni ne uzas, ĉar *ĝia komunika potencialo* estas malalta. La komunika potencialo ne konsistas nur el la fakta uzo de lingvo, sed ankaŭ el la impreso, ke ĝi estas pli pova kaj pli prestiĝa. Nome, en Eŭropo, la germana estas pli parolata ol la angla, sed la angla restas la preferata komuniko-lingvo. La ĉina estas la plej parolata lingvo en la mondo, sed ĝi estas relative “malgrava”. La araba disvastiĝis pro religiaj kaŭzoj ĉefe en la sudaj bordoj de la ĉirkaŭmediteraneaj landoj, sed temas pri landoj malriĉaj, sen influo eksterlanda. Ĉiuj kleraj arablingvuloj konas al anglan.

Esperanto ne fariĝis vaste uzata komunikilo, sed nur la komunikilo disvastiĝinta en la esperantistaj diskut-klubo. En ili oni diskutas, cetere, ĉefe pri esperantaĵoj. Kaj ĝi bedaŭrinde restis kaj ankoraŭ nun restas en tiuj kluboj. Tiu situacio estas vera senelirejo.

La uzo de lingvo, cetere, ne dependas de ĝiaj kvalitoj. Ne la plej taŭga lingvo “venkos” (t.e. tutmondiĝos), sed tiu, kiu montriĝas plej ofte en la modernaj komunikad-sistemoj. Ni konsideru la video-bendajn sistemojn. VHS fariĝis universala, kvankam Beta-sistemo, Video-2000, kaj ĉefe Video-8 estas teknike multe pli altkvalitaj ol VHS mem. VHS certe malgajnos estonte, sed favore al DVD-sistemo. Pri Beta-sistemo neniu plu parolos.

Iusence, la esperantistoj estis ofte speco de salo en la internacia vivo. Sed neniu malkovris tion. Neniu sekvis tion. Grandparte sendepende, la ekstera mondo remalkovris ĉion, kion la esperantistoj elpensis. Iusence, oni ĉion akceptis, el la esperantista mondo, kun la escepto de la lingvo:

- Aktiva instruado en la lernejo fariĝis delonge bazo de la lingva instruado. Ĉe-instruado (ne sub la nomo de Andreo Ĉe) delonge estas normala tekniko utiligata.
- La esperantistoj ĉiam asertis, ke indas instrui lingvojn al infanoj. Nuntempe temas pri afero vaste akceptata.
- La esperantistoj neniam timis dulingvecon. Ĉiu hodiaŭa specialisto pri edukado opinias same.

- La esperantistoj ĉiam favore parolis pri komuna lingvo por la tutmonda komunikado. La apero de la angla en tiu situacio atentigis la homojn pri la avantaĝo de tiu monda lingvo.
- La esperantistoj ĉiam opiniis, ke lingvo instruata devas utili al la bazaj bezonoj de la homo. Tial, indas instrui fundamentan sed utilan vortaron (“minimuma lernado”). Tiu principo fariĝis universala.
- La esperantistoj ĉiam subtenis la praktikan uzon de lernota lingvo. Nuntempe oni ne plu lernas nur por legi beletron!
- Ne gravas, ĉu iu parolas bele, ĉu iu parolas iom erare. Ni invitu la homojn, utiligi lingvon sen timo, kaj tial ni malatentu al la lingvaj eraroj. Tiu sinteno fariĝis grava en la moderna pedagogio.
- La esperantistoj ĉiam subtenis, ke oni malakceptu la lingvan diskriminacion. La nuna disvastiĝo de la angla permesas egalnivelan partoprenon al la tutmonda scienco kaj kulturo eĉ al simplaj homoj.
- La lingvoplanado estis esenca punkto ĉe la esperantistoj. Neniu kontraŭas plu tiun tezon.
- Sed akompanas tion ankaŭ lingvopolitiko: ĝi estas grava momento en la ŝtata kaj kultura politiko.



## Konkludo

*Esperanto ne plu ekzistas en la konscio de la svisoj.* Nek kiel io reala, nek kiel io ebla. Ne en turismo, ne en diplomatio, ne en scienco, ne en amuzado, ne en lerno, ne en profesio, ne en komerco. Ĝi estas nevidebla kaj nevidata: ne en libroj, ne en revuoj, ne en librovendejoj, ne en filmoj. Ĝi havas lokon en neniuj projektoj de socio, en neniuj vizioj de la estonto. Kaj tamen, la publika ĉeesto de la lingvo estas necesa, por ke estu garantio pri supervivo.

Sen prestiĝo, sen perspektivo, kun limigita interna apliko (al amuza kaj turisma babilado), kun internaj kvereloj, kiuj klare indikas pri stagno, ĉar movado, kiu kreskas, ne montras kverelojn. Konsentite, kvereloj montras vivon, kaj, kiel asertis Privat en 1912, “ili ne estas sangaj”.

Finfine, la iama “internacia”, aŭ eĉ “universala” lingvo transformiĝis al unu plia lingvo. Jen la situacio. Esperanto transformiĝis al “lingvo speciala”, de aparta grupo, kiu flegas ĝin kun forta lojaleco. Ironie, la esperantistoj kontribuis al la *plimultigo* de Babelo, *ne al ĝia solvo*. Ĉar la solvo venis, sed de alia flanko.

Kelkaj opinias, ke kulpas la esperantistoj, ĉar ili ne kapablis sufiĉe disvastigi sian lingvon. Kelkaj opinias, ke kulpas la ne-esperantistoj, ĉar ili ne sukcesis kompreni la racian idealon de la esperantistoj.

Por tion klarigi, kelkaj opinias, ke kontraŭ Esperanto rolas ankaŭ kelkaj psikaj mekanismoj, kiuj malhelpas racian pensadon, rilate la internaciigon de planita lingvo. Mi povas konsenti, kun Piron (1994), ke la kontraŭstaro al Esperanto venas, almenaŭ parte, de psikaj defendo-mekanismoj kontraŭ neraciaj angoro. Mi konsentas kun li, cetere, ke en la Esperanta movado ekzistas ankaŭ fortaj karakteroj, kaj ne nur neŭrozaj personoj. Povas esti, ke Esperanto, iusence, estas sentata kiel tre forta tabuo, misefike ĉe la ekstera publiko. Sed tio signifas, ke kontraŭ la ideo de planlingvo ekzistas stranga kaj antikva malemo. Tiu malemo estas origina, praa. Sed tiam, kial diable insisti por doni planlingvon al iu, kiu ne volas ĝin?

Supozeble la esperantistoj eraris. Ili kredis, ke la publiko ŝatos Davidon. Sed okazis, ke ĝuste Goliato fariĝis populara, dum Davido tute ne. Por nia konscio, estas klare, ke tio estas tre bedaŭrinda, kaj mi estas konvinkita, ke la fakto, ke la esperantista propono estis rifuzita, ne signifas, ke ĝi estis principe senvalora. Montriĝis, ke la juĝo-kriterioj de niaj ceteraj kunhomoj estis esence aliaj ol ni imagis.

### *Ĉu Esperanto atingos la jaron 2045?*

Esperanto montris grandan kresko-forton inter 1910 kaj 1930, ĝis montriĝis, ke *ĝi ne atingos siajn celojn*. Ni devas agnoski malvenkon. Ne Esperanto akceptiĝis kiel internacia lingvo, sed la angla. La Esperanto-movado naskiĝis por vivi la lingvon. Ĝi daŭris, ĉar kelkaj lernintoj ne intencis rezigni je la faritaj grandaj hom-, temp- kaj mon-investoj.

Malgajnis “pracelismo”, kaj gajnis “raŭmismo”. Unu plia lingvo naskiĝis. Sed temas pri iluzia “venko”, kiu nur anticipas rapidan kaj radikalan malkreskon.

*Mankis sistema politiko de Esperanto*, kvankam multaj tiaj politikoj estis elprovitaj. Ni devas konstati, ke Eŭropo (kaj la mondo) ne volas artefaritan lingvon. Ne povas ekzisti vera politiko de Esperanto. Ne idealoj antaŭenpuŝas la mondon, sed la interesoj kaj la profitoj.

Ne videblas estonto por la planlingvoj. Ili malaperos. En la jaro 2010 malaperos la Idomovado. En 2020 estos la momento de Interlingua. En 2045, supozeble, estos la fino de la Esperanto-movado, kiu transformiĝos al movadeto grupiganta kelkajn maljunulojn, kiuj fakte ne povas akcepti, ke io ne funkciis en la tuta demando. En 2100 Esperanto estos muzeajo.

*Esperanto*, la revuo de UEA, jam anoncas ion tre danĝeran: la nombro de la membraro de UEA stagnas ekde 10 jaroj, sed la konsisto de tiu membraro aliiĝas: kreskas la procentaĵo de la UEA-anoj en la evolulandoj, kaj malkreskas la okcidentanoj. Tiu estas ne nur katastrofo ekonomia, sed ankaŭ evolua: ĉar la kerno de la moderna estas la okcidento (“Al libera merkato de UEA”, en *Esperanto*, 4/1999).

Ankaŭ verko pri la historio de la franca Esperanto-movado konkludas iom malĝojige: “Ŝajnas, ke ni ne bone komprenis la evoluon de la socio, kaj ne sciis adapti nin sufiĉe por daŭre ludi gravan rolon en ĝi. Emfazo de la abstrakta, teoria valoro de la lingvo ne plu sufiĉas. Revo de *triumfanta Esperanto* eksmodiĝis. Esperanto en si mem ne plu estas entuziasmiga allogilo: ĝian praktikan utiligon, ĝiajn sentebajn avantaĝojn ni devas proponi. Post Boirac, ni ciam asertis, ke ‘Esperanto estas la latino de la demokratio’, sed kion konkretan ni vere proponis al la popolo?” (Hervé Gonin, 1998).

*Estas bedaŭrinde por la lingvo*, kiu fakte estas interesa kaj eĉ genia kreaĵo. Certe, la ortografio de Esperanto estas io tre ĝena, sed certe ne estis tio, kio malhelpis. Eĉ sen supersignoj, ĝi ne havintus pli bonan akcepton. Idio ne havas supersignojn, kaj tamen ĝi troviĝas en agonias stato.

*Kulpas ne la esperantistoj*, kiel kelkaj homoj senpruve asertas. Ili kuraĝe kaj sindone batalis, oferis, proponis kaj deziris. Ili estis ekzemplaj, en sia sindediĉo. Ne: kulpas la politikaj decidoj faritaj en 1922 ĉe la Ligo de la Nacioj. Kulpas la blindeco de la tiamaj kaj postaj politikistoj francaj kaj germanaj. Sed eble, eĉ se ili estus konsentintaj kun la solvo “Esperanto”, la decido estintus, tamen, finfine, neaplikebla. Eble la esperantistoj ne taŭge taksis, ke planlingvo devas esti jam komence utila. Idealismo ne sufiĉas. Ankaŭ ne helpis la ĝenerala promeso, ke tiu lingvo faciligos la lernon de pluaj lingvoj.

Etiko ne helpas. La lingvo devas esti *palpeble utila al la vivo de la lernintoj*. Eble ili trogravigis demandojn fakte ne multe sentatajn ĉe la publiko. Ĉar la plej granda parto de la homoj fajfas pri lingva egaleco, kaj fajfas pri la morto de minoritataj lingvoj. La homoj ĝenerale nenion rimarkas, aŭ tre malmulton, aŭ mem partoprenas al la mortigo de sia propra lingvo. Sed ploras pri la morto de la lingvo de la aliaj. La esperantistoj mistaksis ankaŭ la rolon de la racio kaj de la “perfekteco” en tiuj demandoj. Ne altkvalita lingvo estas utiligata, sed lingvo komunike pova, ĉar uzata ĉie.

Nia tasko, nuntempe konsistas en la konservo de la memoro pri Esperanto: kiel lingvo, kiel movado, kiel kulturo, kiel literaturo. Ni ne povis estis la kavaliroj de la efektivigita idealo zamenhofa. Ni estu, malgraŭ ĉio, minimume, la administrantoj de la memoro.

# Aldonaĵo (1): Aliĝu al la internacia lingvo

9.10.1995

Tazio Carlevaro

## *Neceso reрпиensi nian starpunkton*

La nuna situacio de Esperanto<sup>15</sup> en Eŭropo postulas, laŭ mia kompreno, seriozan reрпиenson pri nia strategio. Fakte, la mondlingva situacio aliĝis, kio siavice postulas diskuton pri nia nuna situacio. Tial mia titolo, kiu indikas la neceson alfronti fakton nekontraŭstareblan.

Dum la lastaj 5 jaroj<sup>16</sup> mi laboris kiel medicina direktoro de la Tiĉina (itallingva-svisa) Psikiatria Organizaĵo, en kies sino mi okupiĝas ankaŭ pri instruado (nome pri fakigo de kuracistoj al la psikiatria laboro), kaj pri esploro (aparte, pri epidemiologio kaj pri labor-efikeco). En tiu laboro, mi malkovris interesajn faktojn, pri kiuj mi volas raporti en la sekvaj paragrafoj.

## *Lingva politiko en la itallingva Svislando*

Kvankam fakte, ke la instruado de unua kaj de dua "fremda" lingvo, en la svisaj lernejoj, intensiĝis, veras ankaŭ, ke la dua fremda lingvo por ĉiuj, eĉ ĉe ni, estas ofte la angla. La unua fremda lingvo estas en germanlingva Svislando ĝenerale la franca (escepte en Uri, kie ĝi estas la itala), kaj en franclingva Svislando ĝi estas la germana. La dua fremda lingvo estas selektebla, nome oni povas elekti inter la angla kaj la itala. En la itallingva parto de Svislando, la du unuaj fremdaj lingvoj estas respektive la franca kaj la germana, kaj oni enkondukis trian fremdan lingvon, plej ofte la anglan (eblas lerni ankaŭ la hispanan), damaĝe al la unua (la franca) aŭ al la dua (la germana) fremdlingvoj.

Hodiaŭ multaj miras, ke ĉie en Tiĉino eblas paroli france, kaj tre ofte germane, ke prelegoj, teatraĵoj, filmoj, ktp, en la franca havas spektantojn sen traduko, kaj ke la nivelo de la kono de tiuj lingvoj estas pli ol kontentiga. Bedaŭrinde, tio restos ne plu dum longa tempo.

Antaŭ kelkaj tagoj la tiĉina parlamento aprobis leĝon pri la kreo de loka universitato. Sed estis necese enkonduki novan paragrafon: nome, ke la "oficiala" lingvo de tiu institucio estos la itala. T.e., interne de ĝi la komunikado okazos itallingve.

Fakte, kelkaj specialistoj volis enkonduki "aliajn" lingvojn ankaŭ tiucele, nome (supozeble) ne tiom la germanan, kiom la anglan.

---

<sup>15</sup> En tiu momento, komenciĝis mia esploro pri la nuna situacio kaj pri la estonto de Esperanto. Kompreneble mi tiam ankoraŭ esperis, ke io estos atingota.

<sup>16</sup> Ekde 1990.

## *Fremdlingva situacio en la svisa Konfederacio*

Mi rimarkis, ke en la svisaj sciencaj medioj ekzistas tre granda premo al la gravigo kaj la ekskluzivigo de la komunikado tra la angla. En german-svisaj kaj en franc-svisaj sciencaj institucioj oni devigas al perfektigo en angla lingvo, aparte en faka skribado. Nuntempe en sciencaj fakoj (fiziko, kemio, biologio, medicino, ekonomio, matematiko) oni preskaŭ nenion plu publikigas en "svisa" lingvo. Ne plu germane, ne plu france: nur angle. Por ekzerci la institutanojn al bona utiligo de la angla, la internaj ĉiusemajnaj mitingoj okazas en tiu lingvo.

Tion oni ne rimarkas tiel intense en klinikaj (medicin-hospitalaj) medioj, kie daŭre regas la loka lingvo, sed kie oni praktikas ankaŭ malpli da esplorado.

La abiturienta ekzameno en Svislando antaŭvidas la konon de du modernaj fremdaj lingvoj. La unua fremda lingvo devas esti "svisa". La dua estas selektebla, inter unu el la svisaj lingvoj (la itala), kaj la angla. Evidente, tio ne instigas junulojn lerni la italan.

La Svisa Societo pri Psikiatrio havas tri oficialajn lingvojn, sed fakte uzas nur du (la germanan kaj la francan; la italan oni ignoras). Dum ĝiaj kongresoj oni utiligas samtempan tradukon. Mi kredas, ke se foje oni ne plu povus utiligi tiun teknikan rimedon, estiĝus problemoj, kiajn ni spertas sine de la Asocio de Ĉefkuracistoj en Psikiatrio, kun tri oficialaj lingvoj (germana, franca, itala), sed kie ja utiligeblas nur du lingvoj, nome la germana kaj la franca, sed sen traduko: ĉiu ĉeestanto parolas sian lingvon (kun la escepto de la itallingvanoj, kiuj parolas ĉu la germanan, ĉu la francan). Sed vidu: multaj profesoroj, multaj ĉefkuracistoj, estas fakte eksterlandanoj, kiuj venis al Svislando ĉar oni alvokis ilin. Germano enmigrinta Svislandon ĝenerale ne lernis la francan, sed la anglan. Franco enmigrinta Svislandon, ĝenerale, ne lernis la germanan, sed la anglan. Kaj plej multaj el la svisaj profesoroj kaj ĉefkuracistoj lernis ankaŭ la anglan... Kiam ankaŭ tien enkondukiĝos la angla, kiel sola komuniklingvo?

Verdire, la lingva situacio komplikiĝis ĝuste pro la alveno de multaj kleraj eksterlandanoj, kiujn oni alvokis por labori fake. Tion ankaŭ estonte ni ne povos eviti, ĉar tiu speciala migremo apartenas al la esenco de la nuna civilizo.

Mi krome rimarkis, ke la situacio de la itala lingvo en Svislando estas interesa, malgraŭ la fakto, ke denaskaj itallingvanoj en Svislando atingas nur 5%. Ni konsciu, tamen, ke en Svislando ne ekzistas minoritatoj, krom la retoromanĉoj. La itala estas samdigna nacia kaj oficiala lingvo, kiel la germana kaj la franca. Fakte, en Svislando, la itala estas relative vaste parolata, sed senprestiĝa lingvo. Dank-al la itallingvaj enmigrintoj (1960-1975) ĝi iĝis, en formo iom piĝina, cetere, kiel la nuna "internacia" angla, la komuna lingvo de la konstruado, de la hotelado, de la manlaboristoj. Pli poste enmigrintaj hispanoj kaj portugaloj lernis la italan, unue pro la relativa simileco de la tri lingvoj, due pro la influo de la svisa itallingva televido, trie pro la fakto, ke la mastroj jam lernis siatempe la italan, kaj havis itallingvajn vicmastroj. La nunaj enmigrintoj (eks-jugoslavo, albanoj, kosovanoj, ktp) ankaŭ troviĝas antaŭ lerno de la itala kiel komuna lingvo, ĉefe en la germanlingvaj, sed ankaŭ en la franclingvaj kantonoj.

Tio cetere iel devigis multajn svisojn (aparte: kuracistojn) lerni pli-malpli la italan. Indas mencii, ke la internsvisa migrado multe kontribuis al la kreo de mikslingvaj familioj, kie ankaŭ la itala ekzistas.

Okaze de eksterlanda nur-anglalingva kongreso, mi malkovris, ke el la 30 ĉeestantaj svisoj (kuracistoj) minimume 25 scias la italan. Ne ĉiuj bone: tamen, sufiĉe por interkompreniĝi en ĉiutagaĵoj. La vera problemo en tiu grupo estis la ĵus-enmigrintaj nov-svisoj: ĝenerale ili scias nur la propran originan lingvon (nome: la nederlandan, la germanan, la serbian) kaj la lingvon de la landoparto, kie ili laboras kaj vivas (germanan, francan, italan). Plej interese estas rimarki, ke, dum por la origine-svisaj kolegoj, lingvo-scio kaj lingvo-lerno estas valoro kaj eĉ plezuro, por nia nova samlandanaro tio aspektas iaspeca balasto, ja io folklora sed finfine iom peza, kaj malŝpariga je kostoj.

## *La angla atingis la "kritikan mason"*

Ĉio tio okazis sen speciala premo fare de Anglio aŭ de Usono. Tio venas tute simple de la cirkonstancoj. En la precizaj sciencoj (de matematiko al medicino) la angla graviĝis sekve de la dua mondo-milito. Multaj eŭropanoj migris al Usono, kaj komencis verki kaj publikigi ne plu germane aŭ itale, sed angle. La mondo-milito detruis Eŭropon. La sola lando, kiu restis integra ankaŭ en la scienca kampo, estis Usono. Tien migris multaj sciencistoj, ankaŭ dank-al malavara politiko de monhelpoj, kaj al favoriga leĝo, kiu tion permesis, por plulerni dumlabore, en la periodo de 2-3 jaroj, medicinon, fizikon, kemion, matematikon, zoologion, psikologion, ktp.

La scienca Eŭropo angliĝis tiamaniere, ĉar la revenintoj rapide ricevis gravajn postenojn, kaj enkondukis teknikojn, metodologiojn kaj lingvon lernitajn en Usono mem.

Plej gravaj periodaĵoj sciencaj estas anglalingvaj. Ankaŭ en Eŭropo ili aperas angle, ĉefe se ili celas al publikigo de sciencaj malkovroj. Apud tio, tekniko kaj ekonomio angliĝis, kaj la premo de la gepatroj al la edukaj instancoj, instrui la anglan, fariĝis tre intensa. Ĉiuj tiuj faktoroj kontribuis al la "eksplodo" de speco de bezono por la angla, kiu efikis kiel neĝobulo. La disvastiĝo de la angla akiris "kritikan mason", t.e. ĝi ekfunkciis per si mem, sen plua aktiva favorigo.

Konklude, la kono de la angla finfine en Eŭropo atingis kritikan nivelon de ne-retroveno.

En kelkaj eŭropaj universitatoj oni instruas ankaŭ angle. Ne ĉiam, ne ĉie. Sed imagu ke nova profesoro, origine dano, venas instrui al la Zurika Politekniko. Li lernos ja la germanan, sed oni permesas al li instrui - ne en la dana, kiun neniuj komprenas - sed en la angla, dum du jaroj. Imagu, ke ia vizitanta profesoro venas de Japanio al Genevo, por prelegi dum unu jaro pri fiziko. Certe, li ne povus lerni la francan por tion fari. Do li prelegas angle.

En Eŭropo, politiko kaj ekonomio efikis favore al la angla. En Flandra Belgio multaj firmaoj uzas nur la anglan kaj la nederlandan. En Francio multaj firmaoj pure francaj, kiel Synthélabo, uzas eĉ interne la anglan. En Svislando, la situacio samas (ASEA Brown Boveri, Hofmann-La Roche, Ciba-Geigy). Interne de tiuj grandaj entreprenoj, mirinde stranga estas la ĵargono aŭdebla: duone angla, duone loklingva. Kaj en scienca, kaj en ekonomika kampoj.

Eĉ tuteŭropaj medicinaj asocioj utiligas praktike nur la anglan. Ekzemple, Collegium europaeum psychopharmacorum organizas ĉiujare grandan kongreson, kies lingvo oficiala

estas ja nur la angla. Ankaŭ la Eŭropa Asocio pri Psikiatrio, kies sidejo troviĝas en Strasburgo, korespondas nur angle (eĉ kun homo, kiu turniĝas al ĝi en la franca). Ĝiaj kongresoj konsistas el ĉefprelegoj (ĝenerale tradukataj al la franca), kiujn akompanas 10-15 seminarioj, ĉiuj ekskluzive anglalingvaj. La samo okazas kun publikaĵoj.

En psikologio oni baldaŭ atingos tiun situacion. En la Bazela universitato, aliĝo al la fakultato de psikologio postulas ekzamenon pri angla lingvo. La samo validas en Padovo (Italio).

La malapero de la Orienta ŝtatbloko efikis favore al la angla. Tiuj popoloj devis lerni la rusan, kiu ne malfermis la pordojn al la moderna scienco, kun la sola escepto, eble, de matematiko. Krome, ĝi pluportis la rusan vivmanieron, kiun orient-eŭropanoj abomenis. Ili fakte sopiris al la usona vivmaniero, ĉu prave, ĉu malprave. Nun ili aliras la anglan, kiu promesas (cetere, sen troigo) normalan lingvo-lernon, kontraŭ grandega profito: kiun ne plu la franca, ne plu la germana, kaj neniam la rusa kapablis garantii. La kalkulo pri investo kaj gajno evidente favoras la anglan.

Priatentu nur la malnovan revon (ne nur Esperantan) de Weltliteratur: nuntempe oni ja praktike ĉion tradukas de la angla al la eŭropaj lingvoj. Ofte oni tradukas de unu eŭropa lingvo al alia, ĝuste tra la angla. En la anglan oni entraduke trovas praktike ĉion, kion oni verkis en iu ajn nacia lingvo.

## *Eŭropo kaj lingvo*

Ne estas utile tro ofte paroli pri Eŭropa lingvopolitiko, ĉar fakte la nuna emo, tamen utiligi plurajn lingvojn en Eŭropa kadro, estas pure politika. Foje, la politika vidpunkto povus ŝanĝiĝi, kaj tiam tre facile funkcius solsole la angla, kiel komuna eŭropa lingvo. Eble kun ioma partopreno de la franca, pro la apartaj roloj de la urboj Strasburgo, Bruselo kaj Luksemburgo.

## *Sento pri aparteno*

Interesa konstato koncernas la specon de angla lingvo tutmonde parolata: ĝi multe pli aspektas kiel speco de ĵargono, sed egale: la parolemuloj tion ŝatas kaj laŭdas: "la angla estas lingvo freŝa kaj juna, ne tiel fiksita por ĉiam kiel la franca". Tio malveras, sed oni ja devas kalkuli kun la kredoj de la homoj, ne kun la realo (kiu restas nekonata al la plejparto de la homoj). Ne nur tio: multaj malkovras, ke la komunikado per la angla permesas veran neŭtralecon. Tio aspektas kvazaŭ hereza al esperantistaj oreloj, sed tio iel veras. Imagu grupon el francaj, danaj, finnaj kaj turkaj specialistoj pri farmakologio, kiuj kune parolas angle. Kompreneble, ne ĉiuj parolos same glate, same flue, sed tio okazas ankaŭ en Esperantio. Tamen, ili havas la senton aparteni al komuna grupo, kun komunaj intereso, kaj kun komuna lingvo, kiu fremdas al ĉiuj, kaj kiu tial permesas aliron samnivelan al ĉiuj. Kaj tiu sento estas alte taksata.

## *Bezono de nova strategio*

Mi ne havas ĉi tie specialajn proponojn. Mi tamen atentigas pri kelkaj faktoj, kiuj devigas nin ŝanĝi nian informadon rilate Esperanton.

1) La angla fakte konkeris la rolon de internacia lingvo en Okcidenta Eŭropo, kaj certe ĝi konkeros ĝin ankaŭ en la Orienta. Ĝi estas grava komunikilo, kaj, laŭ mi, estas malbone



kontraŭstarigi ĝin al Esperanto. Esperanto estas multe malpli komuniko-pova. La profitkalkulo parolas malfavore al nia lingvo.

2) Politika akcento pri "malegaleco" de komunikado pere de la angla, ĝenerale, en Eŭropo, ne estas aŭskultata, ĉar ĉiam pli ofte troviĝas franco kun hispano, italo kun dano, germano kun polo, kaj ili parolas, kune, angle. Certe, ilia angla estas iel-tiela, sed ankaŭ la ĝenerala scio de Esperanto en Esperantio ne estas ĉiam elstara.

3) Indas konsideri kaj admiri la fakton, ke multaj homoj malkovras la senton de justeco, de egaleco, de komuna partopreno, per la uzo de la angla. Nia rolo estu ĉi tie gvida, en la senco, ke ni invitu plibonigi kaj pliperfektigi tiun senton. Ni devas reveni al niaj valoroj, kaj kompreni, ke ili fakte fariĝas parte aktualaj eĉ sen ni.

4) Ni devas insisti pri niaj valoroj. Montriĝis, ke la spiritaj valoroj de Esperantio iom post iom estis aktualigitaj de la cetera mondo. Iusence, ni antaŭsentis mondon, kiu tamen konstruiĝos, kvankam sen ni. Ni estis speco de avangardo. Eble ni restos tia.

*(Nenie aperinta artikolo, ĉar nenie akceptita)*

## Aldonaĵo (2): Kvazaŭ “liturgia” recenzo

### Enkonduko

Mia teksto estis kompleta komence de majo 1999. Kelkajn tagojn post la konkludo de mia laboro, mi ricevis broŝureton. Temas pri *La liturgio de l' foiro. Elementoj por ekzegezo*. Ĝin verkis Jorge Camacho.

Mi longe hezitis, ĉu mi ion skribu, konklude, ankaŭ pri tiu ĉi verko, kiu estas tipa simptomo de la agonio de Esperanto. Estas facile konstateble, ke Camacho kaj mi observis kelkajn timigajn fenomenojn, en la Esperanto-movado, al kiuj ni donas tamen malsaman signifon. Tio licas, kompreneble. La “simptoma” aspekto de la verko de Camacho kuŝas, male, en ĝia akre polemika tono, kiu principe nenion aldonas ĉu al la forto, ĉu al la malforto de la proponitaj argumentoj. Pro tio mi nomas tion “simptomo”.

Mi ne alfrontos la unuopajn temojn de Camacho. Nur kelkaj, fakte, havas rilaton kun nia diskuto pri la estonto de Esperanto.

### LF kiel rus-pupa organizaĵo

Estas fakto facile konstatebla, ke malantaŭ la *Kooperativo de Literatura Foiro*, la revuo *Literatura Foiro*, la periodaĵo *Heroldo de Esperanto*, la *Kultura Centro Esperantista*, la *Esperanta PEN-Klubo*, troviĝas ĉiam samaj 5-6 homoj en la gvidaj pozicioj. Objektive, tamen, tio mirigas nenion, ĉar ĝi reprezentas nenion novan. Mi konas estimatan esperantiston, kiu estas prezidanto de la loka Esperanto-klubo, sekretario de la nacia profesia Esperanto-grupo, asessoro de la nacia Esperanto-societo, kasisto de la internacia profesia Esperanto-societo, redaktoro de la loka Esperanto-bulteno, regula kontribuanto de la nacia Esperanto-revuo, kaj specialisto pri faklingvo en la internacia profesia Esperanto-revuo. Krome, de tempo al tempo, li transformiĝas al loka Esperanto-instruisto.

Ĝenerale, tiujn karierojn oni komencas nur iom post iom, per “provizora” tasko-transpreno. Subite, mankas la loka Esperanto-prezidanto. Oni petas, ke vi iĝu “provizore” prezidanto, dum unu jaro, por havi la tempon serĉi alian prezidanton. Sed, fine, oni nenion trovas, kaj tial oni petas, ke vi tamen daŭrigu unu plian jaron. *Il n'y a que le provisoire qui dure.*<sup>17</sup>

En la daŭro de kelkaj jaroj via tuta libera tempo troviĝas okupata per ofte sufiĉe tedaj kaj temporabaj Esperantaj taskoj. Ĉar, ĝenerale, la propono estas nur provizora, kaj, en si mem, ne ĉiam temas pri temporaba laboro. Estas la *sumo* de la tuta laboro, kiu estas paraliziga. Kutime, estas malfacile diri “ne”. Ĉar helpon petas ne sinjoro Neniu, sed amiko, ofte ne malpli Esperanto-plena ol vi mem estas.

Estas ja malfacile trovi kapablajn administrantojn, organizantojn, novemulojn, kiuj laboru por Esperanto kaj en la Esperanto-movado. Ĉar nek Esperanto, nek la Esperanto-movado, ĝuas socian prestiĝon. Ĉar la rezultoj estas ĝenerale malgrandaj, maldaŭraj kaj ne bone ekspluateblaj, eĉ kiam ili venas. Krome, la movado troviĝas en fazo de rapida malkresko.

---

<sup>17</sup> Nur la provizoraĵoj daŭras longe.

Estas do normale, ke, en kompleksa servo-krea entrepreno, troviĝas nur 5-6 homoj, ĉiam la samaj, kiuj decidis dediĉi sian vivon al tiu celo, kvazaŭ al misio. Mi aldonas, ĉi tie, ke bedaŭrinde estas tiel. Ĉar tio estas klara simptomo de la rapida malfortiĝo de la movado mem.

Ankaŭ mi kelkfoje miras pri la abundo de titoloj, kiujn la malsamaj LF-institucioj atribuas al siaj kunlaborantoj. Certe, ili korespondas al specifaj funkcioj interne de la LF-institucioj. Sed ankaŭ veras, ke ĉiuj homoj devas ricevi kompenson por sia laboro. Ekzistas monaj kompensoj, kaj prestiĝo-kompensoj. Monaj kompensoj, por homoj laborantaj en la Esperanto-movado, estas tre malmultaj. Eble ili eĉ ne ekzistas. Prestiĝo-kompensoj povas ja veni, sed ne de la ekstero. *Neniu* priatentas la baraktojn de nia ŝrumpanta movado. Ili povas veni nur el la interno de la movado mem. En formo de iom pompaj funkcio-nomoj.

## *Utilitarismo ĉe LF*

En la nuna malkresko de la Esperanto-movado, *Literatura Foiro*, kaj ĝiaj ĉirkaŭantaj organizaĵoj, celas haltigi la malaperon de la movadanoj, kaj per prestiĝo-politiko, kaj per servo-propono. “Esperanta Civito” estas la ĝenerala aŭ strategia kadro (la “ideologio”) de tiu politiko. Kiu espereble utilos al la malrapidigo de la hemoragio, sed ne pro tio la paciento resaniĝos. Tio demonstras, ke LF kapablas agi kaj utilitarisme, kaj prestiĝo-serĉe. Do ĝi ne estas nur kviete raŭmisma, sed ankaŭ iom UEA-eca... se entute mi ion komprenas pri tiu demando. Mi havas fortajn dubojn pri tio, ĉar mi estas “denaska” praelano.

Prestiĝa estis la agnosko de la literaturistoj verkantaj en Esperanto, fare de la Internacia PEN-organizaĵo. Kompreneble, ĝi utilas al nenio. Neniu lernos Esperanton pro tio, kaj novulo tamen tuj kaj facile perceptos, ke finfine, ankaŭ tie, daŭre renkonteblas la samaj homoj kaj la samaj nomoj. Cetere, ĉu kiel NGO-a organizaĵo, ĉu ekster la NGOoj, UEA nek gajnas nek perdas unu solan anon. Tiuj agnoskoj ne vivigas asocion. Mi opinias, ke ankaŭ eventuala atingo de Nobel-premio (al Auld, aŭ al UEA) ne multe helpas al la lingvo mem. La fakto, ke la aramea estis la lingvo, kiun hejme kaj publike parolis Jesuo Kristo, ne altigas la nunan malaltan prestiĝon de la aramea mem.

Literatura Foiro naskiĝis kiel raŭmisma entrepreno. Ĝi celas do valorigi la senton pri komuna aparteno de la esperantistoj. Por ĝin efektiviĝi, ĝi bezonas politikon, kiu antaŭvidas ankaŭ la liveradon de servoj. En formo de publikaĵoj (libroj, kasedoj, ktp), de revuoj, kaj de kursoj aŭ kulturaj manifestacioj. En kongresoj aŭ en similaj renkontiĝejoj. Oni povas diskuti pri la nivelo de tio. Oni povas diskuti pri la ĝenerala kadro, en kiu tio okazas (“Esperanta civito”). Ofte en konkuro kun aliaj organizaĵoj (parte ankaŭ UEA). Sed kial ne? Konkuro stimulas al plibonigo kaj seriozigo de la organizado. Kaj, bonvolu: *kiun alternativon proponas la LF-kritikantoj?*

La origina celo de Esperanto ne plu aktualas. Ĝi definitive forvapiĝis. Se iu deziras, ke la Esperanto-movado povu pluvivi ankoraŭ kelkajn jardekojn, tiu devas inventi novajn kaj alispecajn celojn. Ĉu tio valoras jes aŭ ne la penon labori? Tion devas decidi ĉiu unuopulo. Sed ĉu prave ĉu malprave, LF decidis, ke la Esperanto-movado meritas pluvivon. Kaj tion provis kaj provas fari LF. Ĉu sukcese aŭ ne, tiu estas alia demando. *À la longue*,<sup>18</sup> mi opinias, ke tio ne influos la destinton de la lingvo. Sed kio alia estus farinda, aŭ farebla?

---

<sup>18</sup> Sur longa periodo.

Iusence, mi komprenas, ke oni inventis ion, kia estas la Esperanta Civito, Ĝi estas iaspeca radikala raŭmismo, t.e. maniero kultivi la esperantistojn, kreante specon de identeco, de "ni-sento". Fakte, ĝin elpensis, komence, supozeble, la Esperanta sekcio de la itala Radikala Partio. Kiam LF transpaŝis al la organizo de tio, naskiĝis malkonkordo kun la menciita sekcio. Tiuj malkonsentoj estas oftaj en *utopiaj* entreprenoj.

Estas fakto, ke, sociologie, la Esperanto-movado ne tiom similas al "popolo", sed al sekto, aŭ pli bone, al *religia ordeno*. Do oni inventis kuriozaĵojn: i.a. specon de reprezenta registaro, de parlamento, de juĝa instanco. Mi opinias, ke tio ne povas funkcii, pro la esenca komplekseco de la inventaĵo, kaj pro la liberecana (iom anarkiista) karaktero de la esperantistoj. Se oni provos ĝin funkciigi, tio okazigos atombombajn konfliktojn.

## La "simptomo"

Centra, en la diskuto, estas la tono de la kritikoj kontraŭ LF-ismo. Ĝi estas akra, agresema, senkompata. Nenio funkcias, nenio saviĝas, ĉio estas forĵetenda: la planoj, la ideoj, la strategioj, la rezultoj, la kreaĵoj, kaj ĉefe la homoj. Ĉu la LF-kritikantoj montriĝis pli valoraj, aŭ ĉu ili kapablis krei ion pli efikan? Ĉu ili skizis ĝeneralan kadron de interveno pli realan, kiu pli forte garantias la pluvivon de Esperanto? Tute ne.

Ili kritikis ĉu la prestiĝo-politikon, ĉu la politikon de servoj de LF, ĉu ambaŭ. Povas esti, ke tiuj politikoj kondukos al nenio. Povas esti, ke ili de tempo al tempo iom tro pompas (sed ĉiu rajtas reklami sian produkton). Povas esti, ke ili konkuras aliajn entreprenojn (sed tio eĉ povas esti pozitiva). Sed la kritikantoj ne konscias pri la fakto, ke Esperanto baldaŭ malaperos, kaj ke la sola solvo por iom malfruigi tiun evoluon estas ĝuste tia politiko – aŭ ia politiko iel simila. Ĉu nenion fari? Mi opinias, ke fakte tiu estus la plej ŝpariga sinteno, la plej "ekologia", kaj tial la plej racia. Sed aliaj homoj rajtas rezoni alimaniere.

La situacio, do, estas bedaŭrinde pli ol klara. *Kial do tiom da galo?*

Parto de la kritikantoj, fakte, konsistas el malnovaj esperantistoj, kiuj ankaŭ multon investis en la movado, kaj kiuj ankaŭ nenion atingis. Fakto estas, ke LF, malgraŭ ĉio, ion konstruis. Tio ne influos la *finan destinon* de Esperanto: ĝi estas, bedaŭrinde, certa. Sed tio montris, ke eĉ en kriza periodo eblas iom bari la detruon. LF kapablis. La LF-kritikemuloj ne. Ĉu ili koleras? Ĉu ili ĵaluzas? Mi ne scias.

Se ili *ĵaluzas*, ili mistrafan sian celon. Ĉar ankaŭ la *nunaj* rezultoj de LF neniel ŝanĝos la destinon de la Esperanto-movado. La "Esperanta Civito" ne reprezentas miraklan eskapejon: kun iom da bonŝanco, ĝi sukcesos nur iom malfruigi la neeviteblon.

Se ili koleras, ili devus koleri kontraŭ si mem. Ili eniris movadon, kiu fiaskis: pri tio kulpas nek *Literatura Foiro*, nek UEA, nek la esperantistoj. Supozeble, la movado mem havis tro altan celon, kiu montriĝis neatingebla. Eble tiu movado tro taksis kelkajn celojn, kiuj al la "normala" homaro aperas nepre malgravaj kaj malinteresaj. Eble ĝi mistaksis proprajn fortojn, propran prestiĝon, kaj la respondon, kiun ĝi kapablis ankoraŭ vekti en la socio, ĝis la 70-aj jaroj.

Sed ke la LF-kritikantoj eniris blindan kaj fiaskontan movadon, kaj ke ili multon investis en bankrota entrepreno, tio estas ilia kulpo. Ili devintus malfermi ĝustatempe siajn palpebrojn. Ili kolere kontraŭ si mem.

Iuj asertas, ke ne temis pri propra blindeco, sed pri blindeco kaj pri antaŭjuĝa obsedeco fare de kelkaj (ĝenerale gvidaj) homoj. Mi ne neas, ke tio povus esti. Sed la faktoj montris, ke la popoloj sekvis tiun blindeco, kaj alproprigi je tiu antaŭjuĝoj. Naĝi kontraŭ la riverdirekto estas neutile.

La esperantistoj ĉiam bezonis iom da paranojo: lingvo, kiu bone fartas, ne elvokas emociojn, nostalgiojn, emon pri disvastigo, ĉar ĉio ĉi, en normala cirkonstanco, estas nebezona. Tiuj emocioj estas signo de malfacilaĵoj.

*En mortanta movado, estas normale ke oni kverelu.* Neniu akceptas sian propran respondecon pri la misinvesto. Neniu scias plu kion fari: tial, se aperas iu kun nova ideo, ĉu oni aliĝas al li sen kritiko, esperante pri magia solvo, ĉu oni energie kontraŭbatalas lin, por almenaŭ iomete montri al si mem, ke oni restas aktiva. Nekredebla estas la listo de harfendaj disputoj, kiuj fine fariĝis eĉ interhomaj kvereloj, pri fakte nenio – aŭ malmulto. Rememoru nur la akrajn diskutojn pri -ata/-ita, pri kiom/kiel, pri -ujo/-io, pri estis / estas estinta, pri la neologismoj, pri la skribmaniero (æ, ĉ, ch). Kvazaŭ la honoro de la individuoj, kaj la pluvivo de Esperanto dependus de tiaj detaletoj. Sed ja, ekzistas nenio pli grava por fari, ol tio.

Kiam ŝipo sinke dronas, ĝin forlasas unue la ratoj. La homoj kondukas aliel: komenciĝas milito de ĉiu kontraŭ ĉiu. La rezulto de tiu sinteno estas priplorinda. Nur ordo, konkordo, kunlaboro, permesas, ke en tiuj cirkonstancoj saviĝu pli multe da homoj. Gala sinteno, mistrafa atako al la homoj (kaj ne nur al la ideoj) akcelas pereon. Ankaŭ en Esperantujo.

Tion rimarkas bone *ne nur la novuloj*, kiuj ĝuste ankaŭ pro tio rapide forlasas Esperanton, ĉar ili timas tiajn nenienkondukajn kverelojn, *sed ankaŭ la eksteruloj*, kiuj nur interesiĝas pri la fenomeno "Esperanto".

# Aldonaĵo (3): Kio okazis inter 2000 kaj 2019

(Tazio Carlevaro)

Aldonaĵo 2019

Antaŭvidoj kaj perspektivoj

## *Kial tiu ĉi libro reaperas kun aldonaĵo, sed sen ĝisdatigo*

Tiu ĉi broŝuro, aperinta unue en 1999, kaj poste, en pliampleksigita eldono, en 2000, estas praktike nekonata. Ĝi estis longe neaĉetebla, ĉar ne prezentata far-de Esperantaj librovendejoj, kaj ne plu havebla en papera formato. Fakte, ĝi havis kelkajn (malmultajn) recenzojn. Ĉiuj estis severe negativaj. Neniu recenzinto indikis, eĉ se nur alude, la bazajn metodologiajn rimarkojn, kiujn mi proponis.

Tiu reago ne mirigis min. Temas pri reago tipe trovebla en ordenaj organizaĵoj. Nome: religioj, sektoj, ideologiaj grupoj, kaj en multaj politikaj partioj. Ili kreiĝis ĉirkaŭ baza kredo, kiun defendas skolastika “filozofio”, kiu konstruas kredindajn kredigajn mitojn. Tiu filozofio utiligas raciajn rimedojn, sed la fundamentoj miksas en neklara maniero sciencajn (pruvitajn) bazojn, kun kredo-postulatoj (kiuj aspektas “raciaj”, sed kiujn neniu fakte pruvis). Tio klarigas la “recenzojn” kaj la silenton. Tio klarigas la riproĉojn pri manko de lojaleco. Parolas pri “lojaleco” nur homoj, kiuj havas religiecan sintenon al la temo, kiu kaptas ilian atenton kaj koron. La vera demando estas tute alia. Ĉu la faktoj parolas pri kresko aŭ malkresko de Esperanto, ne nur kiel movado, sed ankaŭ kiel socia celo, akceptata kaj proponata ankaŭ far-de ne-esperantanoj?

Esperanto, naskita kiel dezirinda socia celo, fariĝas ĉiam pli privata kaj individua celo. Ĝi ne plu reprezentas benon por la homaro, sed benon por la individuo, kiu lernis ĝin. Ĉar la publiko, al kiu ĝi prezentiĝas, nepre malgrandiĝas. Mankas la esperitaj “avantaĝoj” de Esperanto: internacia prestiĝo, de grava kultura ligilo. Nuntempe, Esperanto estas ilo por individua kontakto, cetere kun tre limigita atingo-kapablo. Oni povas facile supozi, ke post deko da jaroj la situacio estos la sama kiel nun.

1. Ekzistas homoj, kiuj bezonas internacian lingvon, ili tial lernas kaj utiligas la anglan.
2. Ekzistas homoj, kiuj ŝatas utiligi, en eta grupo, komunan sekretan lingvon, kaj tial ili utiligas Esperanton (aŭ Idon).
3. Ekzistas homoj, kiuj deziras mem konstrui sekretan lingvon, kiun ili uzas plezurcele<sup>19</sup>.

Multaj homoj bezonas internacian komunikilon. Ili lernas la anglan. En la dua kategorio troviĝas homoj, kiuj eble lernos Esperanton (aŭ aliajn iamajn “internaciajn” planlingvojn). Inter aliaj, ankaŭ Idon. Ili deziras trovi ilon, por limigitaj kontaktoj, kaj eble por kultura kreo. Fakte, jam nun, kaj en Esperanto, kaj en Ido, malgraŭ ŝrumpo de aliĝinto-nombro, kreskas

---

<sup>19</sup> Jes, tio ekzistas. En Usono aperis libroj, kiuj instruas konstrui propran lingvon. Por la plezuro tion fari. Legu *The Language Construction Kit*, de Mark Rosenfelder, Chicago 2010, kaj *The Art of Language Invention*, de David J. Peterson, New York 2015.



kaj kvalite floras la kultura kaj literatura produktado. Temas pri limigitaj movadoj, kiuj ŝajne favoras la emon “troviĝi inter si”<sup>20</sup>. Verdire, jam siatempe la plej rimarkinda poeto kaj eseisto idista Andreas Juste verkis broŝureton kun la titolo “Ido: un parler d’amis” (Ido, dialekto uzinda inter amikoj). La dua kategorio de Esperanto-uzantoj troviĝas en daŭra danĝero, tamen, perdi la mondon, en kiu ili kulture vivas, ĉar tiuj rondoj tamen bezonas la alvenon de novuloj. Kaj tio estas finfine sufiĉe malcerta.

Socia projekto, socia idealo, kiuj privatiĝis. Sed Esperanton la esperantistoj daŭre proponas kiel “internacian lingvon”. Sed el “internacia” lingvo, kun altaj celoj, Esperanto pluvivos nur kiel unu el la multaj malgrandaj lingvoj.

## *La antaŭvidoj al 2045*

Kial 2045, kaj ne 2050 aŭ 2060? Ĉar en 2045 mi estos 100-jaraĝa. Kaj preskaŭ tute certe mi, tiam, jam kuŝos en tombo. Do, temas pri dato iusence tute “hazarda”, kaj samtempe simbola.

Ĝis nun, ĉi tiu libro, tamen, montriĝis bona profeto. Bedaŭrinde, iusence. La tendencoj al malkresko, kiujn mi klopodis evidentigi, montriĝis nehaltigeblaj, kaj ĉiam pli klaraj. Inter 2000 kaj 2019 pasis baldaŭ 20 jaroj. Tamen, la tendenco estis videbla jam en la 1970-aj jaroj.

Jam en la 70-aj jaroj, mi rimarkis, ke la libromerkato<sup>21</sup> en Esperanto malbone funkcias. Hodiaŭ, la situacio ne estas pli bona. En la 70-aj jaroj, eblis trovi lernolibron de Esperanto en normala librovendejo. Nun ne plu. Eĉ ne ĉe Amazon.

Ĉiujare pli evidentas la malapero de aktivaj esperantistoj. Parto mortis. Parto maljuniĝis. Parto seniluziiĝis pro la nekontentigaj rezultoj de granda kaj intensa laborado. La grandaj Esperantaj asocioj en Svislando likvidiĝis iom post iom dum la 80-aj jaroj. Nuntempe, UEA havas problemojn plulabori.

Sed Eo ne malaperos. Tiurilate, mi maltrafis la antaŭvidon. Ĝi fariĝos unu el la multaj ŝrumpintaj lingvoj, kiujn la homoj lernas por la amo lerni lingvon, kaj tiel utiligi specon de sekreta komunikilo. Kun eta grupo. Sed la internacia (interlingva kaj la interkultura) komunikada evoluoj, kiujn celis Esperanto, sekvos alian vojon.

La moderna tekniko igos la lingvo-lernadon parte ne-necesa. Ekzemple, la enuziĝo de la moderna teknologio de 5-a generacio (5G), kiu rapidigos la komunikon kaj la ellaboron de datenoj. Ĝi permesos la ellaboron de rektaj parol-tradukaparatoj.

Sed, finfine, 5G-teknologio fakte favoros pligrandiĝantan uzon de la angla. Jam nun, en multaj landoj, en la universitatoj, ĉefe en la sciencaj fakoj (sed mi rimarkis, lastatempe, ankaŭ en historio, kaj eĉ en teologio) la angla fariĝis centra lingvo. En diplomatio, la franca malaperis. La instruado de la angla disvastiĝas ĉiam pli rapide. Tiu kresko procedas per kvadrata progresio. Kaj unuopaj esprimoj, vortoj, ĉiutagaĵoj, ĉiam transmigras anglalingve al niaj lingvoj. La itala lingvo aspektas kvazaŭ granda spongo, kiu ĉiam pli avide (kaj nenecese) suĉas anglajn vortojn, transformante ilin al “normalaj vortoj” de la komuna itala lingvo.

---

<sup>20</sup> Legu kun plezuro la artikolojn de Gonçalo Neves: *Esperanto kaj Ido. Malsamaj vojoj sur Parnason*. En “Literatura Foiro”, N. 293 (junio 2018), p. 153-168, e en N. 294 (aŭgusto 2018), p. 220-230.

<sup>21</sup> Tazio Carlevaro: *Esperantal Antologio en Idolinguo*. Bellinzona, 1-a eld. 1977, 2-a eld. 2019.

En Eŭropa Unio, la plej instruata kaj praktikata lingvo estas la angla. Interne de EU, ankaŭ la ekŝiĝo de Britio nenion ŝanĝos al tiu vasta uzo. La latina estis utiligata en scienco kaj komunikado ĝis la fino de la 18-a jarcento. Kaj tamen, temas pri lingvo ne plu parolata de popolo.

## ***Esperantaj projektoj kaj la neceso akiri novajn esperantanojn***

Fiaskis la projekto lerni la lingvon de la “najbaro”. Antaŭ 30 jaroj, oni proponis instrui la lingvon de la ŝtato tuj apuda. Kaj Esperanton en la tutmonda komuniko. La germanan en Metz (Francio), la italan en Nico, ktp. En Svislando, oni enkondukis tiun strategion en Urio, kiu apudas Tiĉinon. Montriĝis, ke ne utilas. Se homo lernas la anglan, li havos rektajn kontaktojn ĉie. Neniu Uri-ano limiĝas al Tiĉino. Kial du lingvoj, kiam unu sufiĉas elstare?

Fiaskis la projektoj de loko, kie oni parolas Esperanton. La projektoj pri Esperanto-urboj malaperis.

Fiaskis la mito, ke la homoj amas propran lingvon. Fakte estas, ke la homoj amas la lingvon, kiu garantias socian progreson kaj prestiĝon al li kaj al lia familio. Ili instruas tiun lingvon al siaj gefiloj, por ke ili havu estonton pli favoran. Tiu emo progresi kaj havi pli bonan estonton estas la ĉefa kaŭzo, kiu mortigis la okcitanan, la irlandan, parte la romanĉan. Kaj preskaŭ ĉiujn dialektojn de Eŭropo.

La fakto, ke ekzistas ja movadoj, kiuj puŝas al selekto aŭ restarigo de iama lingvo, nenion signifas. Ofte, la lingvo estas nura flago, nura deklaro. Kion ili celas, estas multe pli konkreta. Ili fakte celas al memstara administro de propriaj financoj. Ili ne plu volas sendi la impoŝtojn al fremda ĉefurbo. Ili volas konservi kaj mem administri tiun monon.

En landoj lingve tiklaj, kiel Sudtirolo kaj Trento-lando, montriĝis, ke tiu memstara administro de financoj, kun kelkaj kromaj kunvivadaj reguloj, estas plene sufiĉa por garantii trankvilon kaj sukceson.

## ***Kelkfoje, la esperantanoj blagas pri nombroj***

Ni ofte ne vidas gravan malsamon inter instruo de la angla, kaj instruo de Esperanto. Instruisto de la angla tion faras profesie, kaj gajnas per tiu aktivado. Instruisto de Esperanto tion faras ĝenerale senpage, t.e. kun perdo.

Fakte, novbakita esperantano estas? tre multekosta akiro. Unue, oni devas esperantigi lin senpage. Due, el (ekzemple) dudek lernantoj, ĝenerale post iom da tempo restas nur unu. Kaj tiu restanta lerninto, travados la Esperanto-movadon dum ne pli ol kvin jaroj. Post kvin jaroj, li iom post iom malaperos. Kial li malaperas? Ĉar dum kvin jaroj li malkovris ĉio, kio estas malkovrenda kaj malkovrinda pri Esperanto. Poste, se li volas resti en Esperantujo, li malkovras, ke indas pligrandigi la nombron de esperantanoj. Kaj li subite malkovras, ke temas pri kosta, senrezulta, sizifa laboro. Kaj nia 5-jara esperantano rapide decidas, ke li ne volas tion entrepreni. Li malaperas ankaŭ ĉar pli esperanto-aĝaj esperantanoj puŝas lin al tamen senrezulta esperanto-informado kaj –instruado.

Tiu tuta laboro kostas multe da mono, multe da peno, multe da energio, multe da engaĝiĝo, sed montras nur etajn rezultojn. Kaj ne kovras la perdojn.

Fronte al malkresko de Esperanto, iuj kredas, ke oni ja povas mensogeti. En 1989, en *Corriere della Sera*, dum la tagoj de la falo de la muro inter ambaŭ Germanioj, aperis intervjuo de junulo, kiu decidis ekloĝi en okcidenta Germanio. Tiucele li lernis Esperanton, ĉar ĝi estas la plej disvastiĝinta lingvo en okcidenta Eŭropo. Blago? Mensogo? Iluzio? Karnavalajo?

De tempo al tempo mi legas, ke oni instruas Esperanton al miloj da ĉinaj studentoj en ĉinaj universitatoj, por “faciligi la rilatojn inter oriento kaj okcidento”. Blago? Troigo? Iluzio? Mensogo? Stultaĵo?

Ni supozu, ke tiuj informoj veras. Supozeble baldaŭ la lernintoj malkovras, ke Esperanto nenion faciligas. Ili ne plibonigos sian stud-nivelon dank al Esperanto. Ĉu tio helpas grandigi la prestiĝon de Esperanto?

Ekzistas antikva demando, kiu ne trovis ĝisnun veran respondon. Ĉar neniu volas vere trovi respondon. *Kiom da esperantistoj ekzistas en la mondo?*

Temas, certe, pri malfacila demando. Oni devas decidi, kion ni konsideras esti “esperantisto”. Ankaŭ iamaj esperantanoj? Kaj la eternaj komencantoj? Kaj la homoj, kiuj kapablas ja nur diri “Saluton!”?

La pritaksoj ŝancelas inter 50 milionoj kaj 5000 personoj en la mondo. Mi opinias, ke la ĝusta kvanto troviĝas inter 5000 kaj 10 mil. Ne pli. Sed kompreneble mi atendas specialiston pri demografio, kiu *certe* spertas pri tiuj demandoj, kaj kiu *certe* scias respondi kun certagrada sekureco al tiu demando.

Ankaŭ la transdono de Esperanto kiel famili-tradicia lingvo montriĝis preskaŭ ĉie kaj ĉiam neplenumbla idealo. Eĉ pli: ĝi fariĝis endanĝeriga projekto por Esperanto kaj por multaj infanoj. Fakte, la infanoj lernas lingvon, kiu ne havas lokan prestiĝon, kaj kiu utilas nur de tempo al tempo. La infanoj perceptas tion kiel “strangaĵo”, kaj ili ne ŝatas tion, kvankam dum infanaĝo tion toleras. Neniu, ĝis nun, enprofundiĝis en la jam dekomence antaŭvidebla destino de tiu projekto. Temas pri la destino de “Sinjo”, t.e. Siglind-Erika Schmalzriedt, kiu “traveturis sola” Eŭropon. Laŭrakonte. Sed fakte, pro puŝo de ŝia patro. Kaj fine, ŝi nenion plu volis scii pri Esperanto. La demando pri la “denaskaj” esperantistoj neniam ricevis akuratan ekzamenon.

Sed la malkresko de Esperanto kreas ankaŭ novaĵojn. Kiam lingvo fariĝas pli malforta, oni studas pli intense ĝian gramatikon kaj ĝian historion. La uzon oni ne plu tiel studas, ĉar ĝi ŝrumpas. Tio okazas ankaŭ en la Esperanto-movado, kie mankas recentaj studoj pri sociologio kaj fakta lingvo-uzo. Feliĉe, en Svislando aperi tra grava historia verko pri la evoluo de Esperanto (kaj de aliaj planlingvoj).<sup>22</sup>

En la Esperanto-movado aperis ankaŭ rimarkindaj vortaroj, kaj giganta historio de la Esperanta literaturo<sup>23</sup>.

## *Tamen, lernu Esperanton*

Ĉu indas *tamen* lerni Esperanton? Esperanto ne plu havas estonton en la internacia komunikado. Sed ĝi apartenas al eduko de plenkreskuloj, kaj al kulture kaj socie valoriga krom-interesiĝo. Restas la neceso konstrui ion, kio povas rekompenci la agantojn.

Alia punkto tre grava estas la aspektojn historiaj kaj literaturaj, kiun ni malkovras, lerninte Esperanton. Multo kreiĝis per Esperanto. Kaj tio restos.

---

<sup>22</sup> Andreas Künzli: *Universalaj lingvoj en Svislando*. SES-CDELI, 2006. Granda kaj komplekse riĉa libro kun 1129 paĝoj.

<sup>23</sup> Carlo Minnaja; Giorgio Silfer. *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: LF-kooperativo. 2015. xii + 748 pp.

## Konsultitaj verkoj

- ALBERONI Francesco: “Perché non basta più insegnare soltanto l’inglese”. En: Opinione liberale, 1998, 6
- BACCIARINI Alma: “Il plurilinguismo svizzero è salvo”. En: La Regione, 25.11.1998
- BACCIARINI Alma: “Inglese e cultura”. In: La Regione, 28.5.1998
- BACCIARINI Alma: “UNI e plurilinguismo”. En: La Regione 21.2.1998
- BAGGI Denis: “Inglese, utilità e cultura”. En: La Regione, 16.5.1998
- BAGGI Denis: “L’identità non sta nella lingua”. En: La Regione, 28.5.1998
- BAUR Arthur: La Retoromança. Historio kaj nuntempo de la kvara nacia lingvo de Svislando. Bellinzona 1995 (3-a eldono): Dubois.
- BIANCHI Rocco: “Sì all’inglese /.../. Il 53% favorevole all’introduzione dell’insegnamento di questa lingua nel secondo ciclo”. En: Corriere del Ticino, marto 1998.
- BLANKE Detlev: Internationale Plansprachen. Eine Einführung. Berlin 1985: Akademie-Verlag
- BORMANN Werner: “Defio faklingvo”. En: (Red. P. Chrdle) La stato kaj estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto. Praha 1995: Kava-Pech
- BROZOVSKY Joel: “Kial usonano uzas Esperanton?” En Esperanto, januaro 1998
- BUFFI Giuseppe: “Insegnamento delle lingue nella scuola obbligatoria”. En: Scuola ticinese, anno 27, 1998, sett-ott.
- CAMPAGNUOLO Antonio: “Amici nelle tenebre”. En: Touring, 3/1999
- CAMPANA Antonello: “L’inglese nella nostra scuola: complicare o semplificare?” En: Corriere del Ticino 8.10.1998
- CARATTI Simonetta: “Yes, ma salvaguardiamo l’italiano. La posizione del DIC sul rapporto relativo all’insegnamento delle lingue estere”. En: Corriere del Ticino, 6.10.1998
- CARLEVARO Tazio: Büf nutimik valemäpüka. Do you speak english? Ĉie rifuzita artikolo, 1995 (nun kiel apendico ĉi-tie).
- CARLEVARO Tazio, HAUPENTHAL, Reinhard: Bibliografio di Ido. Bellinzona, Saarbrücken 1999: Hans Dubois, Edition Iltis.
- CARLEVARO Tazio: “Les espérantophones suisses. Premiers résultats d’une enquête”. En: Babylonia, 1/1998.
- CHITI-BATELLI A.: Il luccio e il pescecane. C’è un rimedio alla glottofagia dell’inglese? Bologna 1998: Federalismo e libertà.
- CHITI-BATELLI A.: Il serpente e la colomba. È attuale, e come, l’hillelismo linguistico di Zamenhof? Manduria 1999: Lacaita.
- CHITI-BATELLI A.: Zamenhof oggi. È possibile, e come, aggiornare e far rivivere la sua idea di una lingua franca universale? Manduria 1999: Lacaita.
- CORTELAZZO Michele: “Crisi di creatività per i neologismi”. In Corriere del Ticino 30.1.1999
- CSISZÁR Ernő: “Heredita kulturon Esperantista”. En: : Aktoj de Internacia Scienca Simpozio ‘Esperanto 100-jara’. Vieno 1994: Pro Esperanto

- DELCÒ Raffaella, COTTI Alberto: L'insegnamento / apprendimento delle lingue nella Svizzera plurilingue. Prelego farita en Lucerno, 17.3.1985 (Conférence des directeurs de l'instruction publique).
- DEMIERRE Valérie: "Secrétaire bilingue, une denrée rare". En: Le matin, 23.11.1999
- DUC GONINAZ Michel: "Formiĝo de ideologiaj modeloj pri la rolo de Esperanto". En: (Red.: Ŝenad Ĉoliĉ) Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Sarajevo 1988: Elbih
- DURISCH Andreas: "Kein falscher Patriotismus, bitte. Englisch in der Primarschule". En: Sonntagszeitung, 22. November 1998
- DÜRMELLER Urs: "Englisch in der Schweiz". En: Quadrilinguismo svizzero. Presente e futuro. Materialienband. Berna 1989: Amministrazione federale
- EJSMONT Tadeusz: "Esperanto-movado kiel socia movado". En: (Red.: Ŝenad Ĉoliĉ) Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Sarajevo 1988: Elbih
- FETTES Mark: "Moderno kaj postmoderno en nia kulturo". En: Esperanto, novembro 1997.
- FÖSSMEIER Reinhard: "La merkato de lingvoj". En: Monato, novembro 1997
- FORSTER Peter G.: The Esperanto movement. The Hague 1982: Mouton
- FRANK Helmar: "Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo". En: Aktoj de Internacia Scienca Simpozio 'Esperanto 100-jara'. Vieno 1994: Pro Esperanto
- GALOR Zbigniew: "Danĝeraj skemoj" (pri W. Zelazny). En: Literatura Foiro, n-o 176, dec. 1998
- GILARDONI Diego: "Sulle ali del plurilinguismo". En: La Regione, 13.6.1998
- GOLDEN Bernard: "Pli da precizigoj pri Esperanto-sociologio". En: La Gazeto, n-o 65, 1996
- GONIN Hervé, AMOUROUX Jean: 1898-1998. Centjara asocia Esperanto-Movado en Francio. 3-a kajero: ekde 1975. Franca Esperantisto, aŭgusto 1998.
- GRAF Bruno: "La svisa junularo apenaŭ konas esperanton". En: SES Informas, 1/1999
- GRASSINI Aldo: "Le barriere di comunicazione. I non vedenti e il diritto alla comunicazione. En: L'Esperanto, organo de Itala Esperanto-Federacio, 30-a jaro, 8/1999.
- GUDSKOV Nikolao: Kio ni estas por la ekstera mondo? En: La Gazeto, 1995, n-o 59
- GUDSKOV Nikolao: Malneŭtrale pri la neŭtrala. Esperantismaj eseoj. Moskvo, Beauville 1997: SAT
- GUIDICELLI Paul: "Inglese padrone". En: La Regione 16.2.1998
- HOMARANO: Esperanto. Língua internacional neutra auxiliar. Rio de Janeiro 1994: Societo F.V. Lorenz
- JELMINI Eugenio: "Chi si preoccupa della lingua materna?" En: Azione, 8.10.1998
- "Kleine Schritte zur universellen Verständigung. Visionen und Perspektiven der Esperanto-Gesellschaft Zürich". En: Neue Zürcher Zeitung, 2.2.1999
- JANTON Pierre: Esperanto. Lingvo, literaturo, movado. Rotterdam 1988: UEA
- KORĴENKOV Aleksander: Esperanto post la jaro 2000. Rotterdam 1998: UEA
- KÜNZLI Andy: "Komento pri la laborkunveno de la 6-a de marto en Bern". En: Svisa Esperanto-societo informas. 2-a n., aprilo-majo 1999.
- LEYK Jerzy: "Sociologia karakterizo de la Esperanto-movado". En: (Red.: Krásko R., Leyk J., Zelazny W.) Zamenhof, movado, doktrino. Varsovio 1983: Pola Esperanto-Asocio
- LIEBSCHER Wolfgang: "Nomenklatur und Terminologie der Chemie unter dem Aspekt des Wirkens



- von Wilhelm Ostwald". En: Eine Sprache für die Wissenschaft. (Red. Becker, Wollenberg). Berlin 1998: Gesellschaft für Interlinguistik.
- LUSCHER Jean-Marc: "Langues d'enseignement et langues enseignées dans les Universités et les Hautes Ecoles en Suisse". En *Babylonia*, 4/1997.
- MANZONI Carlo: "L'inglese nelle scuole di Zurigo. Una lingua di troppo alle elementari?" En: *Corriere del Ticino* 12.2.1998
- MEIER Christian. "Sprache in Not? Einige Überlegungen zum heutigen Deutsch". En: Wissenschaftliche Buchgesellschaft. Jubiläumsausgabe 1999.
- MULLARNEY Máire: *Esperanto for hope. A new way of learning the language of peace.* Swords (Eire) 1989: Poolbreg
- PETRALLI Alessio: "Il prestigio delle lingue". En: *La Regione*, 24.8.1998
- PICASSO Marco: "La hereda lingvo". En: *Heroldo de Esperanto* 4-5 (1951-2), 1998.
- PIRON Claude: *Le défi des langues. Du gâchis au bon sens.* Paris 1994: L'Harmattan
- PIRON Claude: "Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto" (I). En: *Heroldo de Esperanto* 4-5 (1951-2), 1998; (II): 6 (1953), 1998
- PIRON Claude: "Psikologiaj reagoj al Esperanto". En: *Aktoj de Internacia Scienca Simpozio 'Esperanto 100-jara'*. Vieno 1994: Pro Esperanto
- PRIVAT Edmond: "Pri la Esperanta literaturo". En: *Junaĝa verkaro. La Laguna* 1960: Stafeto (orig. 1912).
- "Propono por Konstitucia ĉarto de la Esperanta Civito". En *Literatura Foiro*, 30-a jaro, oktobro 1999, n-o 181.
- PUSTERLA Fabio: "Lettera aperta sull'insegnamento dell'italiano nelle scuole svizzere". En: *Corriere del Ticino* 4.12.1998 (ankaŭ en: *Verifiche*, anno 28, n-o 6, 1998
- Quadrilinguismo svizzero. Presente e futuro.* Berna 1989: Amministrazione federale
- Quadrilinguismo svizzero. Presente e futuro. Materialienband.* Berna 1989: Amministrazione federale
- RAŠIĆ N.: "La soci-psikologia strukturo de parolkomunumo de esperantistoj". En: (Red.: Ŝenad Ĉolić) *Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado.* Sarajevo 1988: Elbih
- RAŠIĆ Nikola: "Pledo por sociologio de la Esperanto-movado". En *Esperanto*, majo 1995.
- SIKOSEK Ziko Marcus: *Esperanto sen mitoj. Mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado.* Antverpeno 1999: Flandra Esperanto-Ligo.
- SILFER Giorgio: "Inaŭgura parolado al la 1-a Forumo por la Esperanta Civito". En: *Heroldo de Esperanto* 9-10 (1956-7), 1998.
- SILFER Giorgio: "La Grütli de Esperantio". En: *Literatura Foiro* 29; 175: 1998
- SMET Wim de: "Kio estas esperantisto" (I), En: *Heroldo de Esperanto* 14 (1945), 1997; (II): *Heroldo de Esperanto* 16 (1947), 1997
- STEINER Reto: "Good night, Switzerland!" En: *Bulletin des médecins suisses*, 1998; 79: 17.
- STOCKER Frank: *Wer spricht Esperanto? Kiu parolas Esperanton? Analyse der Esperanto-Bewegung in Deutschland unter soziodemographischen, verbandspolitischen und soziokulturellen Aspekten.* München, Newcastle 1996: Lincom Europa
- SWAAN Abram de: "A political sociology of the world language system" (I). En: *LPLP* n-o 1, 1998 (jarkolekto 22); (II) "The inequal exchange of texts". En: *LPLP* -no 2, 1998 (jarkolekto 22).



- SYMOES E.: “La Esperanto-komunumo”. En: (Red.: Ŝenad Ĉoliĉ) Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Sarajevo 1988: Elbih
- TIŠLJAR Zlatko: Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj. Maribor, Zagreb 1997: Interkulturo
- TOGNOLA Marco: “L’italiano da salvaguardare”. En: Corriere del Ticino 14.12.1998
- TOGNOLA Marco: “Un manifesto in favore delle lingue”. En: Corriere del Ticino 25.9.1998
- TONKIN Humphrey: “La estiĝo de la Esperanto-socio”. En: Aktoj de Internacia Scienca Simpozio ‘Esperanto 100-jara’. Vieno 1994: Pro Esperanto
- USUI Hiroyuki: “De venkemo al kuntenado”. En: Esperanto aprilo 1998.
- VASSERE Stefano: “Internet: una torre di Babele che necessita strutture linguistiche”. En: Azione, 11.2.1999
- VASSERE Stefano: “Qual è lo status della lingua francese?”. En: Azione, 21.4.1999, n-o 16.
- WACHA Blazio: “Defende raŭmision”. En: La Gazeto, n-o 68, 1997
- WACHA Marta: “Alitipa Esperanto-sento”. En: Heroldo de Esperanto, 2 (1949), 1998
- WELGER H.: “Ses psikologiaj tezoj pri la motivoj por lerni Esperanton”. En: Magdeburga Folio, okt. 1997, n-o 21
- YAMASAKI S.: “Varo aŭ valoro”. En: Monato, marto 1999.
- ZAFT Sylvan: Peter Jameson’s secret language. Farmington (MI-USA) 1996: Bela Lingvo Press
- ZELAZNY Walter: “Sociologio de la Movado kaj la Internacia Lingvo”. En: Literatura Foiro jaro 29; 172: 1998